Aktoj de la 3-a Nitobe-Simpozio de Internaciaj Organizaĵoj
Proceedings of the Third Nitobe Symposium of International Organisations
第三次国际组织新渡戶研讨会公报
25-26.VII.2004

Al nova internacia lingva ordo

Towards a New International Language Order

迈向国际语言新秩序

Universala Esperanto-Asocio

Al nova internacia lingva ordo

Towards a New International Language Order

迈向国际语言新秩序

Al nova internacia lingva ordo

Aktoj de la 3-a Nitobe-Simpozio de Internaciaj Organizaĵoj

pri Lingvaj Problemoj en Internaciaj Rilatoj

25-26 julio 2004, Pekino, Ĉinio

Redaktita de: LEE Chong-Yeong kaj LIU Haitao

Towards a New International Language Order

Proceedings of the Third Nitobe Symposium of International

Organisations on Language Problems in International Relations

25-26 July 2004, Beijing, China

Edited by: LEE Chong-Yeong and LIU Haitao

迈向国际语言新秩序

国际关系中的语言问题

第三次国际组织新渡戶研讨会公报

2004年7月25－26日，中国北京

李種永 刘海涛 主编

Universala Esperanto-Asocio
Universal Esperanto Association
国际世界语协会
Rotterdam 2004

Copyright © 2004 Universal Esperanto Association
Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, The Netherlands

Cover design by Francisco L. Veuthey
Printed by Skonpres, Bydgoszcz, Poland

Library of Congress Cataloguing-in-Publication Data
Towards a New International Language Order /
edited by LEE Chong-Yeong and LIU Haitao
Papers and resolutions from the Nitobe Symposium on Language Problems in International Relations, 25-26 July, 2004. In English, Chinese and Esperanto.
1. Language policy. 2. Communication, international. 3. Language and Education.
4. Language and languages – political aspects. I. Lee, Chong-Yeong. II. Liu, Haitao.

ISBN 92 9017 085 9

Enhavtabelo • Table of Contents • 目录

Antaŭparolo 7
Foreword 8
前言 9
Tagordo de la Simpozio 10
Agenda of the Symposium 11
研讨会议程 12

Message du UNESCO Sous-Directeur Général 13
Message of UNESCO Assistant Director-General 15
Mesaĝo de la Asista Ĝenerala Direktoro de Unesko 17
联合国教科文组织教育副总干事的贺信 19
Rezolucio 21
Resolution 22
决议 23
Pekina Deklaro 24
Beijing Declaration 25
北京宣言 27

Malfermaj komentoj 28
Lingva egaleco en internaciaj rilatoj 31
La lingva Problemo en Ligo de Nacioj kaj NITOBE Inazô (1862-1933) 40
La celo kaj stato de la homa civilizacio 43
Principoj por komunikado ene de multlingva komunumo 49
Lingva egaleco sur la fono de lingva diverseco 55
Tradukservo ĉe Eŭropa Unio 66
Lingva egaleco en internaciaj rilatoj: la rolo de Ĉinio 68
Kunligu Esperanton al Monda Federalista Movado 76
La bahaa vidpunkto pri mondaj lingvaj problemoj 79
Al nova internacia lingva ordo 85

Opening Comments 92
Language Equality in International Relations 96
Nitobe Inazô (1862-1933) and the Language Problem in the League of Nations 106
The Aim and State of Human Civilization 109
Principles for Communication within a Multilingual Community 115
International Language Equality and Language Diversity 121
Translation Services at EU 133
Language Equality in International Relations: The Role of China 139
Esperanto and the World Federalist Movement 147
The Bahá'í View on World Language Problems 151
Towards a New International Language Order 159

开幕词 166
国际关系中的语言平等 168
国际联盟语言问题和新渡户稻造（1862-1933） 174
人类文明的目标与状态：语言文化的平等与多样化 176
欧盟多语种共同体的交往原则 180
论语言多样性背景下国际间的语言平等 184
有关欧盟的翻译工作情况 194
国际关系中的语言平等: 中国的作用 196
把世界语与世界联邦主义者运动联系在一起 205
巴哈论世界语言问题 208
为国际语言新秩序而努力 213

Kontribuintoj 218
Contributors 221
作者简历 224

Aneksaĵo – Annex – 附件

"Language Options in the European Union" 226

Antaŭparolo

LEE Chong-Yeong

Kunordiganto de la Nitobe-Simpozio

En 1921, antaŭ 83 jaroj de nun, D-ro NITOBE Inazô, Asista Ĝenerala Sekretario de Ligo de Nacioj, partoprenis la 13-an Universalan Kongreson de Esperanto en Prago, Ĉeĥio, kiel oficiala reprezentanto de la Ligo, la tiama plej altnivela interregistara monda organizaĵo. Poste, li submetis raporton al la Ĝenerala Sekretario de la Ligo, titolitan "Esperanto kaj la lingva demando ĉe Ligo de Nacioj". Li konkludis sian raporton dirante, ke "La aserto, ke la monda evoluo estas malhelpata de lingvaj baroj, ne estas simpla banalaĵo. Ĝi estas severa minaco al la paco… Ligo de Nacioj devus demandi: Ĉu internacia helplingvo eblas? Se ĝi eblas, kiom praktika ĝi estas? Se ĝi estas sufiĉe praktika, ĉu ĝi estas subteninda? Se jes, kion Ligo de Nacioj devas fari?"

Ligo de Nacioj, post longa kaj arda diskuto, ne akceptis lian raporton, kaj post du jaroj la Ligo decidis ne plu okupiĝi pri la demando de internacia lingvo. Sed 83 jarojn post lia raporto, la lingvaj politikoj kaj praktikoj de interŝtataj organizaĵoj fariĝis eĉ malpli bonaj kaj ankoraŭ devas respondi al ekzakte la samaj demandoj levitaj de li en lia raporto.

Memore al la klarvidaj demandoj levitaj de D-ro Nitobe, Universala Esperanto-Asocio okazigis specialan simpozion, "La Nitobe-Simpozio de la Lingvaj Problemoj de Internaciaj Organizaĵoj", 20-23 julio 1996, kadre de la 81-a Universala Kongreso de Esperanto en Prago, kun reprezentantoj de UN, Unesko, Eŭropa Parlamento kaj internaciaj neregistaraj organizaĵoj.

Ĉijare, profitante la 89-an Universalan Kongreson de Esperanto, kiu havis lokon en Pekino, Ĉinio, ni ankoraŭfoje okazigis specialan simpozion: "Nitobe-Simpozio pri la Lingvaj Problemoj en Internaciaj Rilatoj", 25-26 julio 2004, kun la mesaĝo de la Asista Ĝenerala Direktoro de Unesko, kaj partoprenoj kaj prelegoj de la reprezentantoj de Eŭropa Unio, Lingva Komisiono de la Ĉina Registaro, Bahaa Internacia Komunumo, Monda Federalisma Movado, kaj fakuloj pri lingvistiko. La prelegoj kaj diskutoj dum la simpozio estis en Esperanto, la angla kaj la ĉina, kun samtempa interpretado. Kvankam la partoprenantaj ne havis sufiĉan tempon por diskutado, la simpozio sukcesis adopti rezolucion por prezenti al UN, Unesko, EU kaj la ĉina registaro. Jen la raporto de la simpozio.

Mi dankas al ĉiuj prelegintoj, kiuj bone kontribuis al la simpozio. Specialan dankon al S-ro MIYOSHI Etsuo, prezidanto de Swany-Kompanio, Japanio, kiu finance subtenis la simpozion. Prof. Liu Haitao profesie kompilis la raporton.

Mi esperas, ke ĉi tiu raporto, kune kun tiu de la Nitobe-Simpozio 1996, fariĝos utila referencaĵo por tiuj kiuj serioze pensas pri la lingvaj problemoj en internaciaj rilatoj.

Foreword

LEE Chong-Yeong

Coordinator of the Nitobe Symposium

In 1921, Dr. Inazo Nitobe, Under-Secretary General of the League of Nations, participated in the 13th World Esperanto Congress in Prague, Czechoslovakia, as official representative of the League of Nations, then the highest world intergovernmental organization. Later he submitted a report to the Secretary General of the League, titled "Esperanto and the Language Question at the League of Nations". He concluded his report saying: "That the world's progress is impeded by linguistic barriers is a statement no longer despised as a platitude. It embodies a serious menace to the cause of peace.… The League may ask: Is an international auxiliary language possible? If possible, how far is it practicable? If sufficiently practicable, is it advisable to encourage it? If so, what should the League do?"

The League of Nations, after long and heated discussions, did not accept his report, and after two years, the League decided not to concern itself further with the question of international language. However, 83 years after his report, the language policies and practices of international organizations have become even worse and still have to answer the exact same questions raised by him in his report.

In memory of the clearly foreseen questions raised by Dr. Nitobe, the Universal Esperanto Association organized a special Nitobe Symposium on Language Problems in International Organizations, on 20-23 July 1996, during the 81th World Esperanto Congress in Prague, with representatives of UN, UNESCO, the European Parliament, and various international non-governmental organizations.

This year, taking advantage of the 89th World Esperanto Congress which took place in Beijing, China, we again organized a Nitobe Symposium on Language Problems in International Relations, on 25-26 July 2004, with a message from the Assistant Director General of the UNESCO, and participation and written presentations of representatives of the European Union, the Language Commission of the Government of China, the Bahá'í International Community, the World Federalist Movement, and linguistic experts.

Presentation and discussion during the symposium were in Esperanto, English and Chinese, with simultaneous interpretation. Although the participants did not have enough time for discussion, the Symposium succeeded in adopting a resolution for presentation to UN, UNESCO, EU and the Government of China.

I express my sincere thanks to all the speakers who made contributions to the Symposium. A special thanks are due to Mr. Etsuo Miyoshi for his financial support. Prof. Liu Haitao has done excellent work in compiling the report.

I hope this report, along with that of 1996, will be a useful reference for those who seriously consider language problems in international relations.

前 言

李種永

新渡户研讨会协调人

1921 年，时任国际联盟副秘书长的新渡戸稲造博士，作为那时世界政府间最高级别的国际组织－国联的正式代表，参加了在布拉格举行的第 13 届国际世界语大会。会后，他向国际联盟秘书长提交了题为“世界语以及国际联盟语言问题”的报告。在报告中，他是这样说的“语言障碍不利于世界的发展，这不是一件小事。它对和平是极大的威胁... 国际联盟可能会问：国际辅助语可行吗？如果可行，它的实践情况如何？如果它确实可用，值不值得支持它？如果值得，国际联盟应该做些什么？”

在漫长和激烈的讨论后，国际联盟没有采纳他的报告。两年后，国联决定不再考虑国际语问题。但是，在 83 年后的今天，国际组织中的语言政策和状况比那时还要槽糕，人们仍然面对着与新渡户报告中提出的完全相同的问题。

为了纪念新渡户博士提出的这些问题，国际世界语协会在第 81 届世界语大会期间，于 1996 年 7 月 20－23 日在布拉格专门召开了题为“国际组织中的语言问题”的新渡户研讨会，联合国、联合国教科文组织、欧洲议会和其它国际非政府组织的代表参加了会议。

今年的第 89 届国际世界语大会在中国北京召开，借此机会我们再次于 2004 年 7 月 25－26 日召开了题为“国际关系中的语言问题”的新渡户研讨会，联合国教科文组织的教育副总干事发来了贺电，来自欧洲联盟、中国国家语言文字委员会、巴哈国际组织、世界联邦主义者运动的代表和一些语言学家参加了会议并做了报告。研讨会的工作语言是世界语、英语和汉语，并有同声传译。由于时间关系，与会者未能就某些问题进行更进一步的讨论。研讨会成功通过了给联合国、联合国教科文组织、欧洲联盟和中国政府的决议。现在呈献给您的就是本次研讨会的论文集。

我感谢每一位演讲者的精彩报告。特别感谢日本 Swany 株式会社社长三好鋭郎先生对研讨会的资助。感谢刘海涛教授所做的文集编辑工作。我希望，这本文集能和 1996 年研讨会的文集一道成为有关国际关系语言问题的重要参考资料。

Tagordo de la Simpozio

24 julio 2004 (sabato)

17:00- Enkonduko de neesperantistaj simpozianoj al la interkona vespero de la 89-a UK

25 julio 2004 (dimanĉo)

10:00-12:00 Observa partopreno de neesperantistaj simpozianoj en la solena malfermo de la 89-a UK

La Simpozia Programo

Prezidanto: Prof. **Humphrey TONKIN**

14:00-14:10 Malferma saluto (Esp)
D-ro **Renato CORSETTI**, Prezidanto de UEA

14:10-15:00 (1) Lingva egaleco en internaciaj rilatoj (Esp)
Prof. **Humphrey TONKIN**, Univ. de Hartford

15:00-15:30 (2) Lingva problemo en Ligo de Nacioj kaj NITOBE Inazô (Esp)
D-ro **KOBAYASHI Tukasa**, JEI

15:30-15:40 Paŭzo

15:40-16:20 (3) La celo kaj stato de la homa civilizacio – egaleco kaj diverseco de lingvoj kaj kulturoj (ĉina)
S-ro **YANG Guang**, Ĝenerala Direktoro, Dept. de Lingva Planado kaj Administrado. Ŝtata Lingva Komisiono, Ĉinio

16:20-17:00 (4) Principoj por komunikado ene de multlingva komunumo kiel Eŭropa Unio (Esp)
S-ro **Michael CWIK**, Ekonomiisto, Eŭropa Komisiono (EC)

17:00-17:40 (5) La lingva egaleco internacie sur la fono de lingva diverseco (ĉina)
Prof. **SU Jinzhi**, Instituto de Aplikata Lingvistiko, Ŝtata Lingva Komisiono, Ĉinio

26 julio 2004 (lundo)

Prezidanto: D-ro **Renato CORSETTI**

09:00-09:30 (6) Traduka servo en Eŭropa Unio (angla)
S-ro **Noel MUYLLE**, Direktoro de Tradukservo, Eŭropa Komisiono

09:30-10:00 (7) Lingva egaleco en internaciaj rilatoj: la rolo de Ĉinio (Esp)
Prof. **LIU Haitao**, Komunikada Universitato de Ĉinio, Pekino

10:00-10:30 (8) Kunligu Esperanton al Monda Federalista Movado (Esp)
S-ro **MIYOSHI Etsuo,** Monda Federalista Movado

10:30-10:40 Paŭzo

10:40-11:10 (9) Bahaa vidpunkto pri la monda lingva problemo (angla)
S-ino **Kimiko SCHWERIN,** Bahaa Internacia Komunumo

11:10-11:40 (10) Al nova internacia lingva ordo (Esp)
D-ro **LEE Chong-Yeong**, UEA

11:40-12:30 La rezolucio de la simpozio: diskuto de la malneto kaj akcepto (Esp)

12:30-12:35 Fermo (Esp)

Agenda of the Symposium

24 July, 2004 (Saturday)

17:00- Informal introduction of the pre-congress activities of the World Esperanto Congress to the symposium participants

25 July, 2004 (Sunday)

10:00-12:00 Observatory participation of the symposium participants in the opening of the 89th World Esperanto Congress

The Symposium Programme

Chairman: Prof. **Humphrey TONKIN**

14:00-14:10 Opening Address (Esp)
Dr. **Renato CORSETTI**, President, Universal Esperanto Asocio

14:10-15:00 (1) Language Equality in International Relations (Esp)
Prof. **Humphrey TONKIN**, University of Hartford

15:00-15:30 (2) Language Problems at the League of Nations and Dr. NITOBE Inazô
Dr. **KOBAYASHI Tukasa**, JEI

15:30-15:40 Break

15:40-16:20 (3) La Objectives and the Status of Human Civilization: Equality in Diversity of Linguistic Culture (Chinese)
Mr. **YANG Guang**, General Director, Dept. of Language Planning and Administration, State Language Commission, China

16:20-17:00 (4) Principles for Communicating Within a Multilingual Community Like the European Union (Esp)
Mr. **Michael CWIK**, Economist, European Commission (EC)

17:00-17:40 (5) Linguistic Equality in Linguistic Diversity (Chinese)
Prof. **SU Jinzhi**, Institute of Applied Linguistics, State Language Commission, China

26 July, 2004 (Monday)

Chairman: Dr. **Renato CORSETTI**

09:00-09:30 (6) Translation Services at EU (English)
Mr. **Noel MUYLLE**, Director of Translation Service, EC

09:30-10:00 (7) Language Equality in International Rilations: The Role of China (Esp)
Prof. **LIU Haitao**, Communication University of China, Beijing

10:00-10:30 (8) Esperanto and the World Federalist Movement (Esp).
Mr. **MIYOSHI Etsuo**, World Federalist Movement

10:30-10:40 Break

10:40-11:10 (9) Bahai'i Views on World Language Problems (English)
Mrs. **Kimiko SCHWERIN**, Bahá'í International Community (BIC)

11:10-11:40 (10) Action for Agenda towards a New International Language Order (Esp)
Dr. **LEE Chong-Yeong**, Vice President, UEA

11:40-12:30 The Symposium Resolution: Discussion and adoption (Esp)

12:30-12:35 Closing (Esp)

新渡戸《国际关系中的语言问题》研讨会

2004-07-24 (星期六)
17:00-　　非世界语者的报告人参加国际世界语大会的相识晚会

2004-07-25 (星期天)
10:00-12:00　非世界语者的报告人作为观察员参加盛大的第89届国际世界语大会开幕式

研讨会议程
主持人: **Humphrey TONKIN** 教授

14:00-14:10　开幕词(世界语)
　　Renato CORSETTI 博士，国际世协主席
14:10-15:00　(1) 国际关系中的语言平等(世界语)
　　Humphrey TONKIN 教授, 美国哈特福德大学
15:00-15:30　(2) 国际联盟的语言问题和新渡戸稻造博士(世界语)
　　小林司 博士, 日本世界语学会
15:30-15:40　　休息
15:40-16:20　(3) 人类文明的目标和现状：语言文化的平等和多样性（汉语）
　　杨光 先生, 中国语言文字委员会语用司司长
16:20-17:00　(4) 多语联盟中的语言交际原则(世界语)
　　Michael CWIK 先生, 经济学家, 欧洲委员会(EC)
17:00-17:40　(5) 论语言多样性背景下国际间的语言平等（汉语）
　　苏金智 教授，中国语言文字委员会语言文字应用研究所

2004-07-26 (星期一)

主持人: **Renato CORSETTI 博士**

09:00-09:30　(6) 欧洲联盟内的翻译服务(英语)
　　Noel MUYLLE 先生, 欧洲理事会翻译服务部主任
09:30-10:00　(7) 国际关系中的语言平等－中国的作用（世界语）
　　刘海涛 教授, 中国传媒大学
10:00-10:30　(8) 世界语和世界联邦运动 (世界语)
　　三好銳郎 先生, 世界联邦主义者运动
10:30-10:40　　休息
10:40-11:10　(9) 巴哈教论世界语言问题 (英语)
　　Kimiko SCHWERIN 女士, 巴哈国际联盟
11:10-11:40　(10) 迈向国际语言新秩序 (世界语)
　　李種永 博士, 国际世界语协会
11:40-12:30　　讨论并通过会议决议 (世界语)
12:30-12:35　　会议闭幕(世界语)

Message du Sous-Directeur général pour l'éducation à l'occasion du Nitobe Symposium sur "**Les problèmes de langues dans les organisations Internationales**", Pékin 25-27 juillet 2004 (dans le cadre du 89ème congrès de l'Universala Esperanto Association-Asocio du 24 au 30 juillet 2004)

Thème : Langue, l'éducation pour la paix et la compréhension internationale

Je suis heureux de vous adresser mon message à l'occasion du 89ème congrès de l'Association universelle de l'espéranto. En effet, ce n'est pas la première fois que l'UNESCO s'associe à cet événement dont le thème aujourd'hui est : "Langue, l'éducation pour la paix et la compréhension internationale".

C'est un sujet qui figure parmi nos préoccupations d'autant plus que les objectifs de nos deux organisations convergent vers le même but : la paix dans le monde.

Le symposium se penche cette année sur les langues utilisées dans les organisations internationales dont l'UNESCO fait partie, et je peux vous assurer que nous suivrons avec intérêt les conclusions des travaux.

L'humanité possède comme patrimoine immatériel cet outil merveilleux qu'est la langue pour promouvoir le dialogue et la compréhension internationale. De ce fait, l'UNESCO n'a cessé d'oeuvrer pour préserver la diversité culturelle et linguistique et développer l'éducation multilingue à travers ses programmes et projets éducatifs.

La Déclaration universelle sur la diversité culturelle adoptée à l'unanimité à la 31ème session de la Conférence générale de l'UNESCO en 2001 témoigne de la volonté de ses Etats membres de promouvoir les langues comme véhicule de dialogue, de paix et de compréhension internationale.

Par ailleurs, dans le document cadre de l'UNESCO "L'éducation dans un monde multilingue" publié en 2003 dans les six langues de travail de l'Organisation, nous donnons une position claire quant à la politique linguistique à mener en matière d'éducation. Nous invitons nos Etats membres, et membres associés, à utiliser la langue maternelle comme langue d'enseignement dans le primaire. Par ailleurs, suite à la décision de la Conférence générale de l'UNESCO de proclamer une Journée internationale de la langue maternelle à sa 30ème session en 1999, cette Journée est célébrée tous les ans le 21 février dans les Etats membres et membres associés.

Ce document cadre a été traduit en langues locales dans certains pays et en le publiant, l'UNESCO souhaite contribuer aux idéaux de la paix en encourageant le développement de l'éducation multilingue. La reconnaissance de la diversité

linguistique est à l'origine de la décision de l'UNESCO de célébrer la Journée internationale de la langue maternelle tous les ans le 21 février.

De son côté, l'Association universelle de l'espéranto oeuvre également pour une utilisation toujours plus importante de l'espéranto dans le monde. En effet de par sa nature même de langue internationale commune et neutre par rapport aux langues naturelles, elle contribue largement à rapprocher les peuples et à soutenir les initiatives envers la diversité linguistique et culturelle pour la paix dans le monde.

Nos deux organisations continueront de conjuguer leurs efforts envers la compréhension mutuelle entre les peuples.

Je vous souhaite un excellent symposium et un congrès plein de succès.



John Daniel

Message of UNESCO Assistant Director-General on the Occasion of the Nitobe Symposium on "**Language Problems in International Organizations**", Beijing, July 25-27, 2004, (as a Part of the 89th Congress of the Universala Esperanto-Asocio, July 24-30, 2004)

Theme: Language and Education for Peace and International Understanding

I am pleased to send you a message on the occasion of the 89th Congress of the Universal Esperanto Association. In fact, it is not the first time that UNESCO is associating itself with that event, the theme of which today is "Language and Education for Peace and International Understanding."

That is a subject that figures among our concerns, all the more so because the objectives of our two organizations converge toward the same goal: peace in the world.

This year the symposium studies the matter of the languages used in international organizations, including UNESCO, and I can assure you that we will be following the conclusions of its work with interest.

Humanity possesses that marvelous tool language as an intangible heritage for promotion of international dialog and understanding. Because of that UNESCO has constantly worked to preserve cultural and language diversity and develop multilingual education through its educational programs and projects.

The Universal Declaration on Cultural Diversity, adopted unanimously at the 31th session of the General Conference of UNESCO in 2001, shows the will of its member States to promote languages as a vehicle of dialog, peace and international understanding.

Moreover, in the UNESCO framework document "Education in a Multilingual World," published in 2003 in the six working languages of the Organization, we set forth a clear position as regards the language policy to be applied in education. We invite our member States and associated members to use the mother tongue as the language of instruction in primary school. Furthermore, as a result of the decision at the 30th session of the General Conference of UNESCO in 1999 to proclaim an International Mother Language Day, that Day is celebrated every year on February 21 in the member States and associated members.

That framework document has been translated into local languages in certain countries, and in publishing it, UNESCO wishes to contribute to the ideas of peace by encouraging development of multilingual education. Recognition of language

diversity is the basis of UNESCO's decision to celebrate International Mother Tongue Day every year on February 21.

For its part, the Universal Esperanto Association also works for ever greater use of Esperanto in the world. In fact, by its very nature of a common language neutral with respect to natural languages it contributes considerably to bringing peoples closer together and to supporting initiatives toward language and cultural diversity for peace in the world.

Our two organizations shall continue to unite their efforts toward mutual understanding between the peoples of the world.

I wish you an outstanding symposium and a very successful congress.

(signed)

John Daniel

Mesaĝo de la Asista Ĝenerala Direktoro de Unesko okaze de la Nitobe-Simpozio kun la temo "**Lingvaj Problemoj en Internaciaj Organizaĵoj**" en Pekino de la 25-a ĝis la 27-a de julio 2004 (kadre de la 89-a Universala Kongreso de Esperanto de la 24-a ĝis la 30-a de julio 2004)

Temo: Lingvo kaj edukado por paco kaj internacia interkompreno

Mi ĝojas adresi al vi mian mesaĝon okaze de la 89-a Universala Kongreso de Esperanto. Efektive, ĉi tio ne estas la unua fojo, ke Unesko asocias sin al ĉi tiu evento, kies hodiaŭa temo estas "Lingvo kaj edukado por paco kaj internacia interkompreno".

Tio estas temo, kiu figuras inter niaj zorgoj, tiom pli ĉar la celoj de niaj du organizaĵoj konverĝas direkte al unu sama: paco en la mondo.

Ĉi-jare la Simpozio pritraktas la temon "Lingvoj uzataj en internaciaj organizaĵoj", inkluzive Uneskon, kaj mi povas certigi al vi, ke ni atentos kun intereso la konkludojn de ĝia laboro.

La homaro posedas kiel senmaterian heredaĵon tiun mirindan ilon, kiu estas lingvo, por antaŭenigi internaciajn dialogon kaj interkomprenon. Pro tio Unesko senĉese laboras por konservado de kultura kaj lingva diverseco kaj por evoluigo de plurlingva edukado per siaj edukaj programoj kaj projektoj.

La Universala Deklaro pri Kultura Diverseco, akceptita unuanime en la 31-a sesio de la Ĝenerala Konferenco de Unesko in 2001, atestas la volon de ĝiaj membro-ŝtatoj antaŭenigi lingvojn kiel vehiklon de dialogo, paco kaj internacia interkompreno.

Cetere, en la Uneska kadra dokumento "Edukado en plurlingva mondo", publikigita en 2003 en ĝiaj ses laboraj lingvoj, ni montras klaran starpunkton koncerne la lingvan politikon aplikotan en edukado. Ni invitas niajn membro-ŝtatojn kaj asociiĝintajn membrojn uzi la gepatran lingvon kiel la lingvon de instruado en la elementa lernejo. Krome, sekve de la decido de la Uneska Ĝenerala Konferenco en sia 30-a sesio en 1999 proklami la Internacian Tagon de la Denaska Lingvo, tiu tago estas celebrata en la membro-ŝtatoj kaj asociiĝintaj membroj ĉiujare la 21-an de februaro.

Tiu kadra dokumento estas tradukita en lokajn lingvojn en iuj landoj, kaj publikigante ĝin, Unesko esperas kontribui al la ideoj de paco per instigado de evoluigo de plurlingva edukado. Rekono de lingva diverseco estas la bazo de la decido de Unesko celebrigi la Internacian Tagon de la Denaska Lingvo ĉiujare la 21-an de februaro.

Siaflanke ankaŭ Universala Esperanto-Asocio laboras por pli kaj pli vasta kaj multa uzado de Esperanto tra la mondo. Efektive, ĝuste pro sia naturo de internacia komuna lingvo, neŭtrala rilate al "naturaj" lingvoj, ĝi konsiderinde kontribuas al alproksimigo de popoloj kaj al subteno de iniciatoj por lingva kaj kultura diverseco cele al mondpaco.

Niaj du organizaĵoj daŭrige kombinos siajn klopodojn cele al interkompreno de la popoloj de la mondo.

Mi deziras al vi elstaran simpozion kaj sukcesoplenan kongreson!

(subskribo)

John Daniel

联合国教科文组织教育副总干事给新渡户“国际关系中的语言问题”研讨会（2004 年 7 月 25 日至 26 日，本研讨会是第 89 届国际世界语大会的一部分）的贺信

主题：面向和平与国际理解的语言和教育

我很高兴有机会在第 89 届国际世界语大会召开之际向你们表示祝贺。事实上，这已经不是联合国教科文组织首次参与其事了，今天的主题是“面向和平与国际理解的语言和教育”。

这是一个我们大家都关心的问题，因为我们两个组织具有同样的目标：世界和平。

你们今年研讨会的主题是包括联合国教科文组织在内的国际组织中的语言问题。因此，可以肯定我们很有兴趣了解你们研讨会的结论。

语言作为一种无形资产，是人类的奇妙工具，它可以推进国际交流和理解。因此，联合国教科文组织一直致力于通过自己的教育程序和项目来保护文化和语言的多样性，推进多语教育。

2001 年，联合国教科文组织在自己的第 31 次全会上，一致通过了“文化多样性普遍宣言”。这表明其成员国推进语言作为对话、和平和国际理解工具的意愿。

随后，联合国教科文组织在 2003 年用六种工作语言发布了“多语世界的教育”的纲领性文件。在这个文件中，我们立场鲜明地表明了在教育系统中采用的语言政策的观点。我们请求成员国和其它成员在小学使用母语作为教学语言。在 1999 年召开的第 30 次联合国教科文组织全会上，将每年的 2 月 21 日确定为成员国和相关组织的“国际母语日”。

这一纲领性文件，已被一些国家翻译成了自己的语言。联合国教科文组织希望通过鼓励发展多语教育来促进和平。对语言多样性的认识是联合国教科文组织决定确定每年的 2 月 21 日为“国际母语日”的基础。

国际世界语协会正在寻求世界语更广泛、更多样的应用领域。事实上，世界语可凭借自己中立于‘自然语言’的共同语的天性，可以让人们靠的更近，可以为语言和文化多样性，为世界和平，做出更大的贡献。

我们两个组织将继续合作，为世界人民的相互理解而努力奋斗。

祝研讨会取得丰硕成果！祝大会圆满成功！

约翰·丹尼尔

Rezolucio

de la 3-a Nitobe-Simpozio pri Lingvaj Problemoj

en Internaciaj Rilatoj, 25-26 julio 2004, Pekino

La internaciaj partoprenintoj de la Nitobe-Simpozio pri Lingvaj Problemoj en Internaciaj Rilatioj, kiu havis lokon en Pekino, Ĉinio, 25-26 julio 2004,

– **konstatante,** ke demokratia kaj egalrajta lingva komunikado en internaciaj rilatoj estas esencaj por internacia interkompreniĝado kaj paca kunvivado surbaze de la egalaj lingvaj rajtoj, kaj

– **konstatante**, ke lingvaj homaj rajtoj estas esenca faktoro de internaciaj homaj rajtoj, kaj la nuna monda lingva ordo kiu estas regata de kelkaj aŭ unu dominaj etnaj lingvoj, malhelpas demokratiajn kaj egalajn lingvajn rajtojn, kaj

– **alte taksante** la favoran sintenon de la ĉina registaro por la egalaj internaciaj lingvoj rajtoj kaj por celi unuecon en diverseco de malsamaj kulturoj,

rezolucias:

1. **ke** serioza konsidero por establi novan internacian lingvan ordon estas necesa, kaj

2. **ke** Unuiĝintaj Nacioj diskutu pri la nuntempaj lingvaj problemoj en internaciaj rilatoj dum unu el siaj kunsidoj, kaj establu Porokazan (*ad hoc*) Laborgrupon pri Lingvaj Problemoj en Internaciaj Rilatoj por esplori la nuntempajn internaciajn lingvajn problemojn kaj rekomendi kiel plibonigi la nunan internacian lingvan ordon, kaj

invitas, specife:

1. la ĉinan registaron kaj la registarojn de la membro-ŝtatoj de Eŭropa Unio rekomendi al la Ĝenerala Sekretario de UN enmeti la temon "Lingvaj problemoj en Internaciaj Rilatoj" kiel tagorderon de unu el ĝiaj venontaj kunsidoj, kaj

2. ĉiujn internaciajn organizaĵojn, registarajn kaj neregistarajn asociojn agantajn en internaciaj rilatoj, apogi la proponon studi kaj organizi lingvajn eksperimentojn pri universala helplingvo por prepari justan kaj demokratian novan internacian lingvan ordon.

Resolution

of The Third Nitobe Symposium on Language Problems

in International Relations, 25-26 July 2004, Beijing

The international participants in the Nitobe Symposium on Language Problems in International Relations, which was held in Beijing, China, on July 25-26, 2004,

recognizing that democratic and egalitarian linguistic communication in international relations is essential for international understanding and peaceful coexistence on the basis of equal language rights, and

recognizing that linguistic human rights are an essential part of international human rights, and that today's world language order, which is controlled by at most a few dominant ethnic languages, hinders democratic and equal linguistic rights, and

highly valuing the favorable attitude of the Chinese government towards the goals of equal international language rights and towards unity in the diversity of different cultures,

resolves

1. that serious consideration of the establishment of a new international language order is necessary, and

2. that the United Nations discuss today's language problems in international relations at one of its meetings, and that it establish an Ad Hoc Working Group on Language Problems in International Relations to study today's international language problems and to recommend ways of improving the existing international language order, and

specifically invites

1. the Chinese government and the governments of the member-states of the European Union to recommend that the Secretary-General of the United Nations place the topic "Language Problems in International Relations" on the agenda of one of the forthcoming meetings of the United Nations, and

2. all international organizations, governmental and non-governmental, which play a role in international relations to support the proposal to study and organize linguistic experiments involving a universal auxiliary language to prepare a just and democratic new international linguistic order.

决 议

“国际关系中的语言问题”新渡户研讨会

北京，2004 年 7 月 25－26 日

2004 年 7 月 25 日至 26 日，在中国北京召开了“国际关系中的语言问题”新渡户研讨会，来自各国的与会者，

－**认为**国际关系中的民主和平等交流是在语言关系平等的基础上的国际间相互理解与和平合作的核心；

－**认为**语言人权是国际人权的核心组成部分，当今由几种或一种民族语占支配地位的世界语言秩序侵犯了民主、平等的语言权；

－**高度评价**中国政府对平等的国际语言权和文化多样性中统一性的支持；

决议：

1. 有必要认真考虑建立国际语言新秩序的问题；

2. 联合国应该在其会议中讨论当前国际关系中的语言问题，应该建立一个有关国际关系语言问题的专门工作组研究国际语言问题的现状并对目前的国际语言秩序提出改进意见。为此，

特别请求：

1. 中国政府和欧洲联盟成员国的政府向联合国秘书长建议在未来的联合国会议中将“国际关系中的语言问题”作为一项议程；

2. 所有活动在国际关系领域里的国际组织、政府间和非政府间的协会，支持研究和组织有关通用辅助语的语言学试验的方案，以便实现一个公正、民主的国际语言新秩序。

Pekina Deklaro

La 89-a Universala Kongreso de Esperanto, okazinta en Pekino, Ĉinio, de la 24-a ĝis la 31-a de julio 2004 kun 2031 partoprenantoj el 51 landoj,

traktinte la temon "Lingva egaleco en internaciaj rilatoj",

notante, ke la jaro 2004 markas 50 jarojn da oficialaj rilatoj inter UEA kaj Unesko,

memorante, ke rezolucioj de Unesko notis la rezultojn atingitajn per Esperanto sur la kampo de internaciaj intelektaj interŝanĝoj kaj por la proksimigo de la popoloj de la mondo kaj rekonis, ke tiuj rezultoj respondas al la celoj kaj idealoj de Unesko,

notante la "Raporton pri Homa Evoluigo 2004" de la Evoluiga Programo de Unuiĝintaj Nacioj, kiu asertas, ke la libereco de esprimado kaj la uzado de lingvo estas nedisigeblaj,

alte taksante la agadon de la ĉina registaro, kiu, cele al pli justa kaj diverseca aliro al internacia interkompreniĝo, subtenas la instruadon kaj utiligon de Esperanto, konforme al la spirito de la rezolucioj de Unesko,

DEKLARAS

ke demokratia kaj egalrajta komunikado en internaciaj rilatoj estas esenca por internacia interkompreno kaj paca kunlaboro surbaze de egalaj lingvaj rilatoj,

ke estas bezonata nova internacia lingva ordo, kiu garantiu egalecon, diversecon kaj demokration en lingvaj aferoj kaj efikan komunikadon inter nacioj kaj aliaj homgrupoj lingve malsamaj, ĉar en la nuna monda lingva situacio, kun kreskanta superrego de iuj lingvoj super aliaj, ne eblas realigi tiujn principojn,

ke neŭtrala komuna lingvo estu kerna elemento en tiu ordo, por atingi unuecon en diverseco inter la diversaj lingvoj kaj kulturoj je internacia nivelo,

ke sekve la internacia lingvo Esperanto, pruvinte dum pli ol cent jaroj sian utilecon kaj praktikecon, meritas seriozan konsideron fare de internaciaj organizaĵoj, ties membro-ŝtatoj kaj ĉiuj personoj kaj organizaĵoj de bona volo, kiuj respektas kaj deziras pacon kaj pacan kompreniĝon en egaleca etoso en nia hodiaŭa mondo,

ke por krei novan internacian lingvan ordon, kiu kontribuos al internacia kompreno kaj mondpaco, necesas forte subteni la enkondukadon de Esperanto en lernejojn, konforme al la spirito de la Unesko-rezolucioj, ĉar tio faciligas lingvolernadon ĝenerale kaj antaŭenigas internaciecan aliron al la mondo.

Beijing Declaration

The 89th World Esperanto Congress, meeting in Beijing, China, from 24 to 31 July 2004 with 2031 participants from 51 countries on the theme of "Linguistic Equality in International Relations",

noting that the year 2004 marks 50 years of official relations between UEA and UNESCO,

recalling that UNESCO resolutions have noted the results achieved through Esperanto in the field of international intellectual exchanges and for the rapprochement of the peoples of the world and have recognised that those results accord with the aims and ideals of UNESCO,

noting the "Human Development Report 2004" of the United Nations Development Programme (UNDP), which maintains that freedom of expression and the use of language are inseparable,

appreciating the steps taken by the Chinese government, which, with a view to a fairer and more diversified approach to international understanding, supports the teaching and use of Esperanto, in accordance with the spirit of the UNESCO resolutions, and

DECLARES

that democratic and egalitarian communication in international relations is essential for international understanding and peaceful cooperation on the basis of equality in linguistic relations,

that there is a need for a new international language order that will guarantee equality, diversity and democracy in language matters and effective communication between nations and other groups with different languages, since the current world language situation, with the increasing predominance of certain languages over others, makes it impossible to realise those principles,

that a neutral common language must be an essential element in that order, so as to achieve unity in diversity among the various languages and cultures at international level,

that consequently the international language Esperanto, having demonstrated its usefulness and practicality for over a hundred years, deserves serious consideration

on the part of international organisations, their member states and all individuals and organisations of good will who respect and desire peace and peaceful understanding in a spirit of equality in the world of today,

that to create a new international language order that will contribute to international understanding and world peace it is necessary to give strong support to introducing Esperanto into schools, in accordance with the spirit of the UNESCO resolutions, as that will facilitate language learning in general and promote an internationalist world view.

北京宣言

第 89 届国际世界语大会于 2004 年 7 月 24 日至 31 日在中国北京召开，来自 51 个国家的 2031 位世界语者参加了大会，就大会主题“国际关系中的语言平等”进行了讨论，

大会注意到，2004 年是国际世界语协会与联合国教科文组织建立正式关系 50 周年；

忆及，联合国教科文组织的决议记录了世界语在国际学术交流和促进各国人民互相接近方面取得的成果，并肯定这些成果符合联合国教科文组织的宗旨和理想；

注意到，联合国开发计划署在其《2004 年人类发展报告》中强调的言论自由和语言的使用是不可分割的这一论点，

高度评价中国政府以争取公正和多元的国际间相互理解为目的，支持世界语的教学和使用，认为这符合联合国教科文组织决议的精神；

宣告：

— 国际关系中的民主和平等交流是在语言关系平等的基础上的国际间相互理解与和平合作的核心；

— 国际语言新秩序是必要的，它应该为语言领域的平等、多样和民主以及不同语言的民族和人群之间有效的沟通提供保证，因为，在目前某些语言相对于其他语言的强势不断增长的世界语言形势下，上述这些原则无法实现；

— 为在国际水平上达到各种语言和文化多样性中的统一性，中立的共同语应该是国际语言新秩序的核心元素；

— 国际语—世界语在 100 多年的时间里证明了其实用性和使用价值，因此值得所有尊重并渴望在当今世界平等气氛下的和平与和平理解的国际组织及其成员国以及所有怀有善良愿望的组织和个人认真考虑；

— 为了建立促进国际间相互理解和世界和平的国际语言新秩序，有必要大力支持世界语进入学校，这符合联合国教科文组织的决议精神，因为它将使语言学习变得更加容易并能够加速世界的国际化。

Malfermaj komentoj

Renato CORSETTI

Prezidanto de Universala Esperanto-Asocio

Estas por mi honoro kaj plezuro diri kelkajn vortojn je la malfermo de la Simpozio, kiu portas la nomon de Nitobe Inazô.

Unue mi sentas la devon danki ĉiujn ĉeestantojn, kiuj bonvolis honorigi Universalan Esperanto-Asocion per sia veno ĉi tien, kaj mi volas danki la ĉinajn instancojn, la Lokan Kongresan Komitaton kaj la japanajn financajn subtenantojn, kaj registarajn kaj individuajn, kiuj ebligis la okazigon de ĉi tiu simpozio en la kadro de la 89-a Universala Kongreso de Esperanto en Pekino. En ĉi tiu kunteksto mi ne povas forgesi la ĉefan organizanton de la tuto, la animon de niaj simpozioj honore al Nitobe Inazô, la vic-prezidanton kaj iaman prezidanton de Universala Esperanto-Asocio, Lee Chong-Yeong. Li, kiel iama funkciulo de internaciaj registaraj organizaĵoj de la UN-familio, evidente sentas sin tre proksima al Nitobe Inazô, same kiel li aziano kaj same kiel li laboranta en internacia organizaĵo.

Post ĉi tiuj tute enkondukaj vortoj, bonvolu permesi al mi iom daŭrigi pri la temo, pri kiu ni hodiaŭ kunvenis ĉi tie.

Ofte homoj demandas sin, kaj foje eĉ demandas parolantojn kaj favorantojn de la internacia lingvo Esperanto, kio finfine estas ĉi tiu lingvo kaj kial seriozaj kaj plenkreskaj homoj okupiĝas pri ĉi tiu ludo, pri neekzistanta lingvo?

Cetere, se la demandinto scius, ke pluraj el tiuj parolantoj de la internacia lingvo foje elspezas sian tutan tempon, energion kaj monon favore al ĝi, ke tra la historio pluraj suferis eĉ pli drastajn sekvojn kiel malliberiĝon kaj morton, tiu homo dubus eĉ pli.

Ekzistas pluraj respondoj, kompreneble, ĉar Esperanto estas lingvo kaj ĝi signifas malsamajn aferojn por malsamaj homoj, sed ekzistas unu kerna respondo: oni okupiĝas pri Esperanto, ĉar oni estas milda kaj paca okupiĝanto pri lingvoj kaj kulturoj sed kun tre forta, obstina, foje mania, sento pri justeco en internaciaj rilatoj.

Justeco kaj egaleco inter la homoj kaj la popoloj estas la rokoj, kiuj estas la bazo de nia tuta konstruaĵo.

Ne necesas, kompreneble, esti parolanto de Esperanto por favori justecon kaj egalecon. La doktoro Nitobe Inazô estis konata ekzemplo de tia homo, kaj ekzistas multaj aliaj, ekzemple la partoprenantoj en ĉi tiu simpozio.

Sed bedaŭrinde tiu mensostato ne ŝajnas esti generala en la mondo kaj ĝi eĉ ŝajnas iĝi pli kaj pli malmoda, en ĉi tiu periodo en kiu postmoderneco akiras pli kaj pli la konturojn de antaŭmoderneco, de la eŭropa Mezepoko, en kiu forto, perforto kaj fortaj regantoj havis ĉiujn rajtojn kaj la normalaj homoj rajtis nur obei. Nun, kontraste kun la Mezepoko, oni rajtas ankaŭ rigardi la televidon.

Tio, la rego de forto, estas vera je pluraj niveloj kaj ankaŭ je la internacia nivelo. Neniam kiel nun la formoj de internacia organiziĝo, kiuj komenciĝis je la tempo de Nitobe Inazô, estas malfortaj kaj intence malfortigataj de ŝtatoj, kiuj sekvas sian imperian logikon je monda nivelo.

Certe estas eble en la homa naturo provi regi aliajn kaj preni la maksimuman eblan profiton al si mem, sendepende de moralaj, etikaj, ideaj konsideroj. Sed mi kredas ke en la homa naturo estas ankaŭ samtempe aspiro al la belo, al la bono, al la justo. Hodiaŭ ni en ĉi tiu salono estas ĉi tie pro tiu aspiro. Kvankam la afero povus ŝajni al vi iom troa, nia kunveno estas nenio alia ol konkreta, eble malgranda, malgrava kaj neatentata, ero en la serio de bataloj, kiuj okazas en la mondo inter la volo aranĝi ĉion per forto kaj la klopodo aranĝi ĉion per justeco.

Tiu sama klopodo apartenas al ĉiuj internaciaj interŝtataj organizaĵoj, almenaŭ laŭ la statutoj, laŭ la solenaj fondo-deklaroj kaj laŭ la deziro de la fondintoj. Ni ne povas forgesi, ke ekzemple en Eŭropo, malantaŭ la eŭropaj interŝtataj interkonsentoj, kiuj laŭgrade portis al la nuna integriĝo, staris multaj gigantaj politikaj homoj, universale respektataj, kiuj provis krei ion, kio reagu al la dua mondmilito, en kiu perforto produktis tiajn sekvojn en maniero, pri kiu homoj hontos dum jarcentoj.

Sed bedaŭrinde dum parto de la homaro hontos pri la sovaĝeco de tio, kio okazis dum la dua mondmilito, alia parto ŝajne jam forgesis ĝin kaj iras la saman vojon. Ĉi-foje la scenejo estas eĉ pli ol tiam vere la tuta mondo.

La parolantoj de la internacia lingvo Esperanto dum la tuta pasinta jarcento agis en la mezo de militoj kaj internaciaj streĉaj rilatoj per klopodo revenigi la homaron al sentoj de toleremo, de rekono de malsameco, de provo interkompreniĝi kaj kompreni la motivojn de la alia flanko.

Tia estas nia historio kaj pri ĝi ni fieras.

Armitaj per tiu fiero, ni kuraĝas ankaŭ en la nunaj malfacilaj kondiĉoj eniri la mondon kaj diri ke ni ne ŝatas la manieron postmodernan aŭ prefere prahistorian laŭ kiu oni provas aranĝi la internaciajn rilatojn.

Nia baza kredo estas, ke homoj naskiĝas egalaj.

Ĉu tio ne estas io, kio estas skribita en la bazaj leĝoj de multaj landoj, ankaŭ de tiuj, kiuj kredas havi la rajton deklari kiu alia lando estas bona kaj kiu "kanajla"? Ĉu tio ne estas skribita en la deklaracio de homaj rajtoj, kiu estas ĉiumomente tretata de la samaj, kiuj plej laŭte parolas pri ĝi?

Se homoj naskiĝas egalaj, ankaŭ homaj grupoj, gentoj, popoloj, nacioj estas egalaj sendepende de sia riĉeco, haŭt-koloro, kulturo aŭ lingvo. Ni estas la ĉampionoj de ĉio tia. Ni firme kredas ke en ĉiu kulturo estas almenaŭ io, kio havas universalan valoron. Ni firme kredas, ke kondamni kulturojn kaj popolojn al malapero ĉar oni opinias ilin subevoluintaj, malsuperaj, maltaŭgaj por la moderna mondo ktp, estas simpla krimo.

Estas vere, ke homoj, en la lastaj jarcentoj fakte ĉefe eŭropanoj, provis ĉiurimede "savi" malsuperajn popolojn kaj malsuperajn kulturojn tra la mondo. Sed tio ne estu preteksto por daŭrigi nun tiun eraran konduton, kiu portis kune kun iom da bono multajn suferojn.

En la kampo lingva kaj kultura, kiu estas nia kampo en ĉi tiu kunveno, okazas precize la samo, kio okazas en la pli ĝenerala kampo: oni forigas ĉion, kio ne

kongruas kun la imperia modelo, kaj oni laŭgrade forigas ĉiujn lingvojn favore al la lingvo de la monda imperio. Alivorte unu kulturo kaj unu lingvo estas la gravaj. Ĉio cetera pereu.

Kontraŭ ĉi tiu logiko la tuta movado por Esperanto agis, agas kaj agos, same kiel mi mem persone. Ne temas pri tio, ke ni estas "kontraŭ la angla" aŭ "kontraŭ Usono". Ni estis kontraŭ la franca en la tempo de Nitobe Inazô kaj ni estos kontraŭ la araba, kiam venos ĝia momento iĝi la imperia lingvo. Ni estas por egaleco de ĉiuj lingvoj kaj de ĉiuj kulturoj kaj, sekve, por la uzo de neŭtrala internacia lingvo.

Ni ne estas naivaj, kiaj ofte oni vidas nin. Ni scias ke la rilatoj kulturaj kaj lingvaj estas nur reflekto de la rilatoj ekonomiaj/politikaj/potencaj inter landoj kaj popoloj. Se Marx ne estus mortinta, li dirus ke ni bone konscias pri la relativa graveco de strukturo kaj superstrukturo.

Pro tio ni estas grandaj favorantoj de internaciaj organizaĵoj, ĉar ni pensas ke nur el tiuj povas veni kontraŭstaro al la imperia logiko de la fortuloj de la momento. Tiu sama naiveco apartenis al Nitobe Inazô, kies tuta agado, ankaŭ preter la okupiĝo pri Esperanto en Ligo de Nacioj, pivotis ĉirkaŭ la serĉo de bonaj, pacaj kaj egalecaj rilatoj inter la popoloj de la mondo.

Pro tio ni estas inter la plej fervoraj disvastigantoj de la iniciatoj de Unesko, inter la plej fervoraj subtenantoj de la unuiĝo de Eŭropo, inter la plej fervoraj subtenantoj de proponoj refortigi Unuiĝintajn Naciojn.

Ni kuraĝas pensi, ke nia propono en la kampo lingva-kultura, la uzo en internaciaj rilatoj de lingvo, kiu ne donas avantaĝon al iu ajn, estas propono atentinda ĉefe fare de internaciaj organizaĵoj, se ili volas savi sin mem de la destino, kiu atendas ilin, kaj kies komencajn antaŭsignojn oni jam povas vidi, iĝi ne organizaĵoj de popoloj liberaj kaj egalaj sed iloj por transdoni al la malfortaj ŝtatoj en jure akceptenda maniero la deziron de la fortuloj de la momento. Permesu al mi memorigi la destinon de la "Latina Ligo", la ligo de la popoloj de la regiono ĉirkaŭ Romo, en kiu mi vivas. Ĝi akceptis Romon kaj ĝi akceptis ĝian logikon. La tiamaj membroj de tiu Ligo, kiel la nunaj ŝtatoj-membroj de UN, pensis, ke ili povos vivi kiel egaluloj kun pli potenca ŝtato "dum la ĉielo kaj la tero restos en siaj respektivaj lokoj", kaj ĝuste tiun solenan formulon ili skribis en unu el la interkonsentoj. Sed malgraŭ la solena formulo, la akcepto de Romo kaj la laŭgrada agnosko, ke ĝi estas pli potenca kaj do ĝi rajtas decidi pli ol la aliaj, estis la fino de la Ligo mem kaj de la popoloj reprezentataj en la Ligo. Pri tiuj popoloj restis eĉ ne la memoro.

Pro tio des pli ni kuraĝas pensi, ke la nunaj internaciaj organizaĵoj devus esti kuraĝaj kaj rifuzi la logikon de perforto. Ni pensas, ke ili devus akcepti la fakton, ke la internacia lingvo Esperanto kaj la parolantoj de tiu lingvo estas la plej sinceraj apogantoj de ilia agado, ke la uzo almenaŭ eksperimenta de Esperanto montros, ke tiuj organizaĵoj estas sendependaj kaj pensas pri la bono de la tuta homaro.

En tiu spirito mi aparte bonvenigas la reprezentantojn de internaciaj organizaĵoj, kiuj estas hodiaŭ inter ni, kaj mi certas ke la kleraj parolantoj, kiuj parolos post mi, donos al ili kaj al ni ĉiuj multajn ideojn, kiuj povos esti bazo kaj por pliaj ideoj kaj por plua agado.

Lingva egaleco en internaciaj rilatoj

Humphrey TONKIN

Universitato de Hartford

1. Esperanto: lingvo preta por la internacia vivo

Novaj komunikrimedoj kutime havas samtempe vastigan kaj malvastigan efikon. Kiam en Eŭropo oni eltrovis la sistemon de presado per moveblaj literelementoj (presadon oni jam eltrovis en Ĉinio, sed ne havis je sia dispono alfabetan skribsistemon), la malaltiĝo de la kostoj de reproduktado de tekstoj ebligis la kreskon de lokaj metropolaj merkatoj kaj sekve la uzon de ties lingvoj (anstataŭ la latina, ĝis tiam kutime uzata por kopiitaj manuskriptoj). Samtempe, tamen, tiuj reproduktaĵoj disvastiĝis en la internojn de la koncernaj landoj, forpuŝante kaj malgravigante la pure lokajn lingvojn. Rezulte, do, tekstoj en la diversaj naciaj lingvoj multiĝis dum la influo de la unuecigita, internacia latina falis – sed la kresko de naciaj lingvoj ankaŭ alportis ŝrumpon ĉe la alia fino de la gamo, al marĝenaj lokaj lingvoj.

Kiam en la deknaŭa jarcento oni revoluciis transportajn sistemojn, industriigis la militarton, kaj kreis unue la telegrafion kaj poste la telefonion, difinita parto de la homoj prosperis, dum aliaj – la industriaj laboristoj, kaj nepre la enloĝantoj de la koloniitaj landoj – restis forŝlositaj de tiu prospero. La homoj pli multe vojaĝis kaj interkontaktiĝis, ĉu pro komerco ĉu por serĉi laboron. Ankaŭ la internacia lingva situacio profunde ŝanĝiĝis – kaj en nordorienta Eŭropo granda viziulo, Lazaro Ludoviko Zamenhof, ano de tiu burĝa klaso, kiu ekfortis en tiu periodo, fronte al la frustriĝo, kiun spertis liaj ĉiam pli vojaĝantaj samklasanoj antaŭ la lingvodiverseco, kreis la Internacian Lingvon, kiun ni hodiaŭ uzas en tiu ĉi salono.

En la 1980-aj kaj 1990-aj jaroj aperis la Interreto, la Tut-Tera Teksaĵo. Ĝia tutmondeco abolis la distancojn kaj ignoris la geografiajn lingvajn diferencojn, tiel ke la angla lingvo, jam fortiĝanta kompare kun la aliaj grandaj lingvoj, fariĝis senkonteste la plej uzata kaj plej lernata lingvo de la mondo. Tamen, samtempe la parolantoj de malgrandaj lingvoj eltrovis unu la alian, kaj pere de malmultekostaj retpaĝaroj kaj retlistoj, kreis senprecedencajn kunlaborajn ligojn. Precipe Esperanto, tiu plej internacia, sed samtempe malgranda lingvo, ĝuis kaj ankoraŭ ĝuas mirindajn avantaĝojn, pli kaj pli ekspluatatajn por disvastigo de lernmaterialoj, perfektigaj tekstoj kaj agadoj, kaj organizaj helpiloj. Kvankam tiu revolucio ne estas konstatebla en la kadro de tradicaj organizaj strukturoj kiel Universala Esperanto-Asocio, aŭ en tradicia eldonado, aŭ en lokaj enklasaj kursoj, nepre okazis granda ekspansio de la nombro de homoj, kiuj lernas Esperanton kaj ĝin uzas – precipe senpere, neorganizite, preskaŭ senspure. Unu el la grandaj defioj, kiuj kuŝas antaŭ la hodiaŭa Esperanto-movado, estas la demando, kiel plej bone utiligi la novajn rimedojn por disvastigi la lingvon kaj profili ĝin en la vido de la ekstera publiko.

La kontraŭdiroj de la ĉiam progresanta internacia komunikado havis sian efikon ĉe Esperanto tra ties tuta historio. Antaŭ preskaŭ cent jaroj, la esperantistoj okazigis sian unuan Universalan Kongreson en Bulonjo-ĉe-Maro en Francio en 1905. Ili atingis Bulonjon plejparte per trajnoj, kaj parte per vaporŝipoj – inventaĵoj de la antaŭa jarcento, kiuj tiel ebligis la kunveniĝon de la homoj en unu loko, kie ili povis utiligi la konversacian lingvon, streĉi ĝin kaj ekspansiigi ĝin. Tiu konversacia lingvo rapide fariĝis fleksebla, kaj plene internigita ĉe la plej kapablaj uzantoj, pro tio, ke ili relative facile povis renkontiĝi, eĉ trans la landlimoj kaj lingvolimoj, dank' al la moderna transportado.

Jam en la fruaj tagoj de Esperanto, la nove kreita reto de rapida internacia poŝto (la Universala Poŝta Unio estis fondita en 1875; Esperanto publikiĝis en 1887) ebligis rapidan interŝanĝon de mesaĝoj, kaj sekve rapidan starigon de lingvaj normoj ĉe Esperanto. Do, en la komenco la skriba lingvo prosperis dank' al la nova poŝto, kaj la parola lingvo antaŭeniris dank' al la faciliĝo de transportado de homoj. Sen tiuj faciligoj, estas apenaŭ kredeble, ke la lingvo tiel rapide kaj efike stabiliĝus strukture kaj vastiĝus leksike kaj alimaniere.

2. Preta, sed ankoraŭ ne disvastiĝinta

Sed la fakto, ke tiu neŭtrala lingvo, kiu rolis kiel ponto inter la homoj de diversaj lingvaj originoj, maturiĝis tiel rapide *kiel lingvo* neniel signifis, ke ĝi ankaŭ maturiĝus kiel movado. Aŭ, pli precize, la fakto, ke ĝi plene realigis la revon de sia kreinto kiel instrumento de komunikado, ne aŭtomate kaŭzis ĝian disvastiĝon. Ĝi montriĝis lingve plene fleksebla kaj funkcikapabla; kaj ĝi starigis novan egalecon inter la parolantoj de malsamaj gepatraj lingvoj, tiel ke, uzante Esperanton, unu partio ne dominis la alian, nek submetiĝis al la lingva prefero de la alia. Unuflanke, la lingvo jam staris preta por vasta internacia aplikiĝo; aliflanke, la nombro de uzantoj restis relative malalta. Kvankam la movado por Esperanto tuŝis plurajn gravajn intelektajn fluojn de la dudeka jarcento (de strukturismo ĝis la movado por alfabetigi la ĉinan lingvon), ĝi ne sukcesis havigi al si multan internacian influon. Pedagogoj donis al ĝi malmultan atenton, registaroj ne interesiĝis pri ĝia disvastigo, doktaj akademianoj ne proponis ĝian tujan aplikon: la fakto, ke ĝi estis bazita sur principoj de lingva egaleco, malmulton diris por ekzemple persvadi la registarojn ĝin utiligi. Kiam oni proponis ĝian uzon en Ligo de Nacioj, venis tre favora raporto de la japana Asista Ĝenerala Sekretario Nitobe Inazô, sed la ŝtatoj-membroj, ĉefe sub influo de Francio, ne donis al ĝi sufiĉan apogon, kaj la franca kaj angla restis la oficialaj laborlingvoj de la Ligo. Verdire, la diplomatoj en Ĝenevo plejparte kapablis paroli unu el tiuj du lingvoj: ili ja estis elektitaj de siaj registaroj sur tiu bazo. Kvankam evidente tiuj lingvoj avantaĝis siajn denaskajn parolantojn, tiu malegaleco estis malpli peza ol la supozata peza tasko lerni tute novan lingvon, nome Esperanton, nur por havi egalecon.

Se temis pri la francoj, ili sen granda entuziasmo submetiĝis eĉ al utiligo de la angla lingvo en Ĝenevo. Ĝis antaŭ la packonferenco en Versajlo en 1919, la franca estis vaste rekonata kiel la lingvo de la diplomatio: ĝi estis normale uzata en la rilatoj inter ŝtatoj. Jam ĝis la komenco de la jarcento, ĝi perdadis iom post iom sian influon

sur aliaj terenoj, precipe la komerco, kie la angla lingvo daŭre vastigis sian uzon, parte pro la elstara forteco de la brita ekonomio kaj parte pro la kreskanta potenco de Usono. En Versajlo, du ĉefaj rolantoj ne parolis la francan – la brito Lloyd George, kiu troige emfazis sian originon kiel homo de la popolo sen aparte bona eduko, kaj la usonano Woodrow Wilson, kiu ŝajne malmulte lernis la francan en la lernejo. Pro ilia insisto, ankaŭ la angla estis uzata, apud la franca – kaj tiu nova gajno de la angla transportiĝis al la lingva reĝimo de Ligo de Nacioj, kie oni decidis uzi t.n. sinsekvan interpretadon ambaŭdirekte inter la angla kaj la franca. La francoj evidente supozis sian lingvon sufiĉe forta por rezisti pliajn forfrotojn de ĝia pozicio, sed ilia rifuzo kompromisi, ekzemple per almenaŭ konsidero de la meritoj de Esperanto, esence lasis la anglan libera plivastigi sian influon.

Kiam post la Dua Mondmilito fondiĝis la organizaĵo Unuiĝintaj Nacioj, ekzistis denove, laŭ ies opinioj, reala eblo, ke UN elektu neŭtralan lingvon, sed la teknologia progreso diktis alimaniere: la elkreo de nova sistemo de samtempa interpretado, per interpretistaj ĉeloj, drataj kontaktoj, kaj kapaŭdiloj, ebligis akcepton eĉ de kvin-ses diversaj lingvoj, tiel ke la lingvoj de la venkintoj en la Mondmilito – la angla, ĉina, franca, rusa, kaj ankaŭ la hispana – fariĝis egalrajtaj en la Ĝenerala Asembleo. Denove temas pri teknologia eltrovo, kiu samtempe faciligis diversiĝon kaj fortigis la plej fortajn. Parte pro tio, ke la grandaj potencoj estis kontentigitaj de la nova reĝimo, jam en la unuaj jaroj de UN Universala Esperanto-Asocio, malgraŭ siaj klopodoj, ne sukcesis kapti la atenton de tiu organizaĵo per sia pli malmultekosta kaj pli efika lingva rimedo. UN je frua stadio transdonis la demandon pri Esperanto al la nove fondita organo pri edukado, scienco kaj kulturo, Unesko, tiel liberigante sin de problemo, kiun ĝi preferis ne trakti.

En 1954, antaŭ precize kvindek jaroj, Unesko rezoluciis favore al Esperanto – kiel lerninda objekto kaj kiel movado apoga al la celoj kaj idealoj de Unesko mem, sed nepre ne kiel lingvo uzinda kiel komunikilo en internaciaj organizaĵoj: pri tiu alta celo la esperantistoj eĉ ne pledis kaj Unesko restis silenta. La rezolucio de Unesko en la Ĝenerala Konferenco en Montevideo en 1954 malfermis vojon al formalaj kontaktoj inter UEA unuflanke kaj Unesko kaj poste Unuiĝintaj Nacioj aliflanke, sed neniel temis pri konkreta decido utiligi Esperanton en la laboro.[1] Regis ĉe ambaŭ organizaĵoj hegemonio de la grandaj lingvoj – sed hegemonio akceptebla, eĉ se ne tre konvena, al la denaskaj parolantoj de aliaj lingvoj. La esperantistoj, malgraŭ siaj insistaj klopodoj, ne sukcesis konvinki la gvidantojn de tiuj organizaĵoj eĉ elprovi la lingvon, malgraŭ tio, ke ĝi esence pretis por elprovo, ke longperspektive ĝi estus nepre malpli kosta (kaj verŝajne pli efika) ol la solvo per ses diversaj lingvoj,[2] inter kiuj necesis interpreti kaj traduki, kaj ankaŭ, ke utiligo de unusola, sed neŭtrala lingvo draste faciligus la interhomajn rilatojn.

La problemo kuŝas en tio, ke lingva egaleco ŝajnas al multaj homoj logika kontraŭdiro. Lingvoj, laŭ tiuj homoj, estas armiloj en konkurenco inter la nacioj: pro

---

[1] Pri la signifo de la rekono de Esperanto flanke de Unesko, vidu mian analizon: Humphrey Tonkin, "De Montevideo al Sofio: Esperanto antaŭ Unesko kaj Unesko antaŭ Esperanto" en Lee Chong-Yeong, red., *Esperanto en la 21-a jarcento.* (Seoul: Korea Esperanto-Asocio, 2001): 277-301.

[2] La araba estis aldonita kiel lingvo de la Ĝenerala Asembleo en 1973.

tio, ke ili estas ligitaj al difinitaj geografiaj regionoj, difinitaj ŝtatoj, kaj parolataj de difinitaj homoj en difinitaj medioj, ili estas esprimiĝoj de tiuj homoj, neniel kapablaj (laŭ tiuj skeptikuloj) krei egalecon inter homoj – kiuj ja esprimas sin diversmaniere.… Kaj se oni difinas la fenomenon lingvo laŭ difinoj geografiaj kaj politikaj, tiam lingvo sen geografia bazo, sen politika identiĝo, estas simple neebla. Sekve, Esperanto ne ekzistas. Kaj sekve (por eldiri la absurdan version de tia argumento) la esperantistoj eltrovis manieron lingve komunikiĝi sen uzi lingvon!

3. Ekstrema lingva diverseco kiel malhelpo al egaleca solvo

La decido de Francio en la 1920-aj jaroj apogi la propran lingvon kaj malhelpi ĉiun ajn diskuton pri Esperanto, kvankam ĝi estis esprimita surbaze de kulturaj argumentoj (ke Esperanto, farita arte anstataŭ "nature" – kion ajn tio signifu – ne estas "vera" lingvo), estis pure politika. Se oni deiras de la premiso, ke la solaj veraj lingvoj en la mondo estas tiuj ligitaj al ŝtatoj, oni neeviteble malfermas sin al situacio, en kiu la diversaj naciaj lingvoj interkubutumas por amasigi al si influon. La ekonomie plej forta (ne la kulture plej forta: la francoj ĉiam misgvidis sin mem pri tiu punkto) havas pli grandan ŝancon de sukceso – kaj ju pli dividita la opozicio al tiu hegemonio, des pli facile ĝi antaŭeniras.

Tio estis precize la situacio de la angla lingvo, kiu malrapide sed insiste gajnis kontraŭ la franca. Kvankam post la Dua Mondmilito la franca imperio ankoraŭ restis, kaj kvankam Francio venkis kontraŭ la germanoj, ĝia ekonomio apenaŭ povis konkurenci kun tiuj de Usono kaj eĉ, en la frua periodo, Britio. Post la Unua Mondmilito, la francoj devis akcepti utiligon de la angla; post la Dua ili devis akcepti la utiligon en la Ĝenerala Asembleo eĉ de kvar kaj poste kvin aliaj lingvoj. La franca tenis sian pozicion en la sekretariato de UN, kie ĝi estas unu el du laborlingvoj, sed ankaŭ tie oni vidas daŭran falon de ĝia influo kaj kreskon de la influo de la angla, interalie pro la granda nombro de novaj kaj malnovaj ŝtatoj-membroj, kiuj uzas la anglan kiel oficialan registaran lingvon. En la jaro 2000, nur kvar lingvoj estis uzataj de pli ol 10 membroj: la angla, la franca, la araba kaj la hispana. El tiuj, 74 uzis la anglan, pli ol por ĉiuj tri aliaj lingvoj kune – nome 25 la francan, 19 la araban, kaj 18 la hispanan.[1] La nombro de la dokumentoj ĉe UN kaj Unesko (kaj en Eŭropa Unio) verkitaj originale en la angla (kontraste al aliaj lingvoj) daŭre kreskas.

Dum restis du ĉefaj lingvoj en la internaciaj rilatoj – la franca kaj la angla, almenaŭ la du rivaloj estis klare markitaj. Kiam post la Dua Mondmilito venis kvar aliaj lingvoj al pozicio de relativa potenco en UN, la disdivido de la lingva reĝimo lasis la anglan pli libera fortigi sian pozicion: ju pli dividita la cetero, des pli forta la plej forta lingvo, kaj des pli libera antaŭenigi sian influon. La malpli fortaj "grandaj" lingvoj – la franca, la rusa, la ĉina, la hispana, la araba – tiel diligente laboris por konservi sian propran pozicion kontraŭ la ankoraŭ malpli fortaj, ne rekonitaj lingvoj, ke ili forgesis komune bridi la plej fortan. Tiel, dum la aliaj konkurencis inter si, la

[1] Tove Skutnabb-Kangas, *Linguistic Genocide in Education – Or Worldwide Diversity and Human Rights?* Mahwah, NJ: Erlbaum, 2000: 300. En kelkaj kazoj (ekzemple Kanado) pli ol unu el tiuj lingvoj estas uzataj de difinita registaro.

angla daŭrigis sian kreskon, ĉefe en la neformalaj interagoj, kie ne regis la formalaj reguloj.

Tiu disvastiĝo de la angla estas rekonebla sur ĉiuj aliaj terenoj. Kvankam la ĉina estas la monda lingvo plej uzata kiel gepatra lingvo (ĉirkaŭ 1,2 miliardoj – sed kun granda diverseco de uzo[1]), kaj kvankam nur unu triono de tiu nombro parolas la anglan kiel gepatran, ekzistas granda nombro de uzantoj de la angla kiel unu el la lingvoj en ilia repertuaro (do, kun relativa flueco), kaj eĉ pli granda nombro (eble ĝis miliardo) de homoj, kiuj uzas aŭ lernas ĝin kiel fremdan lingvon. Eĉ se oni akceptas la fakton (jam bone konatan al esperantistoj), ke tiaj statistikoj estas profunde nefidindaj, oni ne povas eskapi la realon, ke la angla lingvo kaptis dominan pozicion en la internacia lingva uzado. La franca ankoraŭ havas grandan nombron de homoj, kiuj uzas ĝin kiel duan lingvon (en tiu senco ĝi similas la anglan, kaj iagrade la rusan), sed tiu nombro, ekzemple en Afriko, estas malgranda kompare kun la angla.[2]

Nun venis plia elemento: la Tut-Tera Teksaĵo, aŭ TTT. Ĝi nepre rapidigas la internacian uzon de la angla, kaj la procezoj de internaciiĝo, de tutmondiĝo, emas esprimiĝi per la angla. Hodiaŭ, ŝajne plimulto de la regulaj uzantoj de la angla lingvo ne estas denaskaj parolantoj: ili uzas ĝin por ĉiuj celoj, eĉ por organizi sin kontraŭ la t.n. usona hegemonio kaj kontraŭ la imperiismo.

Dume, la denaskaj parolantoj de la angla lingvo tenas kaj fortigas sian influon. Lastatempe Universala Esperanto-Asocio protestis kontraŭ tio, ke granda nombro de postenoj ene de Eŭropa Unio postulas "denaskan scion de la angla," tiel diskriminaciante kontraŭ la nedenaskaj parolantoj. Tiuj denaskaj parolantoj de la angla ĝuas grandegan avantaĝon en internacia negocado, en debatado, en kontaktoj kun la gazetaro, kaj ĝenerale en la influado de la monda publika opinio. Jes, oni povas ellerni tiun komplikan anglan lingvon, eĉ preskaŭ egaligi sian scion al tiu de denaska parolanto – sed tio postulas grandan investon de tempo kaj aliaj rimedoj. Ke tutaj nacioj klopodas atingi tiun nivelon de egaleco, kaj elspezas grandan parton de sia nacia produktado tiucele, estas ne nur nejuste, sed ankaŭ grandparte utopie – nenie pli evidente ol en Ĉinio. Kaj ĉu, se iam en la estonteco oni povus atingi tiun rezulton, kio okazus al la propra kulturo, al la propraj valoroj? Ĉu ankaŭ ili forvaporiĝus pro senutilo? La angla lingvo ja estas pli ol simple lingvo (ĉiuj lingvoj estas ja pli ol lingvoj…): ĝi estas perilo de kulturaj valoroj, softvaro tiel monopola kiel Vindozo.[3] En la nuna historia momento, havas sencon lerni tiun lingvon, sed ne ekskluzive de aliaj manieroj partopreni la tutmondan vivon.

---

[1] Vere temas ĉi tie ne pri denaskaj parolantoj de la "ĉina" sed pri denaskaj parolantoj de pluraj lingvaj variantoj, kiuj, kiam ili lernas legi, kapablas legi la saman ĉinan skribon.

[2] William F. Mackey, en sia eseo "Forecasting the fate of languages" (en Jacques Maurais kaj Michael A. Morris, red. *Languages in a Globalising World*, Cambridge: Cambridge University Press, 2003: 64-66), insistas pri tio, ke la nombro de afrikaj parolantoj de la franca kreskas pro simpla demografia kresko kaj pro pliboniĝo de edukaj servoj, sed lia optimismo estas miaopinie tro granda.

[3] Pri la subtila rilato inter lingvo kaj potenco vidu Pierre Bourdieu, *Ce que parler veut dire* (Paris: Fayard, 1982), tradukita kiel *Language and Symbolic Power* (Cambridge, MA: Harvard University Press, 1991).

4. La malavantaĝoj de disdivido

Se oni ĵetas rigardon al la nacia investo pri lingvolernado (la kvanto de rimedoj elspezata en la eduka sistemo por klerigi lernantojn pri fremdaj lingvoj, la rimedoj uzataj similcele de la komercaj k.a. entreprenoj, la kosto de tradukado de libroj kaj aliaj dokumentoj en la propran lingvon, la kosto ligita al komunikproblemoj pro lingva diverseco), oni vidas, ke la plej grandaj procentaj kostoj kuŝas ĉe tiuj, kiuj ne uzas unu el la grandaj mondaj lingvoj; en la mezo sidas la ŝtatoj, kiuj uzas unu el la ĉefaj lingvoj (sed ne la anglan); tute ĉe la subo, kun la plej malgranda investo je lernado de fremdaj lingvoj, sidas la angleparolantaj landoj – Usono, Britio, Kanado, Aŭstralio, Novzelando.

La avantaĝoj ĝuataj de tiuj landoj ne estas nur tio, ke ili ne devas elspezi tiom da mono por lernado de fremdaj lingvoj: pro tio, ke ilia lingvo estas vaste uzata, ili ĝuas avantaĝojn multflankajn. Eksterlandaj studentoj are amasiĝas en iliaj universitatoj, portante kun si monon kaj intelektan kapablon; turistoj venas al iliaj urboj; ili havas fortan eldonan industrion; ili eksportas kulturajn produktojn diversajn, kaj iliaj kulturaj normoj pli kaj pli dominas la internacian medion. Sed jen la dilemo: ju pli la cetero de la mondo adaptiĝas al tiuj normoj, kaj do klopodas dividi kun la angleparolantaj landoj iliajn avantaĝojn, des pli neniige ili perdas la propran identecon.

En sia lastatempa libro pri la lingva situacio en Eŭropa Unio[1], la lingvisto Robert Phillipson atentigas, ke la nekapablo de la diversaj ŝtatoj-membroj starigi funkcikapablan lingvopolitikon malfermas EU al la intertempa dominado de la plej forta lingvo, nome la angla, kune kun ĝiaj kulturaj produktoj. Kiel ni jam rimarkis, ju pli diversa la oficiala lingvaro, des pli libere la ĉefa lingvo povas etendi sian influon. Manko de politiko, kiel prave asertas Phillipson, estas en si mem politiko. En tiu senpolitika politiko la plej forta lingvo, nome la angla, gajnas influon je la kosto de ĉiuj aliaj lingvoj, dividitaj kaj konkurencaj inter si kaj pro tio senpovaj.

Ĝuste tiun situacion oni vidis kiam en 1996 Sudafriko starigis sian novan lingvopolitikon. Sub la rasapartiga reĝimo, du lingvoj, la afrikansa kaj la angla, estis la solaj oficialaj registaraj lingvoj. Sed la Konstitucio de 1996 rekonis 11 lingvojn kiel oficialajn lingvojn: la du "blankulajn lingvojn" plus naŭ afrikajn lingvojn. Laŭ la popolnombrado de 1991, 21,9% parolas denaske la zuluan, 17% la ksosan, 15% la afrikansan, 9,6% la nord-sotan, kaj 9% la anglan. Sed la simpla deklaro, ke ĉiuj 11 lingvoj estas egalaj, ne igas ilin tiaj: la angla kaj afrikansa restis la plej prestiĝaj lingvoj, kaj precipe la angla fariĝis ŝlosila lingvo por la edukado, por ekonomia prospero, kaj por internaciaj kontaktoj. Tiu, kiu volas prosperi en Sudafriko, lernas kaj uzas la anglan. La sudafrika registaro, eĉ se ĝi volus ŝanĝi tiun situacion, vere ne havas la rimedojn por egaligi ĉiujn 11 lingvojn ne nur teorie sed ankaŭ laŭfakte. Per multigo de la nombro de oficialaj lingvoj, ĝi malfermis la vojon al fortiĝo de la angla – manke de aliaj solvoj.[2]

---

[1] Robert Phillipson, *Ĉu nur-angla Eŭropo? Defio al lingva politiko* (Roterdamo: Universala Esperanto-Asocio, 2004).

[2] Vidu ekzemple Jan Bernsten, "English in South Africa: Expansion and nativization in concert,"

Manke de aliaj solvoj, en EU la influo de la angla kreskas kaj tiu de la aliaj lingvoj, interalie la franca, falas. Tiu evoluo verŝajne impete antaŭeniros pro la lastatempa aldono de novaj ŝtatoj-membroj, kiuj jam aliĝis por sia internacia agado (ili plejparte uzas lingvojn sen granda internacia influo) al la angla lingvo. Tiel, same kiel en Sudafriko, cedante al teoria multlingvismo (kaj mildigante tiel la opozicion), la gvidantoj malfermas la vojon al la angla.

La granda franca predikisto Lacordaire (1802-1861) iam diris, ke "Inter la fortaj kaj la malfortaj, la subpremanto estas libereco." En plene libera ludejo, la forta teamo verkas la regularon se entute reguloj ekzistas. Pro tio, difinitaj okcidentaj ŝtatoj en forta ekonomia pozicio argumentas favore al komplete libera fluo de informoj, komplete malfermaj kaj liberaj merkatoj, ktp. Kompare al la alternativoj (senbridaj diktaturo, cenzurado), tiuj argumentoj havas siajn meritojn, sed sen nuancoj ili kondukas al plifortiĝo de la fortaj kaj malfortiĝo de la malfortaj. Necesas ne nur malfermiteco sed ankaŭ ekvilibrigaj reguloj por protekti kaj ŝirmi la malfortajn ludantojn kontraŭ la inundo de la fortaj. Malfacilas trovi la ĝustan ekvilibron inter protektismo kaj ia liberecismo, sed sen tiuj ŝirmoj la sistemo ne funkcias. Ni riskas similan situacion en la libera merkato de lingvoj.

5. La monda lingva sistemo kaj la rolo de Esperanto

La nederlanda sociologo Abram de Swaan persvade argumentas, ke tia tutmonda lingva merkato ja ekzistas.[1] Laŭ lia koncepto, ekzistas tutmonda sistemo de lingvoj, en kiu okazas konstanta konkurenco por influo: unu lingvo gajnas, alia perdas; unu lingvo etendas sian influon, alia lingvo retiriĝas kaj perdas potencon. La sistemo estas hierarkia kaj interaganta, kun amaso da malfortaj lingvoj, kiuj orbitas ĉirkaŭ fortaj regionaj lingvoj, kiuj siavice orbitas ĉirkaŭ la grandaj mondaj lingvoj (ĉefe la angla). Tiu procedo de konkurenco ekzistas jam de la komenco de la homa socio – sed la fakto, ke ĝi ĉiam ekzistas, ne estas en si mem kialo por lasi ĝin libere antaŭeniri. Necesas klara internacia lingva politiko, en kiu la uzantoj de la grandaj internaciaj lingvoj – tiuj de UN ekzemple, escepte de la angla – unueciĝu kontraŭ la kreskanta influo de la angla, ne en spirito de detruo, sed por kontraŭpezi tiun influon per komunaj elpaŝoj.

Unue, kompreneble, necesas akcepti la principon, ke lingva diverseco estas en si mem bona afero. Ekstrema diverseco ja havas siajn limigojn en moderna mondo kie la homoj konstante interagadas, konstante interkomunikiĝas, sed la supozo, ke la sola alternativo estas uzado de la angla lingvo por internacia komunikado kaj la propra lingvo en aliaj cirkonstancoj (eventuale kun regiona lingvo kiel tria perilo), estas erara.

Pro tio, ke ĝi estis konstruita por roli kiel internacia interlingvo, Esperanto ne similas aliajn lingvojn. Malantaŭ ĝi sidas relative malforta movado, sed principe ĝi

---

Language Problems and Language Planning, 25 (2001): 219-235, kaj la artikolojn en baldaŭ aperonta speciala numero de tiu sama periodaĵo (jarkolekto 28 [2004], numero 2) sub redakto de Nkonko Kamwangamalu kaj Timothy Reagan.

[1] Abram de Swaan, *Words of the World* (Cambridge: Polity, 2001).

estas neŭtrala, sen ligo al la grandaj potencoblokoj. Eĉ por neeŭropanoj ĝi estas nepre pli facile lernebla ol la aliaj eŭropaj lingvoj, interalie la angla. Se ĝi estus ĝenerale uzata eĉ en relative limigitaj medioj, ĝi ŝparigus al la registaroj grandan investon je fremdlingva lernado. Pli grave, simila investo je Esperanto kiel nun ekzistas je la angla, kondukus al multe pli profunda kono de Esperanto ol nun okazas ĉe la angla, kaj sekve pli riĉa kaj profunda interrilato kun aliaj lernintoj de Esperanto en aliaj landoj. Mi ne sugestas, ke landoj kiel Ĉinio ĉesu instrui la anglan lingvon kaj tuj ekinstruu ekskluzive Esperanton – sed ke internacia interkonsento uzi Esperanton en internaciaj organizaĵoj, ekzemple, povus revolucii la potencoekvilibron en tiuj organizaĵoj, aŭ ke decido instrui la lingvon en la lernejoj de kvin-ses ŝtatoj povus konduki al nivelo de interkompreniĝo inter tiuj ŝtatoj, kiu kondukus al nova kultura kaj ekonomia potenco.

Lastatempe, en cirkonstancoj rememorigaj pri la decidoj en Ligo de Nacioj, EU rifuzis eĉ konsideri la potencialon de Esperanto kiel alternativon al la nuna oficiala lingva kaoso en la organoj de EU. Ŝajne pro sia konvinko, ke nur la angla taŭgas, aŭ ke nur la nuna influo de la franca aŭ la germana aŭ la itala devus nepre esti protektata, la funkciuloj rifuzis fari tiun sciencan studon pri kostoj kaj avantaĝoj, kiun ĉiu serioza aliro al lingvoplanado devus fari.[1] La tekniko por tiaj studoj estas tute bona konata, interalie pro apliko de tiuj principoj en la formado de lingvopolitiko en landoj kiel ekzemple Kanado. Sed ŝajne nur tre kuraĝa registaro pretus elpaŝi ekster la nunajn normojn por provi profunde reformi la nunan internacian lingvan reĝimon.

Eble ĝuste Ĉinio estas tiu lando. Posedanto de la plej denaske uzata lingvo de la mondo, sed lingvo kies potencialo kiel tutmonda lingvo estas tre limigita kaj tre neprobabla, posedanto ankaŭ de unu el la plej rapide kreskantaj ekonomioj de la mondo, sed kiu agadas en internacia medio esence formita de la landoj de Eŭropo kaj Nordameriko, Ĉinio estas la ĝusta lando por labori por nova internacia lingva egaleco, kiu helpus ebenigi la konkurencon inter la landoj kaj eble eĉ krei novan nivelon de internacia kunlaborado. Ĝi jam tra multaj jaroj simpatie rilatis al Esperanto, per sia subteno de radio-programoj en la lingvo, sia eldonado de grandaj ĉinaj verkoj en Esperanto, sia disvastigo de Esperanto per Ĉina Esperanto-Ligo kaj alimaniere. Kiel lando ne identigita kun la eŭropa tradicio, sed klopodanta trovi alternativan vojon, ĝi nature trovas en Esperanto ideon kun similaj celoj. En lastatempa artikolo en bangladeŝa ĵurnalo, s-ro A.F.G. Mohiuddin etikedis Esperanton kiel lingvon "por signifohava tutmondiĝo."[2] Tian "signifohavan tutmondiĝon" celas la novaj-malnovaj landoj de suda kaj orienta Azio, landoj de antikvaj civilizoj, kiuj nun ligas tiujn civilizojn kun la moderna mondo.

La kongresa temo de la nuna kongreso estas "lingva egaleco en internaciaj rilatoj." Mi esperas, ke ni esploros tiun temon kaj teorie kaj praktike, respondante la

---

[1] Vidu ekzemple Mark Fettes, "Interlingualism: A world-centric approach to language policy and planning" en Humphrey Tonkin kaj Timothy Reagan, red., *Language in the 21st Century* (Amsterdam: Benjamins, 2003): 47-58.

[2] A.F.G. Mohiuddin, "Towards a just world: Esperanto for meaningful globalisation," *The Independent (Bangladesh),* 10 julio 2003.

demandojn "Kio estas lingva egaleco?" kaj "Kiel praktike ni starigu tiun egalecon internacie?" Mi ne povas imagi pli taŭgan landon kie trakti tiun temon ol Ĉinio.

La temo havas diversajn aspektojn. Unue, oni povas demandi sin, kio estas internaciaj rilatoj – en kio konsistas la dezirinda internacia vivo? La diversaj landoj konsistigas faskojn de kulturaj normoj, kiuj interagas inter si, kaj siavice interagas kun aliaj tiaj faskoj tra la mondo. Iam, la internacia vivo estis grandparte limigita al la intertrakto de ŝtatoj, aŭ al agado strikte kontrolata de ŝtatoj, sed hodiaŭ ĝi fariĝis bunta kaj diversflanka. La naciaj normoj ne plu aplikiĝas tiel abunde kiel antaŭe, kaj la internaciaj kulturaj ligoj estas pli diversaj.

Ĉu eblus krei egalecon en tiuj komplikaj interagoj inter la homoj? En kio konsistas tiu egaleco, kaj en kiu senco la nuna internacia agado estas efektive malegaleca? Ĉu temas simple pri lingva malegaleco? Se jes, ĉu Esperanto, kreita por egaligi la internaciajn rilatojn, povus forigi tiun malegalecon? Ĉu ĝiaj pretendoj kiel instrumento de egaleco estas pravaj? Kaj se ne temas nur pri lingvaj malegalecoj, kiun rolon povas ludi Esperanto aŭ aliaj alternativaj solvoj en la konstruado de pli egaleca mondo?

Fine, kaj ne malplej grave, kiel deiri de la nuna hegemonia situacio por aliri malpli hegemonian? Kiel konvinki tiujn, kiuj nun regas la internaciajn rilatojn, sekvi alian vojon? Persone, mi estas konvinkita, ke la sola maniero estas forĝi aliancon inter tiuj, kies lingvoj estas diskriminaciataj – eĉ se ili havas oficialan statuson en internaciaj medioj – por insisti pri nova, revolucie simpla solvo, nome la internacia lingvo Esperanto. Sed ne sufiĉas nur glori la avantaĝojn de Esperanto: necesas realisme fronti la nunan situacion kaj science, intence ŝanĝi ĝin. Dum epokoj la esperantistoj prave gloris sian lingvon: nun venis la tempo ekagi el la modesta politika bazo je ilia dispono, per realisma persvadado pri la preteco de Esperanto ludi novan internacian rolon.

La lingva Problemo en Ligo de Nacioj kaj NITOBE Inazô (1862-1933)

KOBAYASHI Tsukasa

JEI, Tokio

La Asista Ĝenerala Sekretario de Ligo de Nacioj, d-ro NITOBE Inazô, naskiĝis en la urbo Morioka, kiu kuŝas en norda distrikto de Japanio, en 1862, tri jarojn post la naskiĝo de d-ro Lazaro Ludoviko Zamenhof, la kreinto de la internacia komuna lingvo Esperanto. Ambaŭ havis tre similan opinion pri la internacia komuna helplingvo.

D-ro Nitobe studis agrikultur-politikon, kaj poste fariĝis profesoro de Tokia Universitato (la plej famekonata universitato en Japanio), kaj Rektoro de Tokio Virina Kolegio, kiun li fondis.

Li klopodis en la Ligo por internacia amikiĝo kaj mondpaco. Kiam Ligo de Nacioj estis fondita en 1920, li estis invitita kiel la Asista Ĝenerala Sekretario de la Ligo. La Ligo celis gardi la mondpacon, sed Usono ne aliĝis, kio limigis la agadon de la Ligo. Sume 56 ŝtatoj aliĝis al la Ligo, kiu havis pli ol 500 oficistojn en la oficejo en Ĝenevo.

En decembro 1920, en la unua kunveno de la Ligo, jena propono de rezolucio estis laŭtlegita:

"Ligo de Nacioj, konstatante la lingvajn malfacilaĵojn, kiuj malhelpas rektajn rilatojn inter la popoloj, kaj la urĝan necesecon forigi tiun baron por helpi al bona kompreniĝado inter nacioj, sekvas kun intereso la provojn je oficiala instruado de la internacia lingvo Esperanto en la publikaj lernejoj de kelkaj regnoj, anoj de Ligo de Nacioj esperas, ke tiu instruado ĝeneraliĝos en la tuta mondo, por ke la ĉiulandaj geknaboj sciu de nun almenaŭ du lingvojn, sian gepatran kaj facilan rimedon por internacia komunikado, kaj petas la ĝeneralan sekretariaron prepari, por la venonta kunsido, detalan raporton pri la rezultatoj atingitaj en tiu fako."

La franca delegito Gabriel Hanoutaux kontraŭbatalis kontraŭ la propono, dirante ke la franca lingvo kaj ĝia literaturo "jam estas universala en la tuta mondo de l' penso".

La prezidanto deklaris prokrasti la decidon pri la propono per voĉdono.

En 1921, la 13-a Universala Kongreso de Esperanto oficiale invitis reprezentanton de la Ligo kiel observanton por rigardi la kongreson en Praha, Ĉeĥoslovakio, kie 2561 geesperantistoj ĉeestis. La Ligo sendis d-ron Nitobe al la 13-a UK.

Tie d-ro Nitobe salutis jene: "La Ligo havas intereson pri la problemoj de gravaj aferoj internaciaj, kaj serĉado de la lingvo por internacia komunikado estas unu el la plej gravaj temoj de la Ligo. La plej grava celo de la Ligo estu forestigo de la milito,

Esperanto helpos tion.… Iam Esperanto fariĝos realaĵo, funkcianta kiel la oficiala lingvo de la Ligo. Tio estos problemo de tempo. Kvankam tio sekvanta ne estas oficiala parolo, mi certe kredas ke la homaro iam unuiĝos, tiam Esperanto kontribuos grave. Ĉe Esperanto, kompreni nur la lingvon ne estus sufiĉe, tamen kompreni la internan ideon de Esperanto estus necese por kompleta kompreno. Mi estis allogita tre forte de la interna ideo." La interna ideo signifas "la fratecon kaj justecon inter la gentoj" laŭ d-ro Zamenhof. Kompreneble lingvo mem ne posedas ideon, sed la disvastigantoj de Esperanto havas tian ideon. Tial la atmosfero de la UK ŝajnis tre harmonia, kio kortuŝis d-ron Nitobe.

Li atestis tion ankoraŭfoje en sia esearo "Kontakto de la Oriento kun Okcidento" (1929). "La kialo de mia intereso pri Esperanto estas la idealo de d-ro L.L. Zamenhof, kreinto de Esperanto. Li intencis feliĉigon de la popoloj tra reciproka komunikebleco per internacia komuna lingvo."

D-ro Nitobe prezentis tre favoran detalan raporton pri Esperanto al la Ligo.

En la 15-a de septembro 1921, "Propono pri instruado de Esperanto" estis legita de la prezidanto ĉe la ĝenerala kunveno de la Ligo, jene: "La delegitoj proponas la enkondukon de la internacia helplingvo Esperanto en la publikajn lernejojn por faciligi rektan interkompreniĝon de ĉiuj popoloj en la mondo." Tiam la raporto "Esperanto and the Language Question at the League of Nations " (30p.), verkita de d-ro Nitobe, estis disdonita al ĉiuj ĉeestantoj, tamen ĝi estis nur la kopio de la tria parto de lia raporto. Tiu ĉi propono estis akceptita ĉe la ĝenerala kunsido de la Ligo, sen kontraŭstaro. En aprilo 1922, "Internacia Konferenco pri Edukado de Esperanto" estis okazigita en la Palaco de la Ligo en Ĝenevo. Post tio, la favora raporto pri Esperanto estis disdonita ĉe la ĝenerala kunsido de la Ligo. Tamen, franca delegito, senator Raynald, kiu estis private simpatia al Esperanto, devis kontraŭstari laŭ la ordono de la ministro de publika instruado de Francio, Léon Bérard. La reprezentanto de Svedio kaj Norvegio subtenis la anglan lingvon kiel la plej bonan lingvon. La brazila ministro Rio Branco atakis Esperanton kiel "lingvon de mizeruloj kaj komunistoj". Tiam oni timis utiligon de Esperanto por klasbatalo.

Malgraŭ akcepto de Finnlando, Persio, Ĉinio, Japanio kaj Bulgario, tiu ĉi propono estis transdonita senkonklude al la "Intelekta Kunlabora Komisiono" de la Ligo, pro timo al la grandaj potencoj.

Ĉe la Komisiono, la friburga poeto Gonzague de Reynold atakante Esperanton subtenis la latinan lingvon. La franca instruinspektoro Luchaire kontraŭstaris Esperanton. La prezidanto, la franca filozofo Bergson, deziris neakcepton de Esperanto. D-ro Nitobe admonis lin ke neakcepto estos malestimata post 20 jaroj. Tamen la Komisiono rifuzis Esperanton, ĉar ĝi deziris subteni la francan aŭ anglan lingvon.

En 1924, la Ligo akceptis Esperanton kiel "lingvon klaran" en la telegrafaj komunikoj. Tamen propono pri instruado de Esperanto en lernejo estis lasata nedecidita.

Trarigardante tiun ĉi historion pri la lingvoproblemo en la Ligo, oni komprenus kiel egoisma estis granda potenco kiel Francio. Ili nur konsideris gardi la rajton de sia lingvo, tute ne zorgante aliajn nacianojn. Ili opiniis ke nur lernado de la franca aŭ

angla lingvo kreskigus kulturon en la tuta mondo. Nuntempe, la historio de la mondo atestas kia estas la situacio de la franca lingvo. Baldaŭ la sorto de la angla lingvo sekvos tiun de la franca.

Certe, la ideo de d-ro Nitobe, kiu estis favora al Esperanto, kuris iom antaŭ la ĝenerala opinio, tamen la mondo ŝanĝiĝis nun. Ĉu oni preferus la malnovan vojon kiun Francio aŭ Britio marŝis en la Ligo antaŭ 82 jaroj? Aŭ ĉu oni preferus la vojon montritan de d-ro Nitobe?

La celo kaj stato de la homa civilizacio: egaleco kaj diverseco de lingvoj kaj kulturoj

YANG Guang[1]

Ŝtata Lingva Komisiono de Ĉinio

Lingvo estas la plej grava homa komunikilo kaj ĉefa portanto de la kulturo en ĝia heredado kaj disvolvado. Lingvo estas ankaŭ kultura fenomeno. En la produktado kaj vivo de la homaro la lingvoj parola kaj skriba havas neanstataŭigeblan bazan rolon. En la informa epoko, kiam sciencoj kaj teknologioj senĉese disvolviĝas, la lingvaj problemoj estas pli kaj pli multe atentataj.

1. Por diverseco de la lingvo kaj kulturo en la kondiĉoj de la ekonomia tutmondiĝo

Nun en la mondo la translanda aktivado de materia produktado, ekonomia komercado, financa investado kaj aliaj ekonomiaj aktivadoj pli kaj pli oftiĝas, kaj pli kaj pli evidentiĝas la reciproka influo kaj karambolo en konceptoj de ideologio, kulturo kaj valoro. Malgraŭ ke la voĉo kontraŭ tutmondiĝo daŭre bruadis kaj la tergloba vilaĝo neniel portis feliĉon al siaj loĝantoj, la ekonomia tutmondiĝo tamen fariĝis reala tendenco.

La tiel nomata tutmondiĝo estas gvidata de la superpotenco kaj fortaj okcidentaj landoj, kaj oni dividas la interesojn kaj parolrajton surbaze de la fortoj. Nun 80% de la internacie influhavaj komunikiloj kaj Interreto uzas unu lingvon kaj komunikas unu kulturan koncepton de valoro. La angla lingvo okupas potencan lokon en la monda komunika sistemo, tial la agadspaco de aliaj lingvoj estas tre limigita kaj iuj malfortaj lingvoj kaj kulturoj estas minacataj de pereo. Ni scias, ke la lingvo kaj kulturo de ĉiuj nacioj kaj regionoj estas kreaĵo de la tieaj loĝantoj kaj faras sian kontribuon al la homa plurisma kulturo. Perdinte sian kulturon, la nacio perdos siajn proprajn trajtojn kaj spiriton, kaj perdiĝos tiam ankaŭ kultura speco en la tuta kulturo de la homaro. La egaleco de lingvo kaj kulturo estas bazo por egaleco de la ŝtatoj kaj nacioj kaj strikte rilatas kun la ŝtata suvereneco kaj nacia digno. Aliflanke lingvoj decidas la parolrajton de la komunikiloj kaj faras la unuan impreson, kiu estas pli forta, rajton de klarigado kaj akuzado. La sentoj, sinteno kaj koncepto entenataj en lingvoj formas la kulturan heredaĵon kaj spiritan hejmon. Tial hodiaŭ ĉiuj landoj kaj nacioj donas pli grandan atenton al siaj lingvaj tradicioj ol iam ajn antaŭe.

---

[1] Ĝenerala direktoro de la departemento de lingva planado kaj administrado de la Ŝtata Lingva Komisiono de Ĉinio (ĉe la Ministerio de Edukado).

Ni opinias, ke sub la kondiĉoj, kiam ĉiuj landoj pli kaj pli forte dependas unu de alia en ekonomio, la ekonomia tutmondiĝo kaj kultura diverseco devas esti akorde disvolvataj. La tezo pri unuecigo de la lingvo kaj kulturo kaj strebado al la unuflanka hegemonio de la lingvo kaj kulturo estas nereala kaj eĉ malutila. La egaleco, diverseco kaj harmonia kunekzisto de la lingvoj devas esti kultura koncepto kaj celo de valoro bazita sur la homa konscienco. Multeco de lingvoj donas pli da vidkampoj, kaj multeco de kulturoj havigas riĉan koloron, toleremon kaj interkompreniĝon. Tial ni devas fari ĉion eblan por krei novan internacian politikan kaj ekonomian ordon de demokratio, egaleco, kunekzisto kaj kuna gajno, kaj akceli la egalecon kaj diversecon de la lingvo kaj kulturo sub la kondiĉoj de la ekonomia tutmondiĝo. Statistiko montras, ke antaŭhistorie en la mondo estis 12000 lingvoj, sed hodiaŭ restas nur 6000. Kaj plie la lingvoj rapide reduktiĝas pro komplikaj kaŭzoj. Fakte la malapero de ajna lingvo estas damaĝo al la homa civilizacio. Ni alvokas, ke oni donu grandan atenton al protekto kaj savo de la pereontaj lingvoj kaj intensigu la internacian kunlaboron sur tiu kampo. Ni volas penadi kune kun ĉiuj ĉeestantoj por krei pacan, egalecan, harmonian kaj buntan mondon.

2. Por lingvaj egaleco, diverseco kaj harmonio

Ĉinio estas disvolviĝanta lando kun multaj nacioj, lingvoj kaj dialektoj. Ĝi konsistas el la Han-nacio kaj 55 nacimalplimultoj, kiuj parolas pli ol 80 lingvojn kaj havas 30 skriblingvojn. La naciaj kulturoj surbaze de la naciaj lingvoj havas longan historion. La diversnaciaj kulturoj lernas unu de alia, kune disvolviĝas, kaj tiel formiĝis la unuecaj multnaciaj kulturaj trajtoj de la ĉina nacio. Pri tio la leĝdona instanco kaj diversnivelaj registaroj de Ĉinio faris longan penadon por la lingvaj egaleco, diverseco kaj harmonio. La Konstitucio de la Ĉina Popola Respubliko klare difinas: "Ĉiuj nacioj havas la liberecon uzi kaj disvolvi siajn lingvojn parolan kaj skriban kaj la civitanoj de ĉiuj nacioj havas la rajton uzi siajn naciajn lingvojn parolan kaj skriban en la procesado. En la oficado la naci-aŭtonomaj instancoj devas uzi unu aŭ kelkajn lingvojn komune uzatajn en la loko, observante la difinon de la aŭtonoma regularo de sia nacio. Tio fundamente garantiis la uzadon kaj disvolvon de la naciaj lingvoj. "Aŭtonoma leĝo pri naciaj regionoj de la Ĉina Popola Respubliko", "Leĝo pri la komune uzataj lingvoj kaj skriblingvoj de la ŝtato", "Leĝo pri edukado", "Leĝo pri deviga edukado" kaj aliaj leĝoj kaj reguloj havas principan kaj konkretan difinojn pri uzado de la naciaj lingvoj. Tiuj leĝoj kaj reguloj estis agnoskitaj kaj observataj en diversaj regionoj. Post la komenco de la reformado kaj pordmalfermo de Ĉinio, por disvolvi la demokratian regadon, konstrui la politikan civilizacion, respekti kaj defendi la homajn rajtojn kaj prosperigi la socialisman kulturon, la ĉina registaro donis pli grandan atenton al defendo de la lingvaj diverseco, harmonio kaj unueco, daŭre persistas en politiko pri egaleco de diversnaciaj lingvoj, malpermesas ĉian lingvan diskriminacion kaj pledas por reciproka lernado de la lingvoj fare de ĉiuj nacioj por kune venki la lingvan baron. Samtempe kun tio laŭ difino de la konstitucio, Ĉinio popularigas *putonghua*, komune uzatan parolan lingvon por faciligi la komunikadon kaj interŝanĝon de diversaj nacioj. En la nuna Ĉinio la lingva egaleco

de diversaj nacioj estas grava konsistiga parto de la ŝtata nacia politiko utila al egaleco, unuiĝo kaj komuna prosperiĝo, kaj lingva egaleco jam fariĝis grava faktoro de la bazo de la nacia egaleco. Ĉiuj nacioj kredas unu al alia, lernas unu de alia, helpas unu alian kaj respektas unu alies lingvon, morojn, kutimojn kaj religian kredon kaj kune defendas la ŝtatan unuecon kaj nacian solidarecon.

En la pasintaj jaroj la ĉina registaro defendis kaj disvolvis la lingvojn parolajn kaj skribajn de diversaj nacimalplimultoj ĉefe en jenaj flankoj: Unue, senĉese perfektigi la koncernajn leĝojn kaj regulojn kaj laŭleĝe garantii la leĝan egalecon de diversaj lingvoj. Due, en la naciaj aŭtonomaj regionoj energie disvolvi la instruadon en du lingvoj, por ke la nacimalplimultaj geknaboj antaŭ ĉio posedu sian propran lingvon kaj surbaze de tio posedu la komune uzatan lingvon de Ĉinio. Trie, fari klaran difinon uzi la naciajn lingvojn parolan kaj skriban en la naciaj aŭtonomaj regionoj dum la oficado; en civilaj, kriminalaj kaj administraj procesoj, ekzameno kaj kontrolo de tiaj kazoj kaj publikigo de leĝoj kaj dokumentoj; en registrado de entreprenaj nomoj kaj markoj, de ekonomiaj kontraktoj, arbitracio kaj identigaj kartoj de civitanoj. Kvare, subteni kaj helpi nacimalplimultojn en ordigo de la lingvoj parolaj kaj skribaj, ellaboro de regulaj normoj, intensigo de esplorado pri lingvoj kaj ilia praktikado kaj fari multe da fruktodonaj laboroj precipe por adaptiĝi al la informadiko, reta komunikado kaj aliaj. En la estonteco la supre menciitaj laboroj estos daŭre farataj.

Aliflanke, la Han-nacio kun pli ol miliardo da loĝantoj mem estis formita en kunfandiĝo de pluraj etnoj en la historio de sia evoluo. Pro diverseco de la terenoj kaj limigo de ekonomiaj kaj sociaj kondiĉoj ankaŭ la Han-nacio havas diversajn dialektojn, kiel la Guangdong-a, Fujian-a, Jiangsu-a, Hunan-a, Jianĝi-a, Kejia-a, norda kaj sudokcidenta, kaj ankaŭ diversajn subdialektojn kaj indiĝenajn dialektojn, kiuj malfacile interkomunikiĝas inter si mem kaj estigas gravan lingvan baron. Tio estas malutila al la ekonomia disvolviĝo kaj moderniga konstruado de Ĉinio, tial ankaŭ en la lokoj koncentre loĝataj de hanoj estas necese energie popularigi *putonghua*, la komune uzatan parolan lingvon en Ĉinio. Sed dialektoj estas la bazo de loka kulturo. En Ĉinio estas centoj da lokaj operoj kaj kant-rakontaj formoj uzantaj sian dialekton kaj ankaŭ la dialektoj mem estas kultura fenomeno kaj korinklino de lokanoj, tial popularigi *putonghua* ne signifas ekstermi dialektojn, sed celas tion, ke la civitanoj ellernu la komunan lingvon de la lando, kiam ili uzas sian dialekton, realigante harmonion de la unueco kaj varieco de la lingvoj en la socia praktikado. Estas necese mencii, ke la Han-lingvo havas multe da dialektoj, kiuj tamen uzas la saman skriblingvon kaj apartenas al unu sama lingvo. La sud-fujian-a dialekto, vaste uzata en Taiwan-provinco, ja estas unu el la dialektoj de Ĉinio. Kelkaj personoj diris, ke la sud-fujiang-a dialekto ne apartenas al la Han-lingvo, sed estas Taiwan-a lingvo, tio estas kontraŭscienca kaj montras ilian kaŝitan motivon.

Jam en 1989 Unesko aprobis "Projekton por protekti folkloran kreon", kiu difinas, ke la lingvoj estas grava heredaĵo el la buŝaj kaj nemateriaj kulturaj heredaĵoj. Ĉinio estas subskribinto de la Konvencio de UN pri nemateriaj heredaĵoj de la homaro kaj ankaŭ antikva lando kun brila civilizacio kaj kulturo de 5000 jaroj. Ĉinio estas tre grava por protekti la diversecon de la homaj kulturoj kaj lingvoj. Dum multaj jaroj la ĉinaj registaro kaj popolo faris grandan klopodon por protekti

kulturon, historiajn restaĵojn kaj lingvojn kaj akiris rimarkindajn sukcesojn, tamen ankoraŭ estas iuj urĝe solvendaj problemoj, precipe en konscio, sistemo, mekanismo kaj mon-asigno. Antaŭ nelonge la ĉina registaro jam konsideris protekton de naciaj kaj popolaj kulturoj, inkl. de la lingvoj, en sia financa budĝeto kaj decidis ĉiujare asigni sufiĉe grandan sumon da mono por fari tiun laboron. Ni kredas, ke en Ĉinio la lingva diverseco estos defendata kaj respektata, kaj la harmonio kaj unueco de diversaj lingvoj kaj ilia regula disvolviĝo estos daŭre subtenataj.

3. Por populariĝo, normiĝo kaj internaciiĝo de la ĉina lingvo

Ĉi tie la ĉina lingvo temas ne pri ĉiuj lingvoj uzataj en Ĉinio, sed pri la komune uzataj lingvoj parola kaj skriba, tio estas *putonghua* kaj la Han-lingvaj ideogramoj. Kiel baza instrumento por reguligi la homan produktadon kaj vivon, lingvoj nepre devas konformiĝi al la bezono de la ekonomia kaj socia disvolviĝo. La ĉina starpunkto por reguligi la lingvon ja ĝuste troviĝas ĉi tie. Postulate de la nuna disvolviĝo de Ĉinio, la lingvaj populariĝo, normiĝo kaj internaciiĝo estas identaj al la ĝenerala celado de Ĉinio pri sia konstruo de bonhava socio, ĝenerale kaj specife pri sia modernigo.

Antaŭ ĉio la lingva populariĝo estas objektive bezonata de la nacia industriigo kaj modernigo. Por realigi la merkat-ekonomian sistemon kaj konstrui grandan unuigitan merkaton tra la tuta lando, redukti la diferencojn inter la urboj kaj kamparo kaj tiujn inter diversaj lokoj, akceli la plenampleksan kaj harmonian disvolviĝon de la ekonomio kaj socio, oni devas elimini la lingvan baron kaj lingvan malakordon kaj laŭleĝe disvastigi la komune uzatan lingvon *putonghua.* En tio oni jam akiris grandan progreson, tamen en iuj malproksimaj landlimaj regionoj kaj nacimalplimultaj regionoj popularigi *putonghua* restas peza tasko. Ni devas, sub la premiso de defendo kaj disvolvo de diversaj nacimalplimultaj lingvoj kaj bona traktado de diversaj dialektoj de la Han-lingvo, alpreni efikajn rimedojn kaj fari ĉion eblan por fundamente popularigi *putonghua,* por ke ĝi fariĝu versence komune uzata parola lingvo en Ĉinio en la daŭro de 10-20 jaroj.

Due, la reguligo kaj normaligo de la lingvoj parola kaj skriba estas nepra postulo de la informadiko ekonomia kaj socia. En la nuna epoko estas bezonataj interkomunikado kaj interŝanĝo ne nur inter la homoj, sed ankaŭ inter la homoj kaj maŝinoj kaj inter la maŝinoj. Parolosintezado, parolorekonado, maŝina indeksado, maŝin-tradukado kaj aliaj teknikoj disvolviĝas rapide, kio kaŭzos revolucion al la homa komunikado kaj inform-cirkulado kaj profunde influos la homan produktadon kaj vivmanieron, kaj diĝitigo kaj inteligentizo de la homa vivo ne estas imagaĵo de la fora estonteco. Lingvoj parolaj kaj skribaj estas la ĉefa portanto de informoj kaj unu el la ĉefaj objektoj de maŝin-traktado. Sub la novaj kondiĉoj de scienco kaj teknologio, la informadikigo de lingvoj postulas kompare altan reguligon kaj normigon de la lingvoj parolaj kaj skribaj, tial ni devas intensigi la sciencan esploradon kaj konstruadon de la baza lingva inĝenierio, iom post iom perfektigi la normojn por reguligi la lingvojn parolajn kaj skribajn, kombini la modernajn informadikajn teknologiojn kun la ĉina skriblingvo kaj en la tuta socio propagandi por levi la

nivelon de konscio de la publiko pri la bezono normigi la parolajn kaj skribajn lingvojn, kaj levi la informadikajn teknologiojn kaj la nivelon de norma uzado de la lingvo en la tuta socio, por konformiĝi al la bezono de la informa epoko. Aliflanke ni devas atente konsideri kaj ĝuste kompreni la rilatojn inter la lingvaj normigo kaj disvolviĝo, starigi kaj realigi la ĝustan koncepton pri normigo kaj sciencan koncepton pri disvolviĝo, akceli la normigon, riĉiĝon kaj disvolviĝon de la lingvoj parolaj kaj skribaj.

Trie, internaciiĝo de la ĉina lingvo estas bezonata de plua pordmalfermo, intensigo de la rilatoj kaj interŝanĝo kun aliaj landoj kaj ankaŭ signo kaj simbolo de la reprosperiĝo kaj paca disvolviĝo de la ĉina popolo. Por lerni de la sperto kaj asimili ĉiujn fruktojn de la homa civilizacio, ni instigas la tutan loĝantaron, precipe la infanojn kaj gejunulojn lerni kaj uzi fremdajn lingvojn. Nun fremdaj lingvoj okupas gravan lokon en la instruado de diversaj lokoj en Ĉinio, kaj en la tuta socio furoras lernado de fremdaj lingvoj. Aliflanke ni konscias, ke unusoligo kaj homogenigo de lingvo povos kaŭzi negativan influon, kaj ni pledas, ke infanoj kaj gejunuloj antaŭ ĉio bone posedu sian propran lingvon, por levi kaj kultivi la spiriton de la ĉina popolo. Ni opinias, ke eblas bone ordigi la rilaton inter tutmondeco kaj nacieco kaj ke ankaŭ eblas senkontraŭdire samtempe prioritatigi la gepatran lingvon kaj ankaŭ bone lerni fremdajn lingvojn. Sed kun la profundiĝo de reformado kaj pordmalfermo kaj leviĝo de la internaciiĝo de Ĉinio, fremdaj lingvoj kaj precipe la angla lingvo estas pli kaj pli multe uzataj en diversaj kampoj de la socio, kaj en la ĉina lingvo pli kaj pli multe miksiĝas vortoj kaj mallongigoj skribitaj per literoj de fremdaj lingvoj. Iuj fakuloj kaj sociaj personuloj maltrankvilas, ke tio malbone influas la harmonion kaj sanan disvolviĝon de la Han-lingvo. Ni devas aktive adopti kaj instigi ĉinigon de fremdaj vortoj. Ni ankaŭ devas plifortigi la esploron pri malĝusta uzado de fremdaj lingvoj, kaj ĝustatempe kaj efike reguligi kaj korekti ĝin. Ni opinias, ke fari minimuman, leĝan kaj administran limigon al uzado kaj normaligo de lingvoj parolaj kaj skribaj estas racie kaj praktikeble. Aliflanke, kun la vigla disvolviĝo de Ĉinio pli kaj pli multe da homoj en la mondo lernas kaj uzas la ĉinan lingvon. Nun en la mondo 3000 universitatoj havas fakon de la ĉina lingvo kaj 25 milionoj da eksterlandanoj lernas la Han-lingvon. Nemalmultaj landoj prenas la ĉinan lingvon kiel unu el la studobjektoj de la lernantoj kaj metas ĝin en la edukan sistemon de sia nacio. La ĉina registaro intensigas sian laboron popularigi la Han-lingvon en la mondo, en planado, sistemigo kaj kulturado de instruistoj, kompilo de instruaj materialoj, ekzameno kaj aranĝo de sociaj aktivadoj. La iom-post-ioma internaciiĝo de la ĉina lingvo estos ĉiam pli profundiĝanta procedo en la 21-a jarcento, kies celo ne estas eksporti la ĉinan lingvon kaj ĉinan kulturon, sed konstrui duoblan ponton, ke ĉinoj lernas fremdan lingvon kaj eksterlandanoj lernas la ĉinan lingvon, intensigi la komunikadon, interŝanĝon, interkomprenon kaj kunlaboron kun aliaj landoj por defendi la egalecon kaj diversecon de la kulturoj de la tuta mondo en la situacio de la ekonomia tutmondiĝo kaj konstrui racian kulturan ekologion de la tuta mondo, fari siajn kontribuojn al la nobla celo de la homa civilizacio, progreso kaj paca disvolviĝo. Ĝuste por tio ni volontas fari duflankan kaj plurflankan kontakton, interŝanĝon kaj

kunlaboron kun lingvaj establoj, koncernaj organizaĵoj kaj oficistoj kaj fakuloj de aliaj landoj.

(Traduko el la ĉina de Liu Caisheng, Lu Binsheng, Tan Xiuzhu)

Principoj por komunikado ene de multlingva komunumo kiel Eŭropa Unio

Konkludoj de simpozio en la Eŭropa Parlamento (EP), 6 majo 2003

Michael CWIK

Eŭropa Komisiono (EC)

Celante la diskutadon pri Eŭropa Konstitucio ellaborita de la Konvencio de Eŭropa Unio dum la jaro 2003, unutaga simpozio estis organizita de diversaj neregistaraj organizaĵoj[1]) en EP en Brussel/Brŭelles kunlabore kun parlamentanoj de malsamaj politikaj grupoj (EP-parlamentanoj kiel Richard Corbett, Willy De Clercq, Jean-Maurice Dehousse, Michael Gahler), sub la titolo: "Kiaj lingvopolitikoj por multlingva Eŭropa Unio?"

Sub la prezido de la EP-parlamentano Michael Gahler, la partoprenantoj adoptis kelkajn principojn rilate, specife, al la demando: "Kiajn komunikad-rajtojn kaj devigojn oni devus enskribi en la Konstitucion de multlingva komunumo kiel Eŭropa Unio?"

Kontraŭe al la nuna formulado en la konstitucia projekto proponita de la Konvencio, en kiu nur la rajtoj de la EU-civitaneco estas menciitaj (Artikolo 8), la principoj adoptitaj en la kampo de komunikado dum la simpozio inkludas ankaŭ "devigojn", kiujn ĉiu civitano devus koni en siaj kontaktoj kun publikaj instancoj kiam li aŭ ŝi vojaĝas, laboras aŭ instaliĝas en alia membro-ŝtato de la Unio.

Entute, ok ĉefaj principoj por komunikado inter popoloj en multlingva komunumo estis detektitaj kaj formulitaj; ili devus esti enskribitaj en la konstitucian projekton por montri la limojn de ĉies konstituciaj rajtoj, specife, rilate al ĉies "devigoj" en la lingvaj kontaktoj kun publikaj instancoj je ĉiu politika decidnivelo en tiu multlingva Eŭropa Unio (loka, regiona, nacia, eŭropa).

1. Ĉiu estas libera en la elekto de la lingvo por komuniki kun aliuloj, **sed,** en la komunikado kun publikaj servoj kaj aŭtoritatoj, ĉiu devas konformiĝi kun la juraj kaj lingvaj preskriboj kiuj regas en la koncerna ejo. (**teritoria principo**)
2. En privata ĉirkaŭaĵo, ĉiu havas la rajton komuniki en la lingvo de sia propra elekto, **sed**, ĉiu kiu decidas kandidatiĝi por publika kaj/aŭ politika postenoj, devus majstri komunikadon en la loka(j) lingvo(j) kaj rekoni la jurajn kaj lingvajn preskribojn kiuj regas en la koncerna ejo. (**integrada principo)**

[1] www.europe-citizen.net/symposium.htm

3. En la kampo de privataj aktivecoj, ĉiu povas organizi sian komunikadon en la lingvo de sia propra prioritato, **sed**, en la rilatoj kun la publikaj instancoj, ĉies lingvouzado (komunikado) devas konformiĝi kun la juraj kaj lingvaj preskriboj aplikitaj en la koncerna ejo. (**principo de loka memstara administracio**)
4. En la interna organizado de sia propra komerca aktiveco, ĉiu estas libera elekti la lingvon de komunikado, **sed**, en la profesia kandidatiĝo, ĉiu devas plenumi la profesiajn kondiĉojn inkluzive la necesan lingvan kvalifikon por la koncerna aktivado de dunganta firmao, asocio aŭ institucio (**principo de profesia kvalifiko**)
5. Komunikado kun publikaj servoj kaj administracioj en la membro-ŝtatoj dependas de la jura kaj konstitucia kadro de la koncerna lando. (**principo de subsidiareco**)
6. Komunikado rilate al la institucioj de Eŭropa Unio devus esti nediskriminacia, racia kaj efika; tial, kiel ĝeneralan gvidlinion oni povas diri ke ekstera komunikado kun la civitano kaj komunikado en la kadro de politika mandato devas kovri ĉiujn oficialajn lingvojn de la Unio, **sed** interna kaj profesia komunikado bezonas komunan komunikilon; tiel longe kiel tia laborlingvo estas nacia lingvo, diskriminacio en komunikado daŭras. (**distingado inter ekstera civitana komunikado kaj interna profesia komunikado)**
7. Tiel longe kiel diskriminacio ekzistas en la interna komunikado de la institucioj de la Unio, la kompetentaj aŭtoritatoj sur la eŭropa nivelo kaj la edukadaj aŭtoritatoj en la membro-ŝtatoj devus enterpreni serĉadon en la kampo de nediskriminacia sistemo tiel kiel universala lingvomodelo (planitaj lingvoj), ĝiaj kondiĉoj, kapabloj kaj limoj, subteni studojn pri ebligado kaj faciligi lingvajn eksperimentojn kun la celo solvi finfine la restan diskriminacion en la interna kaj interetna komunikado. (**principo de egaleco kaj nediskriminacio**)
8. Finfine, apartenas al la respondeco de la kompetentaj aŭtoritatoj de la membro-ŝtatoj kaj de la kompetentaj instancoj je la eŭropa nivelo kunordigi la plej bonajn praktikojn en tiu kampo, organizi la necesan lingvoinstruadon en la lernejoj, oferi kaj garantii la diversecon en lingvolernado, kaj konservi la kulturajn kaj lingvajn identecojn en tiu multlingva Unio. (**principo de diverseco en unueco**)

Por la unua fojo, principoj pri komunikado ene de multlingva komunumo kiel Eŭropa Unio estis diskutitaj inter neregistaraj organizaĵoj kaj parlamentanoj de Eŭropa Parlamento.

La konkludoj estas diversaj:

A. La partoprenantoj de la simpozio deziris:

informi la EU-civitanon pri liaj rajtoj kaj devigoj en komunikado en tiu multlingva Unio kaj
rememorigi la membrojn de la Konvencio pri ĉefaj principoj kiuj devus esti enskribita en la Eŭropan Konstitucion.

B. Ĉiu politikisto kaj la kompetentaj aŭtoritatoj en la membro-ŝtatoj estis invititaj:

serĉi koncepton pri 'neŭtrala multlingvismo',
instigi studojn pri ebligado en la kampo de komuna nediskriminacia komunikadlingvo,
subteni lingvoeksperimentojn, specife en lernejoj, celante lernigi la unuan fremdan lingvon pli bone kaj pli rapide, kaj
krei observadejon por superrigardi la evoluon de la lingvouzado (komunikado) en Eŭropa Unio kaj por protekti kaj konservi kulturajn kaj lingvajn identecojn en la membro-ŝtatoj.

Eble valorus ne nur esplori tiujn rezultojn en lingvistaj cirkloj, aŭ, eventuale, en la konkludoj de ĉi tiu simpozio, sed ankaŭ distribui ĉiujn ĉi principojn por komunikado inter la popoloj ene de multlingvaj komunumoj kaj multkulturaj federacioj al politikistoj kaj sociaj grupoj kiuj ĉiutage estas konfrontataj kun la fenomeno de lingvodiskriminacio en eŭropaj kaj internaciaj organizaĵoj.

Notoj de Michael Cwik

Kunveninte la 25-an kaj 26-an de julio 2004 en la kadro de la 89-a Universala Kongreso de Esperanto en Pekino, la 3-a Nitobe-Simpozio, ebligante al spertuloj de interlingvistiko kaj ne-esperantistaj spertuloj pri komunikado kaj lingvoj interŝanĝi ideojn, komunajn interesojn kaj spertojn, diskutis la temon "Lingvaj problemoj en internaciaj rilatoj".

Pro la fakto ke internaciaj rilatoj kovras grandegan kampon de privataj, ekonomiaj, sociaj, politikaj, instituciaj kaj organizaj aspektoj, la ĉefaj konkludoj elĉerpitaj de la skribaj kaj buŝaj kontribuaĵoj de la partoprenintoj nur devus resumi la problemojn de la nuna situacio (faktoj), klopodi trovi kelkajn gvidliniojn (principoj) kaj celi la formuladon de kelkaj agadoj realigeblaj (strategio).

La "faktoj":

1. En internaciaj rilatoj komunikado, aŭ en aliaj vortoj la uzado de lingvoj, ludas gravan rolon por la personoj koncernataj.
2. Komunikado aŭ la uzado de lingvo komune komprenebla necesas specife por internaciaj organizaĵoj kaj kunvenoj, federaliĝintaj kaj konfederaciaj ŝtatoj, tiel kiel multlingvaj komunumoj kaj unioj.
3. De la vidpunkto de egaleco kaj ne-diskriminacio, komunikado en internaciaj rilatoj pli kaj pli estas miskondukita pere de la kreskanta uzado de kelkaj superregemaj lingvoj aŭ eĉ de unu nacia lingvo (kiel labora(j) aŭ referenca(j) lingvo(j)), kiu(j) estas la gepatra lingvo de iu lingva komununo kaj kiu(j) donas en negociadoj senmeritajn avantaĝojn al specifa grupo de personoj.
4. Tial, pli kaj pli, kritikoj rilate al lingvo-diskriminacio estas registrataj en la kampo de internaciaj rilatoj, kaj specife en la kampo de lingvouzado (komunikado) kun kaj ene de internaciaj kaj eŭropaj organizaĵoj kaj institucioj.
5. Pro la fakto ke la privilegiitaj lingvoparolantoj kaj iliaj estraroj ne estas pretaj aŭ ne deziras forlasi siajn poziciojn favorajn en internacia komunikado, la nuna situacio de diskriminacio en internacia komunikado havas la tendencon pli kaj pli uzi unu specifan nacian lingvon, kiu apartenas al la angle parolanta komunumo.
6. Ekzistas kreskanta deziro ŝanĝi tiun situacion de lingvodiskriminacio kaj organizi novan ordon en internacia komunikado.

La "principoj":

1. Internaciaj rilatoj devas esti bazitaj sur universalaj kaj nediskriminaciaj principoj. (**principo de egaleco kaj nediskriminacio**)

2. Jure ligitaj decidoj kaj tekstoj por la civitanoj devas esti komunikitaj en la propra lingvo. (**teritoria principo**)
3. Komunikado de internaciaj kaj supernaciaj organizaĵoj, institucioj kaj asocioj devus esti nediskriminaciaj, raciaj kaj efikaj; kiel ĝenerala gvidlinio, oficiala ekstera komunikado rilate al la civitano aŭ komunikado en la kadro de politika mandato devas kovri ĉiujn oficialajn lingvojn de la membroj de la koncerna internacia aŭ supernacia organizaĵo, institucio aŭ asocio, kvankam interna komunikado necesigas komunan efikan ilon por interkompreniĝi; tiel longe kiel tia(j) laborlingvo(j) estas nacia(j) lingvo(j), diskriminacio daŭros en komunikado. (**distingo inter ekstera komunikado laŭ "homaj rajtoj" kaj interna profesia komunikado**)
4. Ĉiu kiu ŝatas labori en la kampo de internaciaj kaj supernaciaj rilatoj, devas havi la profesiajn konojn inkluzive de la necesaj lingvaj kvalifikoj de komunikado por la aktivecoj postulataj de la firmao, asocio, organizaĵo aŭ institucio koncerna. (**principo de profesia kvalifiko**)
5. Tiel longe kiel la gepatra lingvo de specifa grupo aŭ komunumo estas uzata en internacia komunikado, lingvodiskriminacio ekzistas. (**principo de egalaj kondiĉoj**)
6. El vidpunkto de mezaj kaj longtempaj aspektoj, lingva diverseco kaj nediskriminacio en la kampo de komunikado (lingvouzado) povas esti garantiitaj nur per la akcepto de la principo lerni du lingvojn krom la gepatra lingvo: unu universalan helplingvon aŭ lingvan modelon por internacia, transnacia kaj interetna komunikado kaj unu alia lingvon (regionan aŭ nacian) laŭ la privata aŭ profesia prefero de la parolanto. (**principo de diverseco ene de unueco**)
7. La nuna jura situacio de la lingvouzado en internaciaj kaj transnaciaj institucioj verŝajne ne povas esti ŝanĝota, ĉar en preskaŭ ĉiuj kazoj unuanimeco estas postulata por iu ajn modifo. (**principo de nacia suvereneco**)

La "strategio":

1. La nuna jura situacio rilate al komunikado (lingvouzo) en internaciaj organizaĵoj kaj ene de la eŭropaj institucioj tial devus esti startpunkto de la pripensado por organizi novan ordon en internacia kaj supernacia komunikado.
2. Rilate al la laborlingvo(j) en tiuj organizaĵoj kaj institucioj, al ĉiuj kiuj ne povas skribi kaj paroli en sia gepatra lingvo devus esti prezentita la opcio uzi neŭtralan universalan helplingvon kiel aldonan laborlingvon.
3. Studoj pri ebligo, kapabloj kaj limoj de universalaj lingvomodeloj aŭ planitaj lingvoj devus esti faritaj pere de la kompetentaj instancoj de la koncerna organizaĵo, institucio aŭ asocio en efika kunlaboro kun siaj membroj.

4. Tiu procezo lerni universalan helplingvon devas esti organizita sur bazo de libera elekto.
5. Post science kontrolitaj kaj sukcesplene faritaj lingvoeksperimentoj, unu universala helplingvo devus esti aldonita al la ekzistanta(j) laborlingvo(j) en la internaciaj organizaĵoj, multlingvaj ŝtatoj, unioj kaj komunumoj.
6. Observejo pri lingvouzado kaj komunikadproblemoj en internaciaj rilatoj devus esti komune konceptita de UN, UNESKO kaj EU.
7. La tuta proceso selekti "mondan helplingvon" devus esti farita sub scienca kaj demokrata kontrolo. (**publika malfermo kaj trarigardo**)

Lingva egaleco sur la fono de lingva diverseco

SU Jinzhi

Instituto de Aplikata Lingvistiko ĉe la Ministerio de Edukado, Ĉinio

1. Lingva egaleco strikte rilatas al la ŝtata suvereneco kaj la lingva rajto de la homaro

La lingva egaleco estas bazo de la socia egaleco. Sen lingva egaleco ne ekzistas la egalecoj politika, ekonomia kaj kultura, por ne paroli pri la nacia egaleco kaj respekto de la homaj rajtoj. Alivorte, la lingva egaleco havas striktan rilaton kun la ŝtata suvereneco kaj la lingva rajto de la homaro. En la lasta tempo la internacia socio esploris pri la lingva problemo el la starpunkto pri la homaj rajtoj kaj konkludis, ke la lingva rajto estas fundamenta homa rajto. Tiu tezo iagrade influis la socion. La lingva egaleco estas grava enhavo de la lingva rajto. Kie ne estas lingva egaleco, tie ne estas garantio por la lingva rajto kaj tie estos komplikaĵo de la homaj rajtoj. En internacia kontakto, lingvoj estas la plej grava komunikilo. Kiu lingvo estas taŭga por garantii la egalan pozicion de la rilataj landoj en la internacia komunikado kaj por ne malhelpi ilian suverenecon, tio estas malfacila problemo implikanta la internacian socion. Iuj havas difinon pri sia nacia lingvo en sia konstitucio, same grava kiel la naciaj flago, blazono kaj himno kaj prenas la lingvon kiel simbolon de sia nacio. En internacia kontakto respekti lingvon de aliaj landoj estas fundamenta kvalito posedenda por ĉiuj personoj. Kompreneble la lingvoj funkcias ĉefe en komunikado. Ni ne devas egaligi la problemon pri lingvouzado kun suvereneco kaj homaj rajtoj, alie ni komplikos la simplajn aferojn kaj malhelpos la normalan lingvouzadon. Unuvorte, solvi la problemon pri lingva neegaleco estas ne nur teoria problemo de la lingvaj projektantoj, sed ankaŭ leĝa problemo solvenda en la tuta socio.

2. La internacia socio longe atentis la problemon de lingva egaleco.

Jam antaŭ longe la internacia socio donis grandan atenton al la problemo de lingva egaleco. Multaj leĝoj kaj reguloj havas artikolon pri lingva egaleco. Ili celas ĉefe protekti la lingvojn por ne kaŭzi neegalecon pro la lingva diverseco. Tiuj leĝoj kaj reguloj povas dividiĝi en tri kategoriojn: unue, internaciaj dokumentoj, kiel la dokumentoj de UN: "Universala deklaracio de homaj rajtoj" (1948), "Konvencio de Unesko kontraŭ diskriminacio en edukado" (1960) kaj "Internacia konvencio pri civilaj kaj politikaj rajtoj" (1966); due, regionaj dokumentoj, kiel "Ĉarto de Parizo pri nova Eŭropo" (1990), "Amerika konvencio pri homaj rajtoj" (1969) kaj "Afrika Ĉarto pri homaj kaj popolaj rajtoj" (1986), kiuj ĉiuj havas klaran difinon kontraŭ neegala traktado kaj diskriminacio pro diferenco de la parolataj lingvoj; trie, la konstitucioj de diversaj landoj. Ni esploris la konstituciojn de 186 landoj kaj regionoj. Tiuj de 26 landoj ne tuŝis lingvojn: Angolo (1992), Aŭstralio (1900), Butano (1998), Ĉilio (1980),

Ĉeĥio (1992), Danlando (1953), Dominika Respubliko (1994), Gambio (1970), Ganao (1992), Gvineo-Bisaŭo (1996), Islando (1991), Israelo (1994), Japanio (1946), Birmo (1974), Nederlando (1983), Korea Respubliko (1948), San-Marino (1926), Siera-Leono (1991), Svazilando (1968), Tanzanio (1984), Tongo (1988), Trinidado kaj Tobago (1980), Santomeo kaj Principo (1998), Britio (1998), Urugvajo (1997), kaj Usono (1992). En la konstitucio de tiuj landoj mankas artikolo pri lingvoj, tamen aliaj leĝoj de iuj el ili havas tian artikolon. Ekz. iuj ŝtatoj de Usono difinis sian oficialan lingvon kaj ĝia parlamento aprobis "Leĝon pri indiĝenaj lingvoj", por protekti la indiĝenan lingvon. La konstitucioj de 160 landoj kaj regionoj havas artikolon pri lingvoj, kaj el ili 68 landoj difinis la enhavon de la lingvoj simila al tiu de UN en sia konstitucio, dum aliaj landoj kaj regionoj, kvankam ili ne havas klaran artikolon en la konstitucio, tamen havas similan enhavon, ekzemple, la Konstitucio de la Ĉina Popola Respubliko ne havas similan artikolon kiel tiu de UN, tamen la kvara artikolo de la ĝenerala programo de la konstitucio difinis, ke "ĉiuj nacioj estas egalaj" kaj "ĉiuj nacioj havas liberecon uzi kaj disvolvi siajn lingvojn parolan kaj skriban". Ankaŭ la "Leĝo pri naci-regiona aŭtonomeco de la Ĉina Popola Respubliko", la "Leĝo pri komunaj lingvoj parola kaj skriba de la Ĉina Popola Respubliko" kaj aliaj leĝoj portas similan enhavon. La detaloj de la koncernaj artikoloj pri lingvoj en la konstitucio de diversaj landoj legiĝas en la tabelo ĉe la fino de ĉi tiu prelego.

En la dokumentoj de UN kaj konstitucio de multaj landoj ni rimarkis, kiel la internacia socio alte taksas la lingvan egalecon. Malgraŭ tio, ni opinias, ke la lingva egaleco vere realiĝos nur post longa tempo. Portempe estas ne stranga la lingva neegaleco antaŭ la naskiĝo de internacia komuna lingvo en la internacia kontaktado. Ekz. la laborlingvoj de UN estas la angla, franca, ĉina, rusa, hispana kaj araba, tamen la dokumentoj de UN plejparte estas skribitaj en la angla lingvo, dum la aliaj lingvoj estas uzataj malpli multe ol la angla. Se oni ne komprenas la anglan lingvon, oni ne komprenas la dokumentojn, kaj sen la koncernaj versioj oni ne povas akiri la gravajn internaciajn informojn, tial la lingva rajto ne povas esti sufiĉe garantiata kaj estas malfacile por tiuj ĝui la efektivan lingvan egalecon.

3. La principo pri lingva diverseco estas grava kaj efika rimedo por solvi la problemon de la lingva neegaleco en la internaciaj rilatoj.

(1) Rimedoj por solvi la lingvan neegalecon

Estas du rimedoj por solvi la problemon pri lingva neegaleco internacie. La unua estas serĉi aŭ krei internacian komunan lingvon. La dua estas firme teni la principon pri lingva diverseco. Tiuj du rimedoj ne estas perfektaj. Se oni elektas iun el la naturaj lingvoj kiel la internacian komunan lingvon, tio, kvankam utila por la ekonomia kaj informada tutmondiĝo, tamen malutilas al la principo pri lingva kaj kultura diverseco kaj eĉ kaŭzos velkiĝon kaj eĉ pereon de multaj lingvoj kaj kulturoj kaj detruos la mondan kulturan plurismon. Laŭ nekompleta statistiko, nun en la mondo estas 6700 lingvoj. Iuj lingvistoj taksis, ke en la 21-a jarcento 90% el ili malaperos, kaj aliaj opinias, ke pereos eble 80% sed minimume 70%. Alivorte, en la 21-a jarcento malaperos 4700 lingvoj. Malapero de multaj malfortaj lingvoj certe kaŭzos

unuformecon lingvan kaj kulturan, eĉ kaŭzos monotonecon de la homa pensmaniero. Ni kompreneble ne volas tion vidi. Unesko okazigis fakulan simpozion pri pereontaj lingvoj marte 2003 en Parizo, kie oni diskutis, kiun rolon devas ludi Unesko en tiu problemo kaj kiel ĝi devas kunordiĝi kun la registaraj, neregistaraj kaj esploraj institucioj; taksis la protekton de la pereontaj lingvoj; diskutis pri la sistemo por protekti la pereontajn lingvojn kaj disvolvi la internacian kunlaboron; kaj ellaboris agadplanon de Unesko por 2004-2005 cele al protektado de la pereontaj lingvoj. Malgraŭ tio, pro plirapidiĝo de la ekonomia integriĝo la angla lingvo fariĝas pli kaj pli influa kaj jam vidiĝas la tendenco, ke la malfortaj lingvoj pli debiliĝos kaj pereos. La principo pri lingva diverseco utilas al diverseco kaj lingva kaj kultura, sed ne utilas al la ekonomia kaj informada tutmondiĝo, nek al la libera socia interŝanĝo. UN devas elspezi multe por tradukado en siaj ses laborlingvoj. Antaŭe Eŭropa Unio konsistis el 15 landoj kaj havis 11 oficialajn lingvojn, sed nun ĝi havas 25 membrojn kaj 9 pliajn oficialajn lingvojn, tial ĝi havas 20 oficialajn lingvojn entute kaj ĉiujare ĝi devas elspezi miliardon da eŭroj sole por tradukado. Nun la situacio pri uzado de lingvoj estas komplika, kaj estas neimageble uzi nur unu rimedon. Oni devas kombini tiujn du rimedojn en la praktikado; nur tiamaniere oni povos solvi la problemon pri lingva neegaleco kaj komplete realigi la lingvan egalecon en la internacia socio. La internacia komuna lingvo estas grava rimedo por radikale solvi la problemon, sed ne la sola rimedo, nek la plej grava rimedo. La principo pri lingva diverseco estas ne nur la ĉefa rimedo por solvi la lingvan neegalecon en la internacia socio, sed ankaŭ grava principo observenda post fina solvo pere de internacia komuna lingvo; tial ĝi estas la plej grava rimedo por solvi la problemon pri lingva neegaleco kaj ankaŭ la plej efika rimedo por solvi tiun problemon en la internaciaj rilatoj.

(2) Kio estas la principo pri lingva diverseco?

Tiu principo signifas, ke en la mondo la lingvoj estas multaj kaj ĉiu el ili havas sian valoron por ekzisti kaj devas havi la rajton egalan. La diferenco estas nur en iliaj funkcioj. La diversfunkciaj lingvoj povas ludi sian rolon sur malsamaj kampoj de la socia vivo. Ekzemple pri la homa egaleco, post naskiĝo ĉiuj homoj estas egalaj, kaj la diferenco kuŝas nur en tio, ke ili ludas malsaman rolon en malsama socia vivo kaj sur malsama kampo, kaj ili ne devas esti traktataj malsame pro sia malsama funkcio. Tiel statas ankaŭ la lingvoj. La lingvouzantoj ne devas esti traktataj malsame pro la malsama funkcio de iliaj lingvoj. La principo pri lingva diverseco ne ekskluzivigas la internacian komunan lingvon, sed male, laŭ tiu principo oni devas uzi la internacian komunan lingvon kaj samtempe ne rifuzi la nekomunajn lingvojn, sed devas formi plurisman lingvan dispozicion, en kiu oni devas preni la internacian komunan lingvon kiel la ĉefan, dum ekzistas pluraj lingvoj. Nuntempe en la mondo la ĉefa fluo koncerne la lingvouzadon estas lingva diverseco, kaj en la tempo, kiam ankoraŭ ne formiĝis la internacia komuna lingvo, oni devas persisti en la principo pri lingva diverseco, ĉar nur tiamaniere oni povos realigi la lingvan egalecon.

La lingva egaleco bezonas internacian komunan lingvon. Post la naskiĝo de la internacia komuna lingvo oni devas egale trakti aliajn nekomunajn lingvojn. Jen kial

en nia socio oni malfacile traktas la problemon pri lingva egaleco. Pro diferenco de la homoj kaj lokoj la lingvoj havas malsamajn funkciojn. Iuj el ili havas funkcion de komuna lingvo, dum la aliaj ne. Ankaŭ la komunaj lingvoj estas malsamaj: komune uzata internacie, en kelkaj landoj aŭ en iuj regionoj. Ĝenerale dirite, estas nur unu aŭ kelkaj komunaj lingvoj, sed ekzistas samtempe la nekomunaj lingvoj, iuj el ili estas gepatraj lingvoj de siaj uzantoj. Uzante la komunan lingvon, oni ne devas forlasi sian gepatran lingvon, kiu entenas la kulturon kaj pensmanieron akumulitajn dum longa tempo de lia nacio. Protekti la gepatrajn lingvojn kaj trakti ilin same kiel la komunan lingvon estas problemo zorgenda internacie.

(3) La hegemonio de la angla lingvo maltrankviligas la internacian socion.

La hegemonio de la angla lingvo damaĝas la principon pri lingva diverseco kaj kaŭzas la lingvan neegalecon en la internaciaj rilatoj. Ĉar la angla lingvo estas multe uzata internacie, ĝi do estas rigardata de iuj kiel la efektiva internacia komuna lingvo. Tio altiras la atenton de la internacia socio. La fakuloj sin okupantaj pri lingva egaleco opinias, ke tio estas malutila al la lingva egaleco. El la 186 landoj kaj regionoj, kiujn ni enketis, 112 havas klaran difinon pri la nacia lingvo aŭ oficiala lingvo de sia lando. La nacia kaj oficiala lingvoj ĝenerale estas propralanda lingvo. La suba tabelo montras, ke 78 landoj prenis sian propran lingvon kiel la oficialan. Jenaj landoj prenis alilandan lingvon kiel oficialan lingvon: 15 prenis la anglan lingvon, 20 – la francan, 12 – la hispanan, 5 – la araban, 3 – la portugalan, 3 – la germanan, 2 – la turkan, 1 – la italan kaj 1 – la grekan. Kvankam la angla lingvo estas pli multe uzata internacie, tamen kiel la oficiala lingvo ĝi ne estas uzata en tiel multe da landoj, kiel la franca. Videblas, ke internacie estas tendenco kontraŭ la angla lingvo. Eĉ en la konstitucioj de Usono, Britio kaj Aŭstralio, kie la angla lingvo estas plej multe uzata, ankoraŭ mankas difino, ke la angla lingvo estas oficiala lingvo. La usona registaro ne difinis, ke la angla lingvo estas oficiala lingvo, ĉar en Usono estas malsamaj opinioj, tial ĝi ne povas fari tiun difinon. Ĝis la fino de 2000 en Usono 20 ŝtatoj difinis, ke la angla estas ilia oficiala lingvo, dum en 12 ŝtatoj tiu propono ne estis aprobita. En 1988 la ŝtato Arizono per 51% de la balotiloj sankciis "Leĝon pri la oficiala lingvo", en kiu la angla lingvo estas difinita kiel la oficiala. Tamen en 1998 la supera kortumo de Arizono konkludis, ke tiu leĝo malobservas la artikolon pri garantio de la libereco de parolo laŭ la unua amendo de la konstitucio kaj tiun pri egaleco laŭ la 14-a amendo de la konstitucio. La lingva leĝodonado de Francio kaj Kanado ja estas kontraŭstara al hegemonio de la angla lingvo. La Dominika Respubliko, Grenado kaj Malavio difinis en sia konstitucio, ke la parlamentanoj devas posedi la anglan lingvon, dum Mikronezio, kvankam ĝi difinis en sia konstitucio, ke la angla estas laborlingvo de la parlamento, tamen ne difinis, kiun nivelon devas havi la parlamentanoj; anstataŭ tio legiĝas tie la teksto, ke se la parlamentanoj ne povas flue paroli en la angla lingvo, ili povas uzi sianacian lingvon, dum la parlamento devas fari tradukadon por ili. Multaj landoj difinis sian lingvon kiel nacian aŭ oficialan lingvon, protektas la gepatran lingvon kaj la lingvon de minoritatoj. Tio celas preventi entrudiĝon de la potencaj lingvoj, protekti la ŝtatan suverenecon kaj la lingvan rajton de la civitanoj.

(4) Persisti en la principo de la lingva diverseco kaj venki la hegemonion de la angla lingvo

La ses laborlingvoj de UN devas esti gravaj lingvoj en la internacia komunikado kaj plene ludi sian rolon. La hegemonio de la angla lingvo en la internacia komunikado devas esti forigita. La ĉina lingvo estas la lingvo uzata de plejmulto de la homoj en la mondo. Ĝi havas longan historion kaj brilan kulturon. La moderna ĉina lingvo asimilis ne nur dialektojn de multaj lokoj de Ĉinio kaj raciajn elementojn de la nacimalplimultaj lingvoj de Ĉinio, sed ankaŭ utilajn elementojn de la ĉina lingvo uzata alilande kaj iujn utilajn elementojn de alilandaj lingvoj de la mondo. Normaligo kaj reguligo de la ĉina lingvo leviĝas iom post iom kaj leviĝas ankaŭ ĝia efiko en reala komunikado. Internacie pli kaj pli multe da homoj nun lernas ĝin, tial ĝi havas plenan eblecon fariĝi unu el la internaciaj komunaj lingvoj. En la internacia komunikado eksterlandanoj respektas, uzas kaj disvastigas la ĉinan lingvon. Kompreneble ankaŭ ni respektas iliajn lingvojn kaj pro bezono lernas kaj aplikas ilin. En la internacia komunikado la reciproka lernado de malsamaj lingvoj utilas al formiĝo de plurisma dispozicio de la mondaj lingvoj kaj realiĝo de lingva egaleco en la internaciaj rilatoj.

(5) Preni Esperanton kiel internacian komunan lingvon utilas al la principo pri lingva diverseco.

Esperanto estas la plej bona elekto kiel internacia komuna lingvo, ĉar ĝi ne estas lingvo nacia, nek ŝtata. Ĝi estas kreita de amanto de mondpaco kaj demokratio. Ĝi estas artefarita kaj kompare facile lernebla lingvo kun klaraj komunikilaj trajtoj. Lerni ĝin malutilas al neniu lingvo, t.e. ne povas kaŭzi malaperon de alia lingvo ŝarĝita de iu kulturo, kaj – pli grave – ĝi ne damaĝas la ŝtatan suverenecon, sed utilas al realiĝo de lingva egaleco; tamen nuntempe ĝia uzado ankoraŭ ne atingis la gradon, kiun devas atingi la internacia komuna lingvo kaj ne povas solvi la problemon pri lingva egaleco. Esperanto naskiĝis antaŭ pli ol 100 jaroj kaj en tiu periodo ĝi multe evoluis kaj disvastiĝis. En tiu periodo multaj fervoruloj energie lernis kaj disvastigis ĝin. Esperanto multe influis la intelektulajn rondojn kaj nun la nombro de la homoj posedantaj Esperanton jam superis dek milionojn. Tiu nombro ja estas neniom pli malgranda ol tiu de iuj kolektivoj, kiuj parolas minoritatan lingvon, tamen dek milionoj estas nur malgranda procento de la tuta loĝantaro de la mondo, alivorte estas ankoraŭ granda distanco por esti reala internacia komuna lingvo. Bedaŭrinde, mi ne havis ŝancon lerni Esperanton. Eble ankaŭ tio estas la kaŭzo kial Esperanto ne estas rigardata kiel la reala internacia komuna lingvo. Por ke Esperanto fariĝu centprocenta internacia komuna lingvo, ĝi devas fariĝi laborlingvo de UN, lingvo uzata en la oficiala internacia komunikado kaj precipe en diplomatiaj aktivadoj. Por tio oni devas disvastigi ĝin antaŭ ĉio en lernejoj. Se ĝi ne povas fariĝi lingvo de edukado, almenaŭ ĝi devas fariĝi deviga lernobjekto. Se ĉiuj diplomitoj de mezlernejo povos aŭskulti, paroli, legi kaj skribi en Esperanto, la nombro de Esperanto-uzantoj multe grandiĝos en la mondo, kaj tiam la lingvo havos firman bazon en la internacia komunikado. Tio ja bezonas subtenon de registaro kaj precipe de ĝiaj edukaj departementoj kaj ilian financan subtenon. La lernado de lingvoj havas siajn proprajn regulojn kaj oni devas progresi iom post iom. Por ke plejparto de la

loĝantoj de la mondo posedu Esperanton, oni devas atendi ankoraŭ longan tempon. Sed kiom longa tiu tempo? Eble neniu scias hodiaŭ.

Esperanto devas fariĝi gvida lingvo en la internacia komunikado. Mi kredas, ke pli kaj pli multe da homoj lernos Esperanton kaj disvastigos ĝin. Esperanto fariĝos vera lingvo de la tutmonda popolo; tio ja ne estas revo, sed pli kaj pli klara realo. La ĉina popolo batalis jam longan tempon por la lingva egaleco en la internaciaj rilatoj. Multaj famuloj de Ĉinio, kiel Lusin kaj Bakin, aktive subtenis la Esperanto-movadon. Multaj intelektuloj, kiel Cai Yuanpei, Hujucz kaj Chen Yuan, faris siajn kontribuojn por disvastigi Esperanton en Ĉinio. Tio bone montris, kiel forte la ĉina popolo amas Esperanton, kiel ĝi fervore aspiras al la lingva egaleco. Mi kredas, ke dank' al senlaca penado de la personoj pacamaj, demokratiaj kaj pledantaj por egaleco, la perspektivo de Esperanto certe estos pli kaj pli brila, kaj Esperanto finfine fariĝos gvida lingvo por realigi la lingvan egalecon en la tuta mondo.

La artikoloj pri lingvoj en la konstitucio de diversaj landoj

Lando (dato de publikigo aŭ revizio de la konstitucio)	**Ĉefa enhavo de la artikolo pri lingvoj en la konstitucio**	**Jes/Ne**[1]
Afganio (1987-11-30）	Difino pri la lingvoj uzataj en eduko, eldono kaj justico	Ne
Albanio（1998-08-04）	La albana estas oficiala lingvo	Jes
Alĝerio（1976-11-19）	La araba estas oficiala lingvo	Ne
Andoro（1976-04-28）	La kataluna estas oficiala lingvo	Ne
Antigvo kaj Barbudo（1981-11-01）	Difino pri justica lingvo kaj la nivelo de la angla lingvo de la parlamentanoj	Ne
Argentino（konstitucio en 1853，amendo en 1998）	Politiko pri dulingva edukado	Ne
Armenio（1995-07-05）	La armena estas oficiala lingvo	Jes
Aŭstrio（1929）	La germana estas oficiala lingvo	Jes
Azerbajĝano（1995-11-12）	La azera estas nacia lingvo	Jes
Bahamoj（1973-07-10）	Difino pri justica lingvo	Ne
Bangladeŝo（1972-11-04）	La bengala estas nacia lingvo	Ne
Barbadoso（1966-11-30）	Difino pri justica lingvo	Ne
Barejno（1973-05-26）	La araba estas oficiala lingvo	Jes
Belgio (konstitucio en 1831, amendo en 1994-02-17）	Detale pri plurlingva politiko	Ne
Belizo（1981-09-21）	Difino pri justica lingvo	Ne
Belorusio（1994-03-15）	La belorusa estas oficiala lingvo	Jes
Benino（1990-12-11）	Pri lingva rajto	Ne
Bocvano（1966-09-30）	Difino pri justica lingvo kaj la nivelo de la angla lingvo de la parlamentanoj	Ne

[1] Ĉu estas klara difino pri la lingva egaleco en la koncerna artikolo de la konstitucio? (jes aŭ ne)

Bolivio(konstitucio en 1962-02-02, amendo en 1994-04-01)	Difino pri justica lingvo kaj lingva egaleco	Jes
Brazilo（1988-10-05）	La portugala estas oficiala lingvo; protekto de la gepatra lingvo de indianoj	Ne
Brunejo（1959-09-29）	La malaja kaj angla estas oficialaj lingvoj kaj cirkonstacoj de ilia uzado	Ne
Bulgario（1991-07-12）	La bulgara estas oficiala lingvo; lingvaj rajtoj de la civitanoj	Ne
Burkina-Faso（1977-11-27）	La franca estas oficiala lingvo	Ne
Burundio（1992-03-13）	La kirunda estas nacia kaj oficiala lingvo	Ne
Centrafrika Respubliko(1995-01-14)	La sangoa kaj franca estas oficialaj lingvoj	Ne
Cipro（1960-04-06）	La greka kaj turka estas oficialaj lingvoj	Ne
Ĉina Popola Respubliko （konstitucio en 1982-12-04，amendo en 2004-03-14）	Ĉiuj nacioj havas liberon disvolvi sian nacian lingvon. La ŝtato disvastigas komunan parolan lingvon kaj justican lingvon, kaj oni rajtas uzi la naciajn lingvojn en naci-aŭtonomaj regionoj	Ne
Demokratia Respubliko de Kongo-lando（1998-11-14）	La franca kaj angla estas oficialaj lingvoj kaj kvar lokaj lingvoj – naciaj lingvoj	Jes
Dominika Respubliko（1978-11-03）	Difino pri justica lingvo; la parlamentanoj devas esti kapablaj legi kaj paroli en la angla	Ne
Egiptio（1971-09-11）	La araba estas oficiala lingvo	Jes
Ekvadoro（1998-06-05）	La hispana estas oficiala lingvo	Jes
Ekvatora Gvineo（1988-09-01）	La hispana estas oficiala lingvo	Jes
Eritreo（1996-07）	Difino pri lingva egaleco kaj justica lingvo	Jes
Estonio（1992-06-28）	La estona estas oficiala lingvo	Jes
Etiopio（1994-12-08）	La amhara estas laborlingvo	Jes
Fiĝioj（1997-07-25）	La angla, fiĝia kaj hindustana estas egalrajtaj. Difino pri justica lingvo	Jes
Filipinoj（1987-02-02）	La filipina estas nacia kaj oficiala lingvo	Ne
Finnlando (nova konstitucio en 1999-06-11）	La finna kaj sveda estas naciaj lingvoj	Jes
Francio（konstitucio en 1958-10-04，amendo en 1992-06-25）	La franca estas nacia lingvo	Ne
Gabono（1991-03-26）	La franca estas oficiala lingvo	Ne
Germanio (konstitucio en 1949-05-23, amendo en 1995）	Difino pri lingva egaleco	Jes
Grekio（1975-06-11）	Difino pri biblia lingvo	Jes
Grenado（1973-12-19）	Difino pri justica lingvo kaj pri tio, ke parlamentanoj devas esti kapablaj paroli kaj legi en la angla	Ne
Gvatemalo (konstitucio en 1985-05-31, amendo en 1993）	La hispana estas oficiala lingvo kaj difino pri dulingva politiko	Ne
Gvineo（amendo en 1990-12-23）	La franca estas oficiala lingvo	Jes

Ĝibutio（1992-09-04）	La franca kaj araba estas oficialaj lingvoj	Jes
Haitio（1987-03-10）	La kreola kaj franca estas oficialaj lingvoj	Ne
Hindio (konstitucio en 1949-11-26，amendo en 1996)	La hindia estas oficiala lingvo	Jes
Hispanio（1993-12-12）	La kastilia estas oficiala lingvo	Ne
Honduraso （1982-01-20）	La hispana estas oficiala lingvo	Ne
Hungario (konstitucio en 1949-08-2，amendo en 1996）	Difino pri protekto de la gepatra lingvo	Jes
Indonezio（1945-08）	La indonezia estas oficiala lingvo	Ne
Irako（1970-07-16）	La araba estas oficiala lingvo	Jes
Irano（1979-10-24）	La persa estas oficiala lingvo	Jes
Irlando（1937-07-01）	La irlanda estas la unua oficiala lingvo, kaj la angla – la dua	Ne
Italio（1947-12-22）	Difino pri protekto de nacimalplimultaj lingvoj kaj lingva egaleco	Jes
Jamaiko（1962-07-24）	Difino pri justica lingvo	Ne
Jemeno（1994-09-29）	La araba estas nacia lingvo	Ne
Jordanio（1952-01-01）	La araba estas oficiala lingvo	Jes
Serbio kaj Montenegro（1992-04-27）	La serba estas oficiala lingvo	Jes
Kamboĝo（1993-09-21）	La kmera estas oficiala lingvo	Jes
Kamerunio（konstitucio en 1972-06-02，amendo en 1996-01-18）	La angla kaj franca estas oficialaj lingvoj	Ne
Kanado (konstitucio en 1867-03-29, amendo en 1982-04-17）	La angla kaj franca estas egalrajtaj oficialaj lingvoj	Ne
Kartvelio（1995-08-24）	La kartvela estas nacia lingvo	Jes
Kataro（1970-04-02）	La araba estas oficiala lingvo	Ne
Kazaĥio（1995-08-30）	La kazaĥa estas oficiala lingvo	Jes
Kenjo（1963-12-12）	La svahila kaj angla estas oficialaj lingvoj	Ne
Kirgizio（1993-05-05）	La kirgiza estas oficiala lingvo	Jes
Kiribatio（1979-07-12）	Difino pri justica lingvo	Ne
Kolombio（1991-07-05）	La kastilia estas oficiala lingvo	Jes
Komoroj（1996-10-20）	La komora estas oficiala lingvo, la franca kaj araba – naciaj lingvoj	Ne
Kongolando（1992-03-15）	La franca estas oficiala lingvo, du lokaj lingvoj – naciaj lingvoj	Jes
Korea Popol-demokratia Respub-liko (amendo en 1992-04-09）	Difino pri protekto de nacia lingvo	Ne
Kostariko (konstitucio en 1949-11-09, amendo en 1997）	La hispana estas oficiala lingvo	Ne
Kotdivuaro（1960-11-03）	La franca estas oficiala lingvo	Ne
Kroatio（1990-12-22）	La kroata kaj latina estas oficialaj lingvoj	Jes
Kubo (konstitucio en 1976-02-24, amendo en 1992-07）	La hispana estas oficiala lingvo	Ne

Kuvajtio（1962-11-11）	La araba estas oficiala lingvo	Jes
Laoso（1994-08-15）	La laosa estas oficiala lingvo	Ne
Libano（1926-05-23）	La franca estas oficiala lingvo	Ne
Liberio（1986-01-06）	Difino pri la lingvo de leĝodonaj institucioj	Ne
Libio（1969-12-11）	La araba estas oficiala lingvo	Ne
Liĥtenŝtejno（1921-10-06）	La germana estas oficiala lingvo	Ne
Litovio（1992-10-25）	La litova estas oficiala lingvo	Jes
Luksemburgio（1968-10-17）	La leĝo decidas justican lingvon	Ne
Madagaskaro（1992-08-19）	La malagasa estas oficiala lingvo	Ne
Makedonio（1991-11-17）	La makedona estas oficiala lingvo	Jes
Malajzio（1957-08-31）	La malaja estas oficiala lingvo	Ne
Malavio（1994-05-16）	Difino pri justica lingvo. La parlamentanoj, ministroj kaj vicministroj devas esti kapablaj legi kaj skribi en la angla lingvo	Jes
Maldivoj（1997-11-27）	La diveha estas oficiala lingvo	Ne
Malio（1992-02-27）	La franca estas oficiala lingvo	Jes
Malto（1964）	La malta estas nacia lingvo	Ne
Maroko（konstitucio en 1972-03-10, amendo en 1992-09-04）	La araba estas oficiala lingvo	Ne
Marŝalaj Insuloj（1979-03-01）	Difino pri lingva egaleco	Jes
Maŭricio（1968-03-12）	La angla estas oficiala lingvo de la parlamento	Ne
Maŭritanio（1991-07-12）	La araba, poulara, soninka kaj ŭolofa estas naciaj lingvoj; la araba estas oficiala lingvo	Ne
Meksiko（konstitucio en 1917，amendo en 1992）	Difino pri protekto de la lokaj lingvoj	Ne
Mikronezio（1978-07-12）	La nivelo de la angla lingvo ne estas necesa kondiĉo por parlamentaniĝo	Jes
Moldavio（1994-07-29）	La moldava estas nacia lingvo	Jes
Monako（1992-12-24）	La franca estas oficiala lingvo	Ne
Mongolio（1992-01-13）	La mongola estas oficiala lingvo	Jes
Mozambiko（1990-11）	La portugala estas oficiala lingvo	Ne
Namibio（1990-02）	La angla estas oficiala lingvo	Jes
Naŭro（1968-01-29）	Difino pri la justica lingvo	Ne
Nepalo（1990-11-09）	La nepala estas oficiala lingvo	Jes
Niĝerio（amendo en 1979-10-01）	Difino pri la justica kaj parlamenta lingvoj	Ne
Niĝerlando（1996-04-20）	La franca estas oficiala lingvo	Jes
Nikaragvo（1987-01-09）	La hispana estas oficiala lingvo	Jes
Norvegio（1814-05-17）	La ŝtatoficistoj devas esti kapablaj paroli en la nacia lingvo	Ne
Nov-Zelando（1990）	Difino pri protekto de nacimalplimultaj lingvoj kaj justica lingvo	Ne
Omano（1996-11-06）	La araba estas oficiala lingvo	Jes
Orienta Timoro（2002-03-22）	La portugala estas oficiala lingvo	Jes

Pakistano（1973-04-10）	La urdua estas nacia lingvo	Ne
Palaŭo（1980-07-09）	La palaŭa estas nacia lingvo, la palaŭa kaj angla estas oficialaj lingvoj	Jes
Panamo（1972-10-11）	La hispana estas oficiala lingvo	Ne
Papuo-Novgvineo（1975-09-16）	Difino pri justica lingvo	Ne
Paragvajo（1992-06）	La hispana kaj gvarana estas oficialaj lingvoj	Ne
Peruo（1993-12-29）	La kastilia estas oficiala lingvo; la lingvoj keĉua kaj ajmara kaj aliaj lokaj lingvoj estas naciaj lingvoj	Jes
Pollando（1997-04-02）	La pola estas oficiala lingvo	Jes
Portugalio（1976-04-02）	Difino pri la pozicio de la portugala lingvo	Jes
Ruando（1991-05-30）	La ruanda estas nacia kaj oficiala lingvo，ankaŭ la franca estas oficiala lingvo	Ne
Rumanio（1970-04-02）	La rumana estas oficiala lingvo	Jes
Rusio（1993-12-12）	La rusa estas nacia lingvo	Jes
Salomonoj（1978-07-07）	Difino pri justica lingvo	Ne
Salvadoro（1983-12-20）	La hispana estas oficiala lingvo	Ne
Samoo	Difino pri justica lingvo kaj lingva egaleco	Jes
Sankta Kito kaj Neviso（1983-09-19）	Difino pri justica lingvo	Ne
Sankta Lucio（1979-02-22）	La parlamentanoj devas posedi la anglan lingvon	Ne
Sankta Vincento kaj Grenadinoj（1979-10-27）	Difino pri justica lingvo kaj la parlamentanoj devas posedi la anglan lingvon	Ne
Saŭd-Arabio（1992-03）	La araba estas oficiala lingvo	Ne
Sejĉeloj（1993-06-08）	La angla, kreola kaj franca estas naciaj lingvoj	Ne
Senegalio（1992-03-03）	La franca estas oficiala lingvo; kvar lokaj lingvoj estas naciaj lingvoj	Ne
Singapuro（1963-09-16）	La parlamentanoj devas posedi almenaŭ unu el la jenaj kvar lingvoj: la angla, malaja, ĉina kaj tamila, kiuj estas ankaŭ uzataj en la parlamentaj aktivadoj	Ne
Sirio（1973-03-12）	La araba estas oficiala lingvo	Ne
Slovakio（1992-09-03）	La slovaka estas oficiala lingvo	Jes
Slovenio（1991-12-23）	La slovenia estas oficiala lingvo	Jes
Somalio（1979-09-23）	La somala kaj araba estas oficialaj lingvoj	Jes
Srilanko（1978-08-31）	La sinhala kaj tamila estas naciaj kaj oficialaj lingvoj	Ne
Sud-Afriko（1996-05-08）	La oficialaj lingvoj estas spedia, sesotoa, setsvana, svata, tŝivenda, sitsonga, afrikansa, angla, debela, ksosa kaj zulua	Jes
Sudano（1998-06）	La araba estas oficiala lingvo	Ne
Surinamo（1987-10-30）	Difino pri lingva egaleco	Jes

Svedio（1975-01-01）	Difino pri protekto de la lingvo de malfortaj kolektivoj	Ne
Svisio（1874-05-29）	La germana, franca, itala kaj reti-romanĉa estas naciaj kaj oficialaj lingvoj	Ne
Taĝikio（1994-11-06）	La taĝika estas nacia lingvo	Jes
Tajlando（1997-09-27）	Difino pri lingva egaleco	Jes
Togolando（1992-09-27）	La franca estas oficiala lingvo	Ne
Tunizio（1959-06-01）	La araba estas nacia lingvo	Ne
Turkio（1982-11-09）	La turka estas nacia lingvo	Jes
Turkmenio (1992-05-18)	La turkmena estas nacia lingvo	Jes
Tuvalo（1986-09-15）	Difino pri justica lingvo	Ne
Ugando（1962-01-01）	La angla estas oficiala lingvo	Ne
Ukrainio（1996-06-28）	La ukraina estas nacia lingvo	Ne
Unuiĝintaj Arabaj Emirlandoj（1971-12-02）	La araba estas nacia lingvo	Ne
Uzbekio（1992-12-08）	La uzbeka estas nacia lingvo	Jes
Vanuatuo（1961-01-23）	La bislama estas nacia lingvo; la bislama, angla kaj franca estas oficialaj lingvoj	Jes
Venezuelo（1961-01-23）	La hispana estas oficiala lingvo	Ne
Verda Kabo（1992-09-25）	Specialaj kaj amikaj rilatoj kun portugallingvaj landoj	Jes
Vjetnamio（konstitucio en 1992-04-15，amendo en 2001-12-25）	Difino pri la pozicio de ĉiuj naciaj lingvoj kaj pri justica lingvo	Ne
Zambio（1991-08-24）	La angla estas oficiala lingvo	Ne
Zimbabvo（1979-12-21）	Difino pri justica lingvo	Ne

(Traduko el la ĉina de Liu Caisheng, Lu Binsheng, Zhu Mingyi)

Tradukservo ĉe Eŭropa Unio

(resumo)

Noel MUYLLE

Direktoro de Tradukservo, Eŭropa Konsilio

1. Lingvo estas la esprimo de homa identeco kaj la rimedo, kiun oni uzas kiam oni partoprenas en debatoj. Lingvo estas elemento de la valoro aldonita, kun konsiderinde gravaj faktoroj ekonomia, komerca, politika kaj belarta.

2. Per kreskigo kaj edukado, oni eksponiĝas al kulturoj de aliaj, kaj al fremdaj lingvoj. Sed oni ne bezonas scion por profesie reguligi ĝin same kiel lingvisto.

3. Krom se li estas perfekte du-lingva aŭ tri-lingva, tre rara kazo, estas por la plejbono de la partoprenanto de iu diskuto, ke li uzu sian plej potencan sed pacan armilon: la lingvon kiun li regas plej bone kaj en kiu li povas esprimi sin plej precize, ordinare sian gepatran lingvon.

4. Kvankam en la mondo estas miloj da lingvoj, nur malgranda nombro el ili estas uzataj pli vaste ol aliaj kiam oni volas esti komprenata de aliaj. Tia estas la mondo. Simple dirite, certe ne utilas paroli la grekan lingvon en Ĉinio, se vi volas esti komprenata aŭ volas komerci. Sed kiel vi bone scias, la organizado de edukado kaj de lingvolernado ankoraŭ apartenas al la membro-ŝtatoj de Eŭropa Unio, ne al la Eŭropa Komisiono.

5. Estas vere, ke la valoro aldonita fare de spertaj lingvaj profesiuloj, kiujn mi nomas "multlingvaj komunikantoj", estas granda en la politika, ekonomia aŭ komerca decidprocezo.

6. Kiel pasinta sperto kaj la praktiko en la nunaj membro-ŝtatoj de EU montris, estas necese koncentri trejnejojn por tradukistoj en kelkaj bonaj centroj, ne dise multajn trejnejojn en multaj landoj.

7. La praktika tradukado kaj interpretado ne estas nun kia ĝi estis antaŭe. Frazo-post-fraza sinsekva interpretado ne plu estas uzata en niaj organizaĵoj, sed multe da traduko estas en samtempa modo kaj bedaŭrinde legado de jam skribitaj tekstoj rapide kreskas. Ĉefe dum oficialaj kunsidoj oni diskutas pri ekonomiaj, sciencaj kaj financaj fakaj aferoj, kaj la finaj politikaj diskutoj aŭ intertraktado okazas dum lunĉo aŭ vespermanĝo aŭ en elektiktaj malgrandaj grupoj.

8. La enkonduko de novaj komputilaj kaj informado-teknologio ne nur revoluciis la instruadon de lingvaj fakuloj sed ankaŭ iliajn labormanierojn.

9. Ne same kiel ordinare konate, la solvo per unu lingvo ne estas la mirakla respondo. Al tiuj kiuj kredas, ke unu komuna lingvo konata tra la mondo solvus nian problemon de komprenigzo, mi demandu:

- Kiu lingvo?
- Kiel ĝi estas lernebla?
- Kiel kompetenta oni devas esti?
- Ĉu ĝi estas komprenebla por ĉiuj aliaj?

10. Malbonaj interpretadoj kaj tradukadoj ofte kaŭzis grandajn diplomatiajn incidentojn kaj leĝajn stagnojn solveblajn nur fare de juĝistoj. Ni vidas tiajn eventojn ĉiutage. Pro tio, troviĝas laborŝancoj por junaj komencantoj. Ili estos alvokataj en venontaj jaroj por anstataŭi spertajn tradukistojn kaj interpretistojn kiam ili emeritiĝos.

Tiel estas en ĉiuj internaciaj organizaĵoj. Mi ofte aŭdas, ke grave mankas interpretistoj al la angla lingvo el la rusa, ĉina, araba kaj japana lingvoj.

(Traduko el la angla de LEE Chong-Yeong)

Lingva egaleco en internaciaj rilatoj: la rolo de Ĉinio[1]

LIU Haitao

Komunikada Universitato de Ĉinio, Pekino

Laŭvorta kompreno de 'internaciaj rilatoj' estas rilatoj inter nacioj. En la dokumentoj pri internaciaj rilatoj oni ofte konsideras la rilatojn inter ŝtatoj, sed la diskutataj rilatoj validas ne nur inter nacioj aŭ ŝtatoj, sed ankaŭ inter laŭleĝaj civitanoj, firmaoj kaj organizaĵoj. Tiuj ĉi rilatoj kovras la rilatojn pri politiko, ekonomio, kulturo kaj scienco. Evidente, lingvo ludas gravan rolon en la realigo de tiuj ĉi rilatoj. Lingvo ekzistas ne nur objektive inter la subjektoj: ĝi ankaŭ estas la ilo kaj rimedo por realigi aliajn rilatojn. Tial oni ne devas malatenti la lingvan faktoron en internaciaj rilatoj. Same, oni ankau devas esplori la lingvan problemon kadre de bazaj principoj de internaciaj rilatoj.

La 28-an de Majo 2003, la ĉina prezidento Hu Jintao prelegis en la Moskva Instituto pri Internaciaj Rilatoj. Laŭ li, por konstrui novan internacian ordon pri politiko kaj ekonomio, oni devas:

- promocii demokration en internaciaj rilatoj;
- gardi kaj respekti la diversecon de la mondo;
- establi novan koncepton pri sekureco kun reciprokaj fido kaj utilo, egaleco kaj kunlaboro;
- akceli ekvilibran evoluadon de la tutmonda ekonomio;
- estimi kaj disvolvi la gravan rolon de Unuiĝintaj Nacioj kaj aparte de ĝia Konsilio pri Sekureco.

Ni nomas tiujn ĉi principojn "egaleco, diverseco kaj ekvilibro de internaciaj rilatoj". Fakte ili ankaŭ estas bazaj principoj, kiujn la ĉina registaro multfoje kaj multloke emfazas. En tiu ĉi prelego la menciitaj principoj gvidos la analizon de la nuna stato de la lingvouzado en internaciaj rilatoj kaj la konstruon de nova internacia lingva ordo.

En verkoj pri internaciaj rilatoj oni bedaŭrinde nur nesufiĉe diskutas la lingvan problemon. Ni ĝojas trovi ion en la verko de Henderson, kiu enhavas ĉapitreton kun la titolo 'La angla kiel tutmonda lingvo'. Laŭ li "la efikeco de tutmonda komunikado parte dependas de la angla. La angla jam fariĝis la *lingua franca* de la tuta mondo, t.e. universala lingvo de la popoloj de diversaj lingvoj kaj kulturoj. Kvinono de la homaro sur la terglobo povas paroli angle, multaj politikistoj kaj sciencistoj kapablas flue interkomuniki per ĝi. Ĝi iom post iom fariĝas la unua kandidato de fremdlingvo de la tuta mondo. La angla ankaŭ estas komuna lingvo

[1] Mi dankas al Detlev Blanke kaj Miĥaelo Sedgley, kiuj lingve glatigis mian tekston.

de mondaj civitanoj"[1]. Ĉu tio estas vera? Jes, la realo eble estas tiom serioza.

Resume, (lingva) neegaleco en internaciaj rilatoj ĉie facile troveblas. Kofi Annan lastatempe diris "la malgaja vero estas ke la hodiaŭa mondo estas pli malegala loko ol ĝi estis antaŭ 40 jaroj"[2]. Sendube li pravas. La nunan internacian lingvan ordon karakterizas neegaleco kaj malekvilibro. Lingvo estas la plej grava komunikilo de la homaro, ĝi ludas neanstataŭigeblan rolon en la nacia ekonomia vivo kaj en la formiĝo de nacia ekonomia sistemo. Anglalingvaj landoj, kiuj simple uzas siajn lokajn lingvajn avantaĝojn (*location rent*), povas akiri grandegajn profitojn kulturajn kaj ekonomiajn. Tiu ĉi nesimetrieco de lingva evoluado ege malhelpas la longdaŭran progreson de la mondo. Lingvo ne nur estas ilo. La historio de disvastigo de lingvoj estas historio de perforta politiko. Se lingvo nur estus ilo, en la mondo malestus multaj konfliktoj kaŭzitaj de lingva malsameco. Se lingvo nur estus ilo, la enmigrintoj en Norda Ameriko antaŭ la fondo de Usono ne estus pene detruintaj la indianajn lingvojn[3]. Lingvo ankaŭ estas ilo por disvastigi kulturon. Ĝi ankaŭ estas ilo profitdona; se ne, oni ne dirus: "La vera nigra oro de Britio ne estas la oleo de la Norda Maro, sed la angla lingvo"[4]. Tiu fakto evidentigas, ke la lingva ordo, bazita sur la angla, malobservas la principojn de egaleco, diverseco kaj ekvilibro en internaciaj rilatoj. Tial fariĝas urĝa tasko de politikistoj, lingvistoj kaj diversdisciplinaj sciencistoj esplori, kiel konstrui novan internacian lingvan ordon surbaze de egaleco kaj aliaj bazaj principoj.

La lingva malegaleco en internaciaj rilatoj ankaŭ faras malegalecojn de aliaj rilatoj, el kiuj atentindas la malegaleco en kultura interŝanĝo. Laŭ statistiko[5] en la jaro 2002, Ĉinio importis la kopirajtojn de 8782 eldonaĵoj el aliaj landoj, el kiuj 4544 estis el Usono, 1821 el Britio. En la sama jaro Ĉinio eksportis nur 190 kopirajtojn al aliaj landoj, el kiuj 9 estis al Usono kaj 6 al Britio. La fakto montras ke tiuj du landoj ne tre interesiĝas pri ĉinaj atingoj. Ega malekvilibro kuŝas en la kultura interŝanĝo inter Ĉinio kaj landoj, kiuj parolas la anglan. Maltrankviligas nin, ke la malegaleco kreskas daŭre. Laŭ statistiko[6] de la urbo Pekino, en la jaro 2002, oni importis el Usono 3536 kopirajtojn; post unu jaro la nombro atingas 4640. Mi ĵus legis novaĵon el hodiaŭa ĵurnalo[7], en kiu oni raportas ke multaj famaj verkistoj de Ĉinio alvokas savi la ĉinan. La verkisto Yu Guangzhong diras: "La angla estas nur ilo por koni la mondon, la ĉina estas nia vera radiko."[8]

Lingvo estas kolektiva komercaĵo[9]. Tio signifas ke pli multaj uzantoj kreas pli

---

[1] Henderson, Conway W. (2004) *International relations: conflict and cooperation at the turn of the 21st century.* Ĉina eldono. Haikou: Hainan eldonejo. p. 423-425.

[2] http://www.cnn.com/2004/WORLD/americas/06/12/annan.un/index.html

[3] Cai, Yongliang (2003) *Yuyan, Jiaoyu, Tonghua.* Beijing: Shehui kexue chubanshe.

[4] Phillipson, Robert (2003) *English-Only Europe? Challenging Language Policy.* London/New York: Routledge. p.150.

[5] http://www.ncac.gov.cn/servlet/servlet.info.StatiServlet?action=list&id=189&issue=2002

[6] http://www.pep.com.cn/200403/ca384486.htm

[7] 2004-05-27

[8] http://cul.sina.com.cn/t/2004-05-27/58970.html

[9] De Swaan, Abram (2001) *Words of the World. The Global Language System.* Cambridge: Polity Press.

grandajn interŝanĝvalorojn. Alidire, pli multaj parolantoj de lingvo produktas pli grandan komunikan valoron por sia individua parolanto. Plialtiĝos ankaŭ ĝia kultura valoro kiel varo. La alta valoro allogos pli multajn homojn lerni ĝin. Tiu pozitiva retrokuplo formos la fenomenon de neĝbulo.

Laŭ uza kampo kaj socia funkcio, ni povas klasifiki la lingvojn en jenajn nivelojn: etna lingvo, ŝtata komuna lingvo, regiona komuna lingvo inter ŝtatoj, internacia lingvo. La studo montras ke la lingva sistemo de la homaro estas strukturita laŭ stela formo. Sur ĉiu nivelo de la sistemo ekzistas unu lingvo, funkcianta kiel interlingvo. Jen la skiza reto:



En la bildo, ĉiu cirklo estas unu lingvo.

Tiuj ĉi interlingvoj ludas la menciitajn rolojn: ŝtata komuna lingvo, regiona komuna lingvo inter ŝtatoj, kaj internacia lingvo. Teorie lingvistikaj trajtoj ne decidas pri tio, kiuj lingvoj funkcias kiel ĉefroluloj de iu nivelo, sed tion faras la ekonomiaj kaj politikaj faktoroj.

La elementoj de la lingva sistemo ne estas en egala loko. La diferenco de loko inter la lingvoj enkondukas neegalecon inter ties parolantoj. Evidente, se ĉiuj interlingvoj estus realigitaj de etnaj lingvoj, en la mondo estus homoj, kiuj ĉiunivele povus komunikiĝi nur per siaj gepatraj lingvoj. Tamen ankaŭ ekzistas homoj, kiuj devas eĉ lerni tri aliajn lingvojn por plenumi la saman taskon! Strukture, tia sistemo estas nestabila kaj facile rompebla. Por altigi la kvaliton de la sistemo, ni povas konverti la stelan strukturon en distribuitan formon. Tie ĉi temas pri tio, kiel nuligi la nivelon de la sistemo por ebligi interkomunikadon inter ĉiuj lingvoj. Sendube, tio ne estas realigebla, ĉar neniu povas regi pli ol 6000 lingvojn! Alia ebla metodo estus, kompaktigi la nivelojn de la sistemo. Tio signifas, ke ĉiu devus povi paroli du lingvojn, la gepatran lingvon kaj komunan lingvon. Tiel ni konstruus universalan dulingvan sistemon. Nun la supremenciita reto fariĝas:



Laŭ reta teorio, la nuna strukturo multe pliboniĝas. Eĉ se ni ne povas atingi la idealan strukturon dulingvan, eblas redukti la nivelojn por plialtigi la fortikecon de la lingva sistemo.

El vidpunkto de tuta egaleco, ĉiu devus lerni alian, komunan lingvon, krom sia gepatra lingvo. Nur sub tiu kondiĉo realiĝos la tuta egaleco kaj universala dulingveco. Certe, la lingvo komuna, kiun ĉiu devus lerni, ne estus la gepatra lingvo de ajnaj homoj en la mondo. Se jes, la sistemo disrompiĝus. La lingvo postulata povas esti nur neŭtrala lingvo. En la jaro 1920 tiu ĉi ideo jam estis proponita al Ligo de Nacioj. Hodiaŭ estas tempo realigi tion.

Nun la angla ludas la rolon de ĉi tiu komuna lingvo. La sistemo eble estas efika kaj praktika, sed certe ne egaleca kaj ideala, ĉar enestas multaj problemoj ĵus menciitaj. Oni povas kontraŭi la anglan kiel komunan lingvon, ĉar ĝi ne estas neŭtrala lingvo, kaj ankaŭ pro tio, ĉar malantaŭ ĝi troviĝas fortega lando. La historio de ĉi tiu landego maltrankviligas nin; ĝi favoras procezon ankaŭ por la popoloj de la tuta mondo, kiu iam estis uzita, por asimili indianojn. Kelkaj esploristoj konsideras jene: se la fortaj lingvoj povus mone kompensi la kostojn, ke la malfortaj lingvanoj lernu la fortan lingvon, la sistemo estus akceptebla. La realaĵo diras al ni, ke la angla jam fariĝis, fariĝas kaj fariĝos la arbo, sur kiu kreskas mona frukto. En ĉi tiu situacio, ni ne rajtas revi ke ili pagos por vi la lerno-koston. Pli timige, nun preskaŭ ĉiuj popoloj de la tuta mondo aktive aliĝas al la vico por ekruli la neĝbulon. Pli kaj pli granda neĝbulo kreas grandegan breĉon de neegaleco. Se diverseco estas la fundamento de la homaro, se unueco povas vivi nur en diverseco, neniu unueco daŭros sen diverseco. Alidire, la grandega neĝbulo ankaŭ kaŝas grandegan danĝeron.

Se la angla aŭ aliaj etnaj lingvoj ne estas taŭgaj kiel tutmonda komuna lingvo, kiel oni povus solvi la kreskantan bezonon je interlingva komunikado?

La sola solvo, almenaŭ teorie senproblema, estas la adopto de neŭtrala planlingvo kiel komuna lingvo. Tiu ideo eble ne estas profitdona en la proksima estonteco, tamen ĝi estas valora kaj necesa por longdaŭra kaj stabila evoluado de la homaro. Tial ni devas traserĉi la eblojn, kiel konstrui novan interlingvan ordon, eĉ se tio ankoraŭ estas nur idealo. En tiu ĉi nova ordo diverslingvuloj povus

interkomuniki sur tute egala fundamento. Ĝi ne nur gardus la diversecon de lingvoj kaj kulturoj, kaj estimus la lingvajn homajn rajtojn de ĉiuj popoloj, ĝi ankaŭ utilus por akceli la ekvilibran evoluadon de la monda ekonomio.

Kompreneble, planlingva solvo ne estas senproblema. Tamen, nun ni scias ke la problemoj estas solveblaj, kaj la solvo estas racia, la solvo povas sufiĉi al ĉiuj kondiĉoj postulataj de la problemoj – ĉar la solvo plenumas la fundamentajn principojn de egaleco, diverseco kaj ekvilibro de internaciaj rilatoj. Alidire, ekzistas jena lingva movado:

Ĝi estas movado por demokratia komunikado; ĝi estas movado por efika lingvo-instruado; ĝi estas movado por la provizo de dulingva ŝanco; ĝi estas movado por lingvaj rajtoj; ĝi estas movado por lingva diverseco[1].

Tio ĉi estas la Esperanto-movado.

La fundamentaj principoj de internaciaj rilatoj, proponitaj de la ĉina registaro, estas taŭgaj por ilin aldoni al la konstruado de nova interlingva ordo en pli vasta nova ordo de internaciaj rilatoj. Tio kondukas al la konkludo, ke en konstruado de nova interlingva ordo, Ĉinio ludos gravan rolon.

Laŭ la ĉina nacia statistika buroo[2] en la jaro 2003 en Ĉinio estis jenaj kvantoj da studentoj: diplomitaj studentoj 651 miloj, nediplomitaj studentoj 11 milionoj kaj 86 miloj, studentoj de meza faklernejo 12 milionoj kaj 402 miloj; studentoj de supera mezlernejo 19 milionoj kaj 648 miloj, studentoj de mezlernejo 66 milionoj kaj 906 miloj, el kiu 22 milionoj kaj 201 miloj estas novaj studentoj. En la ĉina sistemo de edukado la studentoj ĝenerale komencas la lernadon de fremdlingvo en mezlernejo. Tiu fremdlingvo hodiaŭ preskaŭ ĉiam estas la angla. Jen grava indiko: ĉiujare 20 milionoj da studentoj eklernas la anglan en mezlernejo. Tio estas nur komenco de longa vojo. Ĝis la doktoriĝo la studentoj nepre lernas la anglan. Alidire, 100 milionoj da studentoj lernas ĝin en diversnivelaj lernejoj en Ĉinio. Mi konsideras ke tio estos fortega argumento por konstrui novan interlingvan ordon, sed oni devas pli racie redistribui la valoregan rimedon.

Ĉiu lingvo posedas merkatan valoron, aŭ pli precize, valoron de komunikado. Por allogi la lernantojn, la popoloj parolantaj tiun lingvon devas klopodi altigi la valoron de sia lingvo. Jen estas kalkulaj formuloj de komunika valoro (K) de la ĉina, de la angla kaj de Esperanto[3]:

Ĉina: $Kc = p_c \cdot c_c = \frac{Pc}{N} \bullet \frac{Cc}{M}$

Angla: $Ke = p_e \cdot c_e = \frac{Pe}{N} \bullet \frac{Ce}{M}$

Esperanto: $Kes = p_{es} \cdot c_{es} = \frac{Pes}{N} \bullet \frac{Ces}{M}$

Tie, p_c kaj p_e estas antaŭvaloro de la ĉina kaj la angla, ĝi prezentas la proporcion de fluaj parolantoj ĉinlingvaj kaj anglalingvaj en la tuta loĝantaro de la mondo. Atentindas, ke oni uzas la fluan parolanton kiel bazon, kaj ne la gepatran

---

[1] Universala Esperanto Asocio, "Praga Manifesto", 1996.

[2] http://www.stats.gov.cn/

[3] Mi prenas la formulojn el De Swaan (2001).

parolanton, kiam oni kalkulas P. Por klare vidi la problemon, ni povas dividi P en du partojn: P_n kaj P_f. P_n estas la nombro de denaskaj parolantoj de tiu ĉi lingvo. P_f estas la nombro de aliaj fluaj parolantoj de ĉi lingvo, t.e. fremdlingva loĝantaro. Laŭ Gradoll[1] (1999, 2004), la ĉina P_n estas 11,13 cent milionoj, la angla P_n estas 3,72 cent milionoj. Laŭ lia antaŭtakso en la jaro 2050 de 15-25-jaraj homoj, la ĉina P_n havas 1,66 cent milionojn kaj la angla nur 0,65 cent milionojn. Sed la P_f de la angla estas pli granda ol de la ĉina: en la tuta mondo la loĝantaro kun la angla kiel la dua lingvo estas 3,75 cent milionoj, fremdlingva parolantaro de la angla estas 7,50 cent milionoj. La P_f de la ĉina certe estas malpli ol 100 milionoj. C prezentas la valoron de la lingvo funkcianta kiel komuna interlingvo. Estas konate, ke multlingvuloj ligas la diverslingvan mondon en unuon, tiel C ankaŭ esprimas la ligan kapablokvanton kaj forton de la lingvo. c_c, c_e estas ligaj fortoj de du lingvoj, el kiuj Cc kaj Ce estas fremdlingvaj parolantaroj de la ĉina kaj la angla. M estas la nombro de homoj, kiuj povas paroli pli ol du lingvojn. Evidente, la C-valoro de la angla estas ege pli granda ol de la ĉina kaj de aliaj ajnaj lingvoj. Evidente la ĉinoj mem kontribuas al la forteco de la angla! Nun estas tempo kalkuli la K-valoron de Esperanto, ĉar Esperanto estas neŭtrala lingvo, ĝi ne estas gepatra lingvo de ajnaj homoj. Pardonu, mi ne mencias la kelkajn denaskulojn. Ĝi estas konscie kreata lingvo por plifaciligi la internacian komunikadon, tial ni rajtas doni al ĝia p_{es} perfektan poenton 1. Tio estas premio por la nobla idealo de Esperanto. Tamen, lingvo estas komunikilo, ankoraŭ necesas konsideri ĝian K-valoron. En simpligita formulo la K-valoro de Esperanto nur dependas de la C-valoro, t.e. la liga forto de la lingvo. Temas pri forto, kiu ligas diversajn lingvulojn. Tio ankaŭ estas la celo de la Esperanto-movado. Bedaŭrinde la valoro nun ankoraŭ estas tre malgranda. Por ke Esperanto estu la fundamento de nova interlingva ordo, oni devas klopodi pliigi ĝian p_{es}. Tio signifas, ke oni devas varbi pli multajn Esperanto-lernantojn.

Laŭ la menciita formulo ne estas malfacile trovi ke la tri lingvoj en sama sistemo estas intime rilataj. La ĉina havas grandiozan P, sed nun tiu faktoro kontribuas al la fortigo de la angla. Urĝe necesas racie ŝanĝi la situacion. Tio estas antaŭkondiĉo por ke Ĉinio povu multe kontribui al nova interlingva ordo.

Ĉinio estas bona modelo de protektado de lingvoj kaj de lingvaj homaj rajtoj de minoritatoj. En la ĉinaj konstitucio kaj aliaj leĝoj estas klare deklarite ke ĉiuj etnoj rajtas libere uzi kaj evoluigi siajn lingvojn. La administracioj de minoritataj regionoj rajtas uzi sian lingvon kiel laborlingvon. Eĉ pli gravas, ke en lernejoj kaj kursoj, ĉefe havantaj minoritatajn studentojn, la registaro stimulas uzi lernolibrojn, kiuj instruas uzante minoritatan lingvon[2].

La ĉina registaro subtenas la Esperanto-movadon, ĉar Esperanto utile kontribuas por la movado de ĉina nacia liberigo, por la movado de ĉina nova kulturo, ankaŭ por kultura komunikado inter Ĉinio kaj aliaj landoj. La ĉina lingvisto Chen Yuan diris, ke la disvastigo de Esperanto en Ĉinio estas intime ligita

---

[1] Graddol, David (1999) *The Future of English*. Beijing: Waiyu jiaoxue chubanshe. Graddol, David (2004): The Future of Language. *Science*, 303:1329-1331.

[2] Xu, Shixuan (2001): *Bingwei Yuanyan Yanjiu*. Beijing: Zhongyang Mingzu Daxue Chubanshe. p.232. Vidu ankaux la prelegojn de Su kaj Yang en ĉi tiu prelegaro.

kun la reformado de la socio en tiu ĉi lando, tio vivtenas la ĉinan Esperanto-movadon. Li pravas.

En la jaro 1963 la ĉina edukministerio proponis Esperanton kiel elekteblan duan fremdlingvon en la fremdlingva fako. La sama ministerio en la jaro 1982 redeklaris, ke Esperanto rajtas funkcii kiel la dua fremdlingvo en multaj kampoj. Sendube, se Ĉinio disvastigas tiujn bonajn spertojn al la tuta mondo, tio helpos konstrui novan interlingvan ordon.

Kompreneble, estus pli bone, se ni farus jenon:

1. En internaciaj organizaĵoj kaj rilatoj oni flegu la nunan lokon de la ĉina kaj klopodu plialtigi ĝian pozicion. Ni estimu kaj amu nian gepatran lingvon, ĉar memestimo estas antaŭkondiĉo por gajni estimon de aliuloj. Se Ĉinio kun sia tuta popolo aliĝus al la movado por ruli la neĝbulon de la angla, tiam la K-valoro de la angla fariĝos kosma nombro. En tiu situacio ajnaj novaj ordoj ne povus esti konstruataj. La mondo apartenos al la angla, sendube.
2. Necesas kreskigi la K-valoron de la ĉina, subtenante lernadon kaj instruadon de la ĉina kiel fremdlingvo en la tuta mondo. Laŭ statistiko nun estas 25 milionoj da lernantoj de la ĉina. Oni planas plialtigi la nombron ĝis 100 milionoj en la venontaj kvin jaroj. Gravas atentigi, ke la agado ne estu movado por establi alian fortegan lingvon, kiu povus formanĝi aliajn lingvojn. Ni alcelas alian metodon por stabiligi la lingvan sistemon de la mondo, se vi ankoraŭ memoras ke ni nun havas nur unu solan interlingvon sur la internacia nivelo de la lingva sistemo.
3. Kiel mi ĵus menciis, ĉijare 20 milionoj da mezlernejanoj eniras la kursojn por la angla. Tio ne nur kreskigas la K-valoron de la angla, sed ankaŭ reduktas la K-valoron de la ĉina kaj de Esperanto. Se fremdlandanoj povas bone interkomuniki angle en Ĉinio, kial ili devas lerni la ĉinan? Do, Ĉinio devas urĝe ellabori politikon pri fremdlingva instruado, por eviti nenecesan investon en lernado de la angla, por limigi la ekspansion de la angla.
4. Necesas intensigi la instruadon de aliaj fremdlingvoj, malkoncentri la lernantojn de la angla. Tio ne nur reduktas la K-valoron de la angla, sed ankaŭ kreskigas la K-valorojn de aliaj lingvoj. Tio faras la sistemon pli stabila kaj ankaŭ kontribuas al la diverseco de la lingvoj de la mondo.
5. Sur ĉiuj niveloj de la ĉina eduksistemo estus bone oficiale enkonduki Esperanton. Kelkaj studoj montras, ke la lernado de Esperanto plifaciligas al lernantoj la postan lernadon de aliaj lingvoj. Se ni instruas Esperanton por 20 milionoj da mezlernejanoj tute aŭ parte, la simpleco de Esperanto eble interesos la lernantojn. Tiam la rezulto estos pli bona ol nun. Ekde supera mezlernejo oni enkondukas aliajn fremdlingvojn, inklude la anglan, tiam la lernantoj povas libervole elekti lernotan lingvon. Ĉar la lernantoj jam havas bazajn konojn de Esperanto, tiam espereble la rezulto de la lernado de aliaj lingvoj pliboniĝos. Sur la universitata nivelo la ĉefa celo de fremdlingva

instruado estas la plifortigo de la faka angla por faciligi la legadon de faka literaturo. Estas rekomendinde atingi aktivajn regadon kaj uzadon de Esperanto, pasivajn regadon kaj uzadon de la angla. Tio reduktus la tempon de lernantoj por lerni fremdlingvon. Oni povas uzi pli multe da tempo por akiri fakajn konojn. Por plenumi tiujn taskojn oni devus fari jenon:

- Oni starigu Esperanto-fakon, kiu servu al la trejnado de instruistoj kaj sciencistoj, kiuj lernu flue regi Esperanton. Tio estas grava por realigi la proponon de Phillipson, uzi Esperanton en internaciaj organizaĵoj kiel internan lingvon kaj interlingvon de interpretado (ĉefkabineta lingvo).
- Oni devas fondi esplororganizaĵon por esperantologio kaj interlingvistiko, kiu liveru al la praktiko la teorian nutraĵon kaj forton.
- Necesas atingi, ke Esperanto havu en la eduksistemo normalan aŭ eĉ pli altan lokon kompare kun aliaj fremdlingvoj.
- Necesas subteni la eldonadon de diversaj dokumentoj kaj fakrevuoj en Esperanto.

6. Edukado estas la fundamento de ĉiu agado, estas la klavo por konstrui novan interlingvan ordon. Kiam ni havos sufiĉan stokon da Esperanto-parolantoj, kiam Esperanto havos signifan K-valoron, tiam ni konvinke proponos Esperanton kiel la lingvon de internaciaj organizaĵoj kaj rilatoj.

Per tiuj ĉi klopodoj ni kreskigos la K-valorojn de la ĉina kaj de Esperanto, samtempe reduktos la K-valoron de la angla kaj ankaŭ kreskigos la tempon de la lernantoj por faka lernado.

Antaŭ 83 jaroj, d-ro Nitobe Inazô, tiama Asista Ĝenerala Sekretario de Ligo de Nacioj, reveninte de la 13-a Universala Kongreso de Esperanto (1921, Prago), metis Esperanton sur la longan vojon al internaciaj rilatoj[1]. Antaŭ 50 jaroj Unesko rezolucie agnoskis la valoron de Esperanto por la homaro. Hodiaŭ la mondo bezonas Esperanton pli ol antaŭe, almenaŭ teorie.

La hodiaŭa Ĉinio jam plene konscias la gravecon de egaleco, diverseco kaj ekvilibro en internaciaj rilatoj. Nova interlingva ordo konstruiĝas ĝuste sur ĉi tiuj tri principoj. Tiel, ĝi povas esti konsiderata kiel integra parto de nova ordo de internaciaj rilatoj.

En ajnaj internaciaj rilatoj, se oni daŭre malatentas la lingvan problemon, tiam nin atendos la mondo de la angla. Ĉu tio vere estas nova mondo kaj nova ordo, kiujn sopiras la popoloj kaj politikistoj de la tuta terglobo?

---

[1] Fettes, Mark/Bolduc, Suzanne: *Al lingva demokratio. Towards Linguistic Democracy. Vers la démocratie linguistique*. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 1998. pp. 62 – 78.

Kunligu Esperanton al Monda Federalista Movado

MIYOSHI Etsuo

Monda Federalista Movado

Karaj samcelantoj:

Mi diris "samcelantoj", ĉar mi opinias ke ni ĉiuj celas mondan pacon, ĉu ne?

Antaŭ tri jaroj okazis direktora konferenco de la Monda Federalista Movado sur malgranda insulo, Ventotene, apud Napolo, Italio. Ventotene estis elektita, ĉar ĝi estas historia loko, kie antaŭ sesdek jaroj la fama politikisto Altiero Spinelli dissendis la "Ventotenan Manifeston" el malliberejo. Do, ĝi ligiĝas al la nuna EU.

La prezidanto de Monda Federalista Movado estis Peter Ustinov, la fama brita filma aktoro kaj verkisto. La "Ford-Fondaĵo", "MacArthur-Fondaĵo" kaj aliaj subtenas la Mondfederalistan Movadon, kun buĝeto de kelkmilionoj da dolaroj jare.

55 direktoroj el 26 landoj ĉeestis la konferencon.

En la lasta momento de la kunsido, mi deklaris:

"En Japanio, petoj de patentoj estas ĉirkaŭ 400 000 jare. Tio estas duoble pli ol en Usono. Tamen, en la sciencaj kampoj, inter la recevintoj de la Nobel-Premio estas 198 usonanoj, 79 angloj, 69 germanoj, kaj nur 7 japanoj. Japanio estas la 13-a lando. Tiu premio estas pro scienco, sed la plejmulto de la premiitoj estas angle-parolantoj. Dum nia lernado de la angla lingvo, angle-parolantoj povus studi avangardajn teknikojn, ĝui filmojn, literaturon, sportojn ktp. Pro tiu privilegio, ili povas kuri neimageble antaŭen. Je la nivelo de la angla lingvo kiun vi atingas, dependas viaj profesio kaj salajro, eĉ via ebleco geedziĝi. Mi bezonis 10 jarojn por lerni la anglan sufiĉe por vendi gantojn, sed tute ne atingis sufiĉe altan nivelon. Tiam min ravis la ideo de Esperanto.

Esperanto estas lingvo kiu havas nur 16 regulojn, kaj neniajn esceptojn. Ĝia ortografio estas tute fonetika. Do, ĝi estas lernebla kvinfoje pli rapide ol la angla. Dum pli ol 100 jaroj ĝi disvastiĝis tra la tuta mondo. Nun per retpoŝto ĝi atingas pli ol 100 landojn. Pli ol 10 radiaj stacioj elsendas Esperante, kaj multaj lernejoj kaj universitatoj donas Esperantajn lecionojn tra la mondo." Tiel mi klarigis al ili.

"Do, angle-parolantaj landoj riĉiĝas, kaj aliaj landoj mizeriĝas pro tia malfeliĉa 'anglismo'. Por eviti tion, bonvolu unuigi la Esperanto-movadon kaj la Mondan Federalistan Movadon." Tiel mi petis ilin.

Mi bezonis fortan kuraĝon por kontraŭi la anglan en angla-lingva konferenco. Sed, finfine ili akceptis mian alvokon "por realigo de monda federacio, ni devas unue krei Esperanto-mondon". La administracio akceptis ke en la Monda Konferenco en Londono de 2002, ni havos Esperantajn budon kaj seminarion.

Antaŭ la Ventotene-konferenco, mi petis same en la Monda Konferenco en San-Francisko, kaj en la Monda Direktora Konferenco en Japanio. Bedaŭrinde, mia alvoko estis vana. Post multaj jaroj de miaj unuaj klopodoj, finfine ili konsentis.

Do, ĉe la Monda Federalista Konferenco, kiu okazis en julio en Londono, ni havis budon kaj okazigis Esperanto-seminarion por la unua fojo. Tiun ĉi konferencon ĉeestis 250 partoprenantoj el 36 landoj. Tie, usona MFM-reprezentanto laŭte anoncis al esperantistoj ĉe la elirejo de la kongresejo: "Via movado eraras."

La Monda Federalista Movado celas "forigi landolimojn kaj unuigi la mondon". La Esperanto-movado alvokas "komunan mondlingvon por forigi lingvajn barojn". Kvankam ili havas similajn ideojn pri mondpaco, tamen la movadoj estas apartaj. Estas malmultaj la homoj kiuj, kiel mi, rilatas al ambaŭ. MFM ĉiam uzas la anglan lingvon, kaj neniu eĉ pensis, ke ekzistas lingva problemo.

Partoprenis la seminarion 15 esperantistoj kaj 45 mondfederalistoj. Unue, Prof. Glossop, de la Universitato de South Illinois, multjara aktivulo en ambaŭ movadoj, raportis: "Se ni kunligas Esperanton al la Monda Federalista Movado, breĉo fermiĝos. Se ne, estas nenia espero por la estonteco."

"Kial oni ne povas uzi Esperanton kongrese?" demandis loka esperantisto. Angla federalisto kaj iama ano de la Brita Suba Ĉambro respondis: "En ĉi tiu kunveno partoprenas nur homoj kiuj povas paroli la anglan. Mankas buĝeto por traduki en Esperanton." "Esperanto igas tradukajn elspezojn tute nenecesaj", kontraŭargumentis alia.

"Tiu ĉi kunveno estas tute regata de anglaj denaskuloj", diris norvega delegito. Japana delegito malvualis: "Partoprenis preskaŭ 40 japanoj, sed ili tediĝis, pro tio ke ili ne komprenis la anglan, do multaj el ili iris al Parizo por turismi."

La sekvantan matenon kunsidis komitato por prepari rezolucion. En la komitato estis kvar esperantistoj, kvin federalistoj kaj sep aŭ ok observantoj. Ankaŭ mi havis la honoron ĉeesti. La itala komitatano diris: "Esperanto estas kreita lingvo, pro tio maleblas", sed angla komitatano argumentis: "Ankaŭ la anglan kaj la germanan kreis prauloj, kial do Esperanto estas stranga?" Usona gravulo de la Monda Banko montris sian enradikiĝintan intereson per: "Fi, mi devus ankoraŭ studi novan lingvon!" Tiel realiĝis la disputo de la antaŭa vespero, kiu daŭris du horojn por fari kelklinian tekston.

Mi deklaris: "Se Esperanto fariĝus la komuna lingvo de la mondo, ankaŭ anglalingvanoj devas studi ĝin, kaj ebliĝus lingva egaleco. Esperanto nur bezonas unu kvinonon de la peno por lerni la anglan. En la multlingva Eŭropa Unio elspeziĝas unu triono de la tuta administracia buĝeto, enorma monsumo, por interpretado kaj tradukado. Sed se komuna lingvo disvastiĝus al la tuta homaro, ne mezureblus la ekonomia, kultura kaj interpersona avantaĝo." Fine aldoniĝis jena frazo al la rezolucio: "Federalistoj lernu la nenacian lingvon Esperanto."

Ne forgeseblas la diraĵo de juna angla esperantisto: "Mi ne povas kaŝi mian indignon vidante la arogantan sintenon de homoj dirantaj, ke la angla estas la internacia lingvo, kaj la mankon de konsidero pri la neanglaj popoloj. Profunde mi sentis la gravecon de la neŭtrala lingvo Esperanto."

Ankaŭ en Japanio troviĝas opinioj ke la angla estu la dua oficiala lingvo. Gravuloj bezonas konscii pri la profunda diskriminacio kaj ŝanĝi la lingvan politikon al nacia lingvo plus Esperanto. Se daŭros kiel nun, la tuta mondo iĝos angleparolanta. Tio certe kaŭzos fortajn politikajn problemojn inter angleparolantaj landoj kaj la ceteraj landoj.

Antaŭ kelkaj monatoj, la franca ministro de kulturo Jean J. Aillagon diris en radio-elsendo ke Esperanto ne havas kulturon, do ne estas taŭga lingvo por EU. Sed, dum pli ol 100 jaroj, naskiĝis ĉirkaŭ 1000 infanoj de internaciaj geedziĝoj inter esperantistoj, infanoj kiuj parolas Esperanton denaske. Kun sufiĉe da komunikado kaj amo naskiĝis denaskaj parolantoj, ĉu ne?

Aliloke, oficistoj de la interpretada kaj tradukada servo en EU postulis antaŭnelonge, ke iliaj laborlingvoj limiĝu al nur la angla, franca kaj germana lingvoj. Parolantoj de malgrandaj lingvoj devas esti interpretataj pere de tiuj ĉefaj lingvoj. Ili diris ke la tuta kosto estos nur 2 eŭroj por ĉiu EU-ano jare, tio estas, nur la kosto de unu taso da kafo. Ĉi tiu aserto estas granda konspiro, ĉar ĝi kaŝis gravan informon, ke ili ne kalkulis la tutan koston por 450 milionoj da EU-anoj. Ili kalkulis nur la koston de EU-administrado. EU garantiis konservon de kultura diverseco, inkluzive lingvojn, sed tia sinteno nuligis ilian fundamentan premison. Ili intence ne atentigis pri la grandega lingva malegaleco.

Mi vizitis Pollandon en majo por establi kompanion en la urbo Malbork. La lastan someron mi ricevis inviton por malkovra ceremonio de japana memorŝtono en la "Parko de la Mondo". Kiam mi estis tie, la urbestro entuziasme proponis al mi, ke mi investu tie. Ekzistas ŝiphaveno en Gdańsk, kaj ni povus importi la materialojn el Azio malaltkoste. Ni ankaŭ povus dungi parolantojn de la angla, germana kaj franca lingvoj facile, por starigi vendadan fakon. Tio ne eblus en Japanio. La salajroj estas malaltaj por produkti baston-valizojn, kaj ni ankaŭ donus laboron por multaj senlaboruloj. Grava punkto estas, ke kiam Pollando aniĝos al EU ni ne bezonos pagi imposton, kiam ni vendos al EU-landoj.

Mi vizitis multajn liverantojn por la valizaj materialoj, kun mia reprezentanto D-ro Eduardo Kozyra, aktivulo en la Esperanto-movado tie. Preskaŭ ĉiuj kiuj renkontis min admiris mian kapablon paroli Esperanton, kaj duono de ili garantiis, ke ili eklernos nian lingvon. Mi negocis pri ŝtofo, fadeno kaj plastaj aĵoj por la valizoj, kaj pri la investado kun la urbaj aŭtoritatoj, ankaŭ pri bankaj negocoj ktp, uzante nur Esperanton. Ĝi bone kaj profunde funkciis, eĉ kvankam mi ne estas spertulo pri Esperanto. Tiu estis la unua fojo ke mi uzis Esperanton komerce, kaj tio tre impresis min.

Miaj sinsekvaj spiritaj gvidantinoj de "Oomoto" instruis, ke la internacia lingvo Esperanto estas la plej konkreta maniero por atingi mondan pacon. Do, mi dediĉis mian tutan energion por atingi ĝin. Dio donis al ni etan ŝancon por efektivigi sensangan lingvan revolucion en EU nun. Se tio okazos, ĝi influos la tutan mondon. Nun, miliardoj da homoj suferas pro tio, ke ili devas lerni la anglan lingvon, kun malkontentigaj rezultoj. Ni devas helpi ilin. Se ni preterpasas tiun solan ŝancon, la angla dominados tra la mondo, kaj eksplodus tolerado de maljusto kaj malespero en neangleparolantaj landoj. Do, la mondo tragedios. Koran dankon.

La bahaa vidpunkto pri mondaj lingvaj problemoj

Kimiko SCHWERIN

Bahaa Internacia Komunumo

1. Enkonduko

La temo de ĉi tiu Simpozio resonas laŭte en la mensoj kaj koroj de ĉiuj membroj de la Bahaa Internacia Komunumo, ĉar tiu Komunumo emfazas la finan adopton de universala helplingvo, kiun lernos ĉiu civitano de nia planedo, kune kun la gepatraj lingvoj. Aldone, niaj membroj ankaŭ havas specialan rilaton al la lingvo Esperanto kaj al esperantistoj. Estas du kialoj por tio. Unue, la filo de la Fondinto de nia Komunumo, 'Abdu'l-Bahá, laŭdis la klopodojn de la esperantistoj krei universalan helplingvon kiu estus facile lernebla por preskaŭ ĉiu ajn homo sur nia planedo. Se tia lingvo estus akceptata de ĉiuj popoloj, tio solvus multajn problemojn kaj miskomprenojn kaŭzitajn ĉar diversaj homoj uzas malsimilajn lingvojn, kaj samtempe plifaciligus tutmondajn komunikadon kaj kunlaboron kiel neniam antaŭe. Sed estas ankoraŭ pli subtila kialo: la filino de D-ro Ludoviko Lazaro Zamenhof, la kreinto de Esperanto, estis mem amata ano de la Bahaa Komunumo. Do, niaj komunumanoj havas grandan respekton por la klopodoj de la esperantistoj, kaj simile havas grandegan respekton por la morala forteco kaj spirito kiun D-ro Zamenhof helpis inspiri en sian filinon, kiu dediĉis sin al la helpado de tiuj malpli bonŝancaj ol ŝi mem, eĉ dum ŝiaj lastaj du jaroj, en la neimageble teruraj kondiĉoj de la Varsovia Geto. Ĉi tio estas fundamenta temo de ĉiuj grandaj homamaj entreprenoj: oferi sin por la bono de aliaj.

2. La bahaa vidpunkto pri mondaj lingvaj problemoj

Laŭ Bahá'u'lláh, la Fondinto de la Bahaa Internacia Komunumo, "la plej granda ilo por antaŭenigi harmonion kaj civilizacion" estas la realigo de universala helplingvo. Bahá'u'lláh forte rekomendis al la gvidantoj de la mondo elekti unu lingvon por la uzo de ĉiu en la mondo, kaj adopti komunan skribon. Li ankaŭ asertas ke tiu ĉi universala helplingvo estos la kaŭzo de la homa unuiĝo, kaj unu el la signoj de la 'plenkreskiĝo' de la homaro:

"Ekde la komenco de la tempo mem, la lumo de unueco prilumis la mondon, kaj la plej granda rimedo por homara unuiĝo estas ke la popoloj de la mondo komprenu la skribon kaj lingvon de aliaj." Bahá'u'lláh forte rekomendis al la gvidantoj de la mondo, ke ili "aŭ elektu unu lingvon inter tiuj jam ekzistantaj, aŭ alian, novan lingvon. Simile, ili elektu komunan skribon. Ambaŭ estu instruataj en ĉiuj lernejoj de la mondo. Tial la mondo estos rigardata kiel unu lando kaj unu hejmo."

En la ĉi-subaj paragrafoj mi donas ĝeneralan priskibon pri lingvaj problemoj kiujn la Bahaa Komunumo spertas, kaj poste kelkajn komentojn pri la celo de

universala helplingvo. Mi prezentos nian vidpunkton pri la efiko de la elekto de tia lingvo sur la mondan civilizacion. Mi ankaŭ diskutos la demandon, kiu lingvo estu elektita, kaj kiu farus tiun decidon, kaj komentos pri la neceso havi tutmondan interpromeson akcepti universalan lingvon kaj universalan skribon. Fine, mi konkludos per kelkaj komentoj pri la urĝa bezono de tia lingvo por antaŭenigi tutmondajn pacon kaj komprenemon.

3. Lingvaj problemoj en la Bahaa Internacia Komunumo

Lingvaj problemoj kiuj alfrontas la Bahaan Internacian Komunumon praktike, intense kaj daŭre inkluzivas la jenajn:

a. Internaciaj konferencoj. La Bahaa Internacia Komunumo ofte okazigas konferencojn trans naciaj landlimoj. En tiuj konferencoj tradukado kaj interpretado en multajn lingvojn estas peza sed sincere plenumata devo.

b. Dokumentoj kaj korespondado inter la internaciaj, naciaj kaj lokaj niveloj. En la nuna tempo, la angla lingvo estas uzata kiel la plej disvastigita lingva komunikilo. Ĉi tiu kutimo, tamen, limigas komunikadon kun neanglaj popoloj kaj landoj. Estas malfacile, aldone, trovi ĝustan ekvilibron inter la angleparolantoj kaj la neangleparolantoj.

c. Internaciaj kunvenoj. Ĉiun kvinan jaron la Bahaa Komunumo kunvenigas Internacian Kunvenon por elekti la Bahaan Tutmondan Konsilantaron, kiu gvidas la Internacian Bahaan Komunumon. Proksimume mil kvincent naciaj reprezentantoj kunvenas por diskuti aferojn rilate al la Bahaa Kredo kaj por interŝanĝi diversajn spertojn. Kvankam la angla lingvo estas la ĉefa komunikilo ĉe ĉi tiuj internaciaj kunvenoj, amaso da interpretistoj kaj tradukistoj, kaj antaŭkunvena tradukado de amaso da dokumentoj en diversajn lingvojn, estas bezonataj kaj ĉe la nacia, kaj ĉe la internacia niveloj.

d. Eksterlandaj vojaĝado kaj loĝado. Bahaanoj kiuj vojaĝas al kaj loĝas en aliaj landoj por provizi spiritan gvidadon, kaj kiuj, kiel instruistoj, sciencistoj, kuracistoj kaj komercistoj provadas kontribui pozitive al la popoloj de tiuj landoj, ofte renkontas problemojn pro la nescio de la loka lingvo, kaj la bezono lerni la lingvon, aŭ la lingvojn de la landoj en kiuj ili laboras. Iliaj vivoj estos tiom pli facilaj kiam la universala helplingvo efektiviĝos.

e. La granda diverseco de la Bahaa Komunumo. La Bahaa Komunumo inkluzivas grandegan etnan kaj nacian diversecon. Pli ol du mil nacioj, etnaj grupoj kaj triboj estas membroj de la Bahaa Komunumo, kaj estas multe da lingvoj parolataj en ĝi. Ĉi tio, kompreneble, kaŭzas multajn malfacilojn, similajn al tiuj de aliaj internaciaj organizaĵoj kaj komunumoj. Multaj rimedoj estas dediĉataj al la tradukado de korespondaĵoj, libroj, raportoj, dokumentoj por eksteraj organizaĵoj, retpaĝoj kaj aliaj informmaterialoj por la ĝenerala publiko. Aldone, kiel religio kun multaj Sanktaj Skribaĵoj, la Bahaa Komunumo havas la devon traduki la Sanktajn Skribaĵojn zorgeme kaj ekzakte por respeguli la originalajn tekstojn. La bahaa administracio pritraktas tiajn aferojn kiom ĝi povas, kun la helpo de tradukistoj, plejparte

voluntuloj. Informo pri la bahaa religio kaj la Sanktaj Skribaĵoj nun estas tradukita en pli ol okcent lingvojn, sed ofte nur malgrandparte pro manko de rimedoj.

Pri la demando, ĉu la Bahaa Komunumo decidis pri precizaj agadplanoj pri la lingva problemo, mi povas raporti ke oni ĝis nun ne decidis ion mondskale. Kelkfoje kaj kelkloke, pro praktikaj problemoj, iu decidas uzi unu lingvon por internacia komunikado, kaj pro evidentaj kialoj, ĝenerale oni uzas la anglan lingvon. La du oficialaj lingvoj de la Bahaa Tutmonda Konsilantaro estas la angla kaj la persa. Ankaŭ naciaj konsilantaroj, ekzemple, devas decidi pri la uzo de unu lingvo el multaj ĉe bahaaj laborkunvenoj, kaj ofte havas liston da lingvoj kiuj uzeblas por tradukado kaj interpretado.

Do, la lingva problemo tute ne estas solvita interne de la Bahaa Komumuno, kaj verŝajne ne estos solvita dum la proksima estonteco. La Bahaa Tutmonda Konsilantaro jam deklaris: "Ke internacia komunikado estas malfacila en multlingva mondo, estas evidente al kiu ajn bahaano kiu vojaĝas eksterlanden aŭ kiu ĉeestas internaciajn konferencojn." Plue, ĝi opinias ke "elekti unu lingvon por bahaa uzado kiel internacia helplingvo en la nuna tempo kaŭzus pli grandajn malfacilaĵojn ol ĝi solvus." Tamen, ĝi konsilis al bahaanoj ke ili "memoru ke lingva unuiĝo estas unu el la plej gravaj principoj de la Kredo, kaj ke ili subtenu la ideon, kiam eble, kaj preĝu ke en la baldaŭa estonteco la registaroj de la mondo elektos unu lingvon kiu estos instruata en la lernejoj de la tuta mondo kiel helplingvo, aldone al la gepatra lingvo de la studentoj."

4. Cele al universala helplingvo

Nun mi ekzamenos kelkajn faktorojn konsiderotajn pri universala helplingvo.

4.1. La celo de universala helplingvo

Por la bahaanoj, universala helplingvo estas absolute nemalhavebla. Abdu'l-Bahá deklaris, ke "nur kiam lingva unuiĝo efektiviĝos, povos efektiviĝi kaj establiĝi la 'Plej Granda Paco' kaj la Unueco de la Homaro. Per lingvo esprimiĝas la misteroj kaj sekretoj de homaj koroj. La koro estas skatolo, kies ŝlosilo estas lingvo." Plue, la universala helplingvo estas ne nur por plirapidigi kaj plisimpligi la interŝanĝon de informado, sed por plifaciligi veran interkonsultadon, kio estas ĉe la centro de la funkciado de la Bahaa Komunumo. La 'Leĝo pri Konsultado' estas grava rimedo donita de la Fondinto por efektivigi veran unuecon inter la diversaj popoloj de la mondo. La bahaa mondo, kies membroj troviĝas en ĉiu parto de la mondo, uzas ĉi tiun metodon ĉiutage por solvi siajn problemojn, eĉ ĉe la internacia nivelo. Interkomunikado logike postulas komunan lingvon, kiun ĉiu povas kompreni kaj uzi. En la Bahaa Komunumo tre nature estiĝas multaj interrasaj kaj internaciaj geedziĝoj kaj familioj. Por ili, komuna lingvo kiun ĉiu familiano povas paroli flue, donas senton de unueco kaj bonfarto.

Parolante pri universala helplingvo, Abdu'l-Bahá diris: "Per ĝi, internacia edukado ebliĝos.… La disvastiĝo de konataj faktoj pri la homa mondo dependas je lingvo. La klarigado de la Diaj instruoj disvastiĝas per ĝi. Se la diverseco de lingvoj,

kaj la nekompreno de aliaj lingvoj daŭros, ĉi tiuj gloraj celoj ne povas esti atingitaj. Tial, la plej-unua servo al la homa mondo estas establi ĉi tian lingvon por internacia komunikado. Ĝi ebligos trankvilecon en la homa komunumo. Per ĝi, scienco kaj arto disvastiĝos inter la nacioj. Ĝi ebligos la progreson kaj disvolviĝon de ĉiuj rasoj. Ni devas klopodi kiom eble establi internacian lingvon tra la mondo."

4.2. Rezultoj de la akcepto de universala helplingvo

La instruoj de la Fondinto de la Bahaa Internacia Komunumo kondukas al koncepto de la homara estonteco kiu povas efektiviĝi, almenaŭ certagrade, per la akcepto de universala helplingvo. La sekvantaj diraĵoj plue klarigas iujn aspektojn de tiu koncepto.

"La unueco de la homaro, kiel antaŭvidita de Bahá'u'lláh, postulas la establon de Monda Komunumo en kiu ĉiuj nacioj, rasoj, kredoj kaj klasoj estos proksime kaj porĉiame unuigitaj. La Monda Komunumo havos sian propran registaron, kies membroj, kiel kuratoroj de la tuta homaro, establos tiajn leĝojn kiuj ordigos la vivon, plenumos la bezonojn kaj alĝustigos la rilatojn inter ĉiuj rasoj kaj popoloj."

"Tutmonda Registaro, subtenata de internacia soldataro, plenumos la decidojn kaj efektigos la leĝojn de la Monda Komunumo, kaj protektos la unuecon de la tuta Komunumo." En ĉi tiu monda socio, rimedo por monda interkomunikado estos ellaborita. Ĝi inkluzivos la tutan mondon, liberigita de naciaj malhelpoj kaj limigoj, kaj funkcios kun mirinda rapideco kaj perfekta reguleco. Monda lingvo, monda skribo, monda literaturo, universala sistemo pri mono, pezo kaj longo, simpligos kaj faciligos la interagadon kaj interkomprenon inter la nacioj kaj rasoj de la homaro".

"En tia monda socio, scienco kaj religio, la du plej potencaj fortoj en la homa vivo, forigos kontraŭemon, kunlaboros kaj harmonie disvastiĝos. La ekonomiaj rimedoj en la mondo estos plene utiligataj, ĝiaj merkatoj estos kunordigitaj kaj disvastigitaj, kaj la distribuado de ĝiaj produktaĵoj estos ĝuste reguligitaj."

"Konkuremo, malamo kaj intrigo inter nacioj ĉesos, kaj interrasan malamikemon kaj antaŭjuĝon anstataŭos interrasa amikeco, komprenemo kaj kunlaboro. La kaŭzoj de religia malpaco malaperos, kaj malĝustaj diferencoj inter klasoj estos nuligitaj. Povreco unuflanke, kaj troa riĉeco aliflanke, malaperos. La granda energio malŝparita pro milito, ĉu ekonomia ĉu politika, estos dediĉata al celoj kiuj plivastigos inventaĵojn kaj teknikajn novaĵojn kaj kondukos al plialtigo de la homa produktivo, al la malaperigo de malsano, al plialtigo de scienca esplorado, al la plibonigo de la sanstato de la homa korpo kaj la pliakrigo kaj plifajnigo de la homa cerbo, al la utiligo de la neuzataj kaj nuntempe nekonataj havaĵoj de la planedo, al la plilongigo de la homa vivo kaj la antaŭenigo de kiu ajn alia aganto kiu povos stimuli la intelektan, moralan kaj spiritan vivon de la tuta homaro."

La homaro nun antaŭenmarŝas al tia mondo, pere de la unuigaj fortoj de la vivo. Tia mondo certe fine realiĝos, bahaanoj firme konvinkiĝas, eĉ se nur post malfacilaj periodoj, miseksperimentoj kaj malsukcesoj. Universala helplingvo estos unu el la esencaj eroj de tiu estonteca homa socio. Ĝi ankaŭ estos unu el la plej potencaj rimedoj por efektivigi tian tuthomaran socion.

4.3. Kiu lingvo estas la plej taŭga por fariĝi la universala helplingvo?

Nun ke ni rekonas la necesecon de universala helplingvo, ni scivolemas pri tio, kiu lingvo estos la plej taŭga fariĝi nia komuna interlingvo. La jenaj komentoj, bazitaj sur Bahaaj Skribaĵoj, iom klarigos ĉi tiun aferon.

La angla: Kiel mi diris antaŭe, en la nuna tempo la angla lingvo plej ofte uzatas por komunikado en la Bahaa Internacia Komunumo. Ĉi tio, tamen, estas nur pro praktikaj kialoj, kaj oni ne povas konkludi ke la bahaanoj speciale preferus ke la angla lingvo fariĝu la universala helplingvo. Por ke la angla fariĝu la universala helplingvo, oni devos priatenti iujn el ĝiaj karakerizoj, ekzemple ke ĝia gramatiko havu simplajn regulojn, kun neniu malregula gramatikaĵo, ortografio aŭ morfologio kaj sen diversaj dialektoj, por ke ĝi estu facile lernebla por la popoloj de la mondo.

La araba kaj la persa: Bahá'u'lláh malkovris la Parolon de Dio plejparte en la araba lingvo, kaj malpli en la persa. Bahá'u'lláh neniam postulis en siaj skribaĵoj, ke liaj disciploj devus lerni tiujn aŭ kiun ajn alian lingvon. Li laŭdis la vastecon, esprimivon kaj elokventecon de la araba lingvo, kaj rimarkis ke neniu alia lingvo kompareblas pro ĝiaj vastaj eblecoj. Kompreneble, kelkaj bahaanoj studas ĉi tiujn du lingvojn por aliri rekte al la originaloj de la Sanktaj Skribaĵoj.

Esperanto: Esperanto disvastiĝis jam tra la tuta mondo, multe pli ol kiu ajn simila lingvo. Bahaanoj estas kuraĝigitaj… lerni ĝin kaj traduki bahaan informadon en ĝin. En la Bahaaj Skribaĵoj troviĝas multaj tre pozitivaj komentoj pri Esperanto, ekz. la jenaj vortoj de Abdul-Bahá: "Kaj nun, Dio estu laŭdata, Doktoro Zamenhof inventis la lingvon Esperanto. Ĝi havas la eventualan eblecon fariĝi la internacia lingvo por interkomunikado. Ni ĉiuj devas esti dankemaj al li por ĉi tiu nobla provo, ĉar tiumaniere li servis bone al la homaro. Li inventis lingvon kiu donacos Diajn benojn al ĉiuj popoloj."

Kaj ni povas trovi la jenan interesan profetan diraĵon pri Esperanto: "Ĉi tiu lingvo disvastiĝos kaj internaciiĝos iugrade, sed poste, pli kompleta lingvo, aŭ la sama lingvo kun kelkaj ŝanĝoj, estos akceptita kaj fariĝos universala."

Tamen, kiel mi diris supre, la Bahaa Komunumo ĝis nun ne konsilis, kiu lingvo estu elektita kiel la internacia helplingvo. Eĉ rilate al Esperanto, ni bahaanoj subtenas ĝin, ne pro tio ke "ni opinias ke ĝi estos elektita kiel la helplingvo, sed ĉar ni subtenas la principon pri la neceseco de tia lingvo en la estonta monda civilizacio."

Ni, kiel bahaanoj, atendas senpacience la alprenon de universala helplingvo kiom eble plej frue. Tamen, ni ne estas protagonistoj de unu lingvo aŭ alia. La pozicio de la Bahaa Komunumo estas ke "kiam unu lingvo estos elektata de la nacioj de la mondo kiel la internacia komunikilo, sendube ankaŭ ni alprenos ĝin kaj uzos ĝin. Se tiu lingvo estos Esperanto, tio tre plaĉus al ni, pro niaj longaj kaj amikaj rilatoj kun esperantistoj, kaj pro la granda kontribuo kiun ilia lingvo jam faris al la plibonigo de komprenemo inter la popoloj de la mondo."

4.4. Kiu elektos la universalan helplingvon?

Bahaanoj firme kredas ke la tempo certe venos kiam internacia lingvo estos uzata universale, sed ni ankaŭ opinias ke "ne eblas nun antaŭvidi ekzakte kiam tio okazos". "Unu lingvo povos nature formiĝi kiel la universala monda lingvo", aŭ

"supozeble eventoj devigos la registarojn, aŭ unuope aŭ kunlabore, elekti internacian helplingvon, kiu estos instruata en ĉiuj lernejoj kaj uzata en internacia komerco."

La bahaanoj esperas ke "la registaroj de la mondo, pere de siaj parlamentoj, efektivigos tiun historion decidon."

Se la registaroj de la mondo konsentus ke aŭ ekzistanta lingvo, aŭ konstruita, nova lingvo estu uzata internacie, ni tutkore subtenus tion, ĉar ni deziras ke tiu ŝtupo cele al la unuiĝo de la homaro okazu kiom eble plej frue.

5. Konkludo: tutmonda subteno al universala helplingvo kaj komuna skribo

Konklude, ni vidas la urĝan neceson krei kaj alpreni universalan helplingvon kiun ĉiuj pololoj en la mondo lernos aldone al la propra gepatra lingvo. Ni tute ne subtenas la ideon, ke tiu lingvo anstataŭu kiun ajn el la nunaj ekzistantaj lingvoj. La helplingvo estos uzata kiel internacia komunikilo, kaj por komunikado trans lingvaj baroj. Bahaanoj, kiam ili klopodas propagandi la ideojn de sia Kredo por la transformiĝo de la mondo el ĝia nuna maltrankvilo kaj malpaco al mondo paca kaj harmonia, tute nature ankaŭ subtenas la ideon de internacia helplingvo, ĉar tio estas unu el la plej bazaj principoj de nia Kredo. Krom tio, niaj ligoj al la Esperanto-movado estas tre proksimaj, preskaŭ ekde la naskiĝo de Esperanto, kaj nun estas daŭre flegataj de la Bahaa Esperanto-Ligo, kun membroj en pli ol kvindek landoj. La Bahaa Internacia Komunumo, kiel Ne-Registara Organizaĵo, kunlaboras kun esperantistoj kaj aliaj Ne-Registaraj Organizaĵoj en Novjorko por la alpreno de internacia lingvo. La Bahaa Komunumo estas preta daŭrigi sian subtenon al la ideo de internacia helplingvo.

Permesu al mi konkludi per citaĵo el dokumento eldonita de la Bahaa Internacia Komunumo okaze de la kvinkdeka datreveno de Unuiĝintaj Nacioj. Ĉi tiu dokumento enhavas plurajn sagacajn sugestojn pri la reformo, plibonigo kaj estonta disvolviĝo de Unuiĝintaj Nacioj. Unu el ĉi tiuj proponoj priatentas la lingvan problemon:

"Estus tre avantaĝe al Unuiĝintaj Nacioj, kiu nun uzas ses oficialajn lingvojn, se ĝi elektus aŭ unu ekzistantan lingvon aŭ kreus novan lingvon por uzado en ĉiuj ĝiaj forumoj. Tian paŝon jam delonge proponis multaj grupoj, kiel la esperantistoj kaj la bahaanoj. Krom malaltigo de elspezoj kaj simpligo de burokrataj procedoj, tia ago plifortigus la spiriton de unueco.

Ni proponas la establon de altnivela komitato, kun membroj el diversaj regionoj kaj el diversaj kampoj, kiel lingvistiko, ekonomiko, la sociaj sciencoj, edukado kaj la amaskomunikiloj, kiu komencos atenteman studadon pri la afero de internacia helplingvo kaj komune uzata skribo. Ni antaŭvidas ke finfine la mondo ne havos elekton: ĝi devos elekti unu universale akceptatan helplingvon kaj skribon, kiuj estos instruataj en lernejoj tutmonde, aldone al la lingvo aŭ lingvoj de ĉiu nacio. La celoj estos plifaciligo de la transiro al monda socio per pli bona komunikado inter la nacioj; malplialtigo de administraciaj elspezoj por komercaj entreprenoj, registaroj kaj aliaj instancoj en la internacia vivo; kaj ĝenerala pliboniĝo de bonkoraj rilatoj inter ĉiuj membroj de la homa familio. (Traduko el la angla de Daniel Kane)

Al nova internacia lingva ordo

LEE Chong-Yeong

Vic-Prezidanto de Universala Esperanto-Asocio

"La limo de mia lingvo estas la limo de mia mondo."
Ludwig Wittgenstein, aŭstra filozofo

1. Lingva unuiĝo

Kiam Esperanto estis kreita antaŭ unu jarcento, la ĉefa monda lingva problemo estis nekompreneblo inter diversaj nacioj pro malsamaj lingvoj. Pro tio, Zamenhof kreis Esperanton celante faciligi lingvan komunikadon inter malsamaj nacioj.

La malsameco de naciaj lingvoj ankoraŭ estas la baza lingva problemo en la mondo. Sed la nuntempa monda lingva problemo estas, aldone al la malsameco de naciaj lingvoj, la unuiĝanta tendenco de diversaj lingvoj al unu etna lingvo, t.e. la angla lingvo, aŭ pli precize dirite, la usona lingvo. Fakte, la angla lingvo fariĝis neoficiala sed efektiva internacia komuna lingvo, ne nur inter civitoj kaj en internacia komercado sed ankaŭ en interŝtataj organizaĵoj. UN oficiale uzas ses oficialajn lingvojn por oficialaj kunsidoj, sed por praktika ĉiutaga administrado, ĉefe la angla lingvo estas uzata kiel "laborlingvo".

La disvastiĝo de la angla lingvo kiel monda komuna lingvo estas kaŭzita ĉefe de la politika, ekonomia, teknologia kaj amasinformilaj fortoj de Usono. En la moderna mondo, la angla lingvo preskaŭ monopolas la mondajn amasinformilojn, precipe persatelitajn televidelsendojn, kaj regas en la komputila sfero.

La sintrudo de la angla lingvo kiel efektiva komuna lingvo alportas kun si diversajn problemojn, inkluzive kulturan. La etna lingvo enhavas en si propran kulturon kaj tendencas anstataŭigi la kulturon de la altruditaj nacioj.

Sed, la plej grava detrua problemo estas ke la etna lingvo estas lingvovora (aŭ kanibaleca). La uson-angla lingvo voras aliajn naciajn lingvojn en la terenoj de internaciaj kunvenoj, komerco, scienco, teknologio kaj turismo. Por efika internacia diskuto, efika komerca negocado, seriozaj sciencaj disertacioj, priteknologia diskuto kaj turisma ĉiĉeronado por miksitaj nacioj, oni plej ofte uzas la anglan lingvon. Eĉ enlande inter samnacianoj, oni ofte uzas la anglan lingvon por precizaj sciencaj kaj teknologiaj esprimoj. Baldaŭ nacia lingvo estos parolata nur en la hejmo kaj kafejo! Tio estas simptomo de la komenco de morto de la nacia lingvo. Eĉ la "angla" angla lingvo estas vorata de la uson-angla lingvo.

2. Lingva hegemonio

La unuiĝanta tendenco de la monda lingvouzo al unu etna lingvo, t.e. la angla, kreas problemojn de lingva hegemonio, kaj la plifortiĝanta tendenco de lingva hegemonio kaŭzas tiklajn sed seriozajn problemojn en la monda lingvopolitiko.

Lingvopolitiko fariĝas pli kaj pli malstabila faktoro de mondaj paco kaj justeco. Lingva hegemoniismo kaj lingva egoismo kaŭzas konfliktojn en multaj landoj en la mondo. Tiu ĉi situacio foje kreas prolingvajn tumultojn en diversaj landoj.

Pro la domina disvastiĝo de unu etna lingvo, fortoj kontraŭ tia lingva hegemonio en internaciaj organizaĵoj pli kaj pli kreskas.

Antaŭ kelkaj jaroj, Francio malpermis la uzon de anglaj vortoj en komercaj reklamoj. Por kolekti fortojn kontraŭ la angla lingvo, pli ol 30 franclingvaj landoj kunvenis en 1997 en Hanojo, Vietnamio, por fondi Internacian Organizaĵon de Francparolantaj Landoj (OIF), kaj S-ro Butros Butros Ghali, eksa Ĝenerala Sekretario de Unuiĝintaj Nacioj, fariĝis la Ĝenerala Sekretario de la nova franclingva internacia organizaĵo, kiu havas sian sidlokon en Parizo.

Vidinte, ke la tuta Moskvo estas kovrita de komercaj reklamoj en la angla lingvo, la tiama rusa prezidento Jelcin diris en 1997, ke li konsideras enkonduki leĝon kontraŭ la uzo de la angla en komerca reklamado.

La ĉina ministerio de eksteraj rilatoj diris en 1997, ke "Ĉinio estas granda lando, kaj la lingvo de la granda lando devas esti respektata", kaj ekkomencis uzi nur la ĉinan lingvon dum la semajna gazetara konferenco.

Unuiĝintaj Nacioj uzas oficiale ses lingvojn (angla, franca, hispana, rusa, ĉina, araba) por tradukoj kaj samtempa interpretado por ĉiuj oficialaj kunsidoj. Oni diras ke ĉirkaŭ 100 milionoj da usonaj dolaroj estas bezonataj jare por traduki unu lingvon. Do, la demando estas, kial aliaj lingve malfortaj landoj (Germanio, Japanio, Italio, Koreio ktp), kiuj ne profitas de la traduko, same devas pagi por la tradukado?

En Eŭropa Unio, la lingvoj de ĉiuj membro-ŝtatoj estas konsiderataj kiel egalaj, kaj pro tio 15 lingvoj estas uzataj por samtempa tradukado en oficialaj kunsidoj. Oni diras, ke ĉirkaŭ 1500 tradukistoj traktas ĉirkaŭ milionon da paĝoj jare.

